

Leo Semaŝko

Martha Ross Dewitt

Voĉdonrajto de infanoj kiel ŝlosilo al solvo de infanecaj problemoj

La enhavo

1. Letero al UNICEF kaj la respondo. Anstataŭ prefaco.
2. Infanoj, junularo kaj demokratia voĉdonrajto en la globalisma epoko.
 - 2.1. Koncepto pri voĉdonrajto de infanoj kaj ĝiaj socialaj postsekvoj.
 - 2.2. Koncepto pri internacia kompara esploro pri rilato de gepatroj kaj zorgantoj al voĉdonrajto de infanoj.
3. Projekto «Leĝo pri voĉdonrajto de infanoj» de Rusia Federacio.
4. Voĉdonrajto de infanoj: neceso kaj postsekvoj. Programo de speckurso.
5. La unuaj reeĥoj de eksterlandaj sociologoj.
6. Temaro de Internacia Konferenco «Infanoj en la nuntempa mondo» en 2005.
7. Dialogo kun UNICEF

1. Letero al UNICEF. Anstataŭ prefaco.

Al Ekzekutiva Direktoro de UNICEF sinjorino Carol Bellamy.

Estimata sinjorino **Carol Bellamy!**

Plezure ni sendas al Vi Koncepton pri voĉdonrajto de infanoj (19 paĝoj) kaj Koncepton de Internacia sociologia esploro pri rilato de loĝantaro al voĉdonrajto de infanoj (10 paĝoj). Jen la konciza esenco de la konceptoj.

Voĉdonrajto de infanoj ĝis 18 jaroj signifas disponigo al ili laŭleĝan *rajton* pri voĉdonado, enmeto ilin en porelektan liston, sed la *plenumado* de la voĉdono laŭleĝe komisiigis al iliaj gepatroj aŭ oficialaj zorgantoj. La rajto likvidos aĝan censon de industria socio kaj finos indiferentecon de socio al la infanoj. Ĝi venkos politikan diskriminacion de infanoj kaj egaligos ilin kun plenaĝuloj en voĉdonrajtoj. Rezulte estos formado de Leĝdonantaj organoj de tia *parlamentaj plimulto* (voĉoj de la gepatroj kaj iliaj gefiloj fondos *plimulton* de voĉoj de elektantoj), kiu kreos ŝtatan mekanismon por efektiva solvo de infanecaj problemoj (edukado, sano, krimo, narkotado, senhejmeco, prostituado k.a.).

Tiu mekanismo trovos resursojn por ega plibonigo de bonstato de infanoj kaj por plialtigo de vivkvalito de iliaj familioj. Ĝi levos la aŭtoritaton kaj rolon de la gepatroj, precipe

de la patrinoj. Ĝi garantios prioritatan financadon de sociala sfero, signifan plialtigon de salajro de instruistoj, kuracistoj kaj de ĉiuj, kiuj okupiĝas pri infanoj. Tio faros la ŝtaton vere sociala. Se ĝi estos akceptita, gajnos ĉiuj grupoj da loĝantaro. Tio rezultos al sociale orientita redistribuo de buĝeto al sistema solvo de problemoj pri malriĉeco de infanoj unuavice. La voĉdonrajto de infanoj estas taksata de ni kiel la *plej grava* rajto de infano, plenumado de kiu garantias plenumadon de ĉiuj infanrajtoj, nomitaj en Koncepto de UN pri infanrajtoj. Pli detale en la unua Koncepto ni ekzamenis la neceson, juran enhavon kaj socialajn rezultojn de voĉdonrajto de infanoj.

Historie tiu ĉi ideo ekzistas jam diversforme en la medio preskaŭ dum 100 jaroj! Ni nomos nur ĝiajn ekstremajn punktojn. Unue ĝin eldiris en 1905 granda rusa sciencisto D.Mendelejev en nerekta formo pri enkonduko de «infana censo» por deputitoj de la Ŝtata Dumo (Zavetnie Misli, Moskvo, 1995, p.344). Nuntempe, en januaro 2004 belga kardinalo Gustaaf Joos primokas balotan principon: unu persono – unu voĉo. «Al mi ŝajnas stranga, ke malsperta 18-jara junulo havas egalan voĉon kun patro de 7 gefiloj. La unua ĝenerale havas neniun respondecon, sed la alia zorgas pri estontaj civitanoj», -- diris li. (La citaĵo el aŭstralia gazeto «The Age», January 23 rd, p.8). La ideo konstante renaskiĝas flanke de «mizero, diskriminacio kaj indiferenteco fare de socio al infanoj», aliflanke – pere de neceseco «konstrui mondon, indan por infanoj», kiel konstatis Speciala Sesio de UN pri infanecaj problemoj en 2002, okazinta laŭ iniciato de UNICEF.

La dua Koncepto supozas okazigon de Internacia kompara sociologia esploro pri rilato de loĝantaro en diversaj landoj de la mondo al voĉdonrajto de infanoj. Dum la unua etapo supozeblas esplori rilaton de 1000 gepatroj kaj zorgantoj en kvar grandaj urboj de kvar landoj: du riĉaj (Usono kaj Aŭstralio) kaj du malriĉaj (Rusio kaj Brazilo). (La listo de la landoj eblas ĝustigi). Laŭ la rezultoj de la esploro, se okazos pozitiva rilato de la gepatroj almenaŭ en unu lando al voĉdonrajto de infanoj, estos preparata propono por UNICEF pri *kompletigo* de la Konvencio de UN pri infanaj rajtoj, kaj por *kompletigo* de Ĝenerala Deklaro pri Homaj Rajtoj per speciala artikolo pri voĉdonrajto de infanoj.

Do, niaj Konceptoj sin apogas al taskoj de UNICEF kaj celas al efektiva solvo, kaj unue al metodoj de efektiva *plenumado* de UN-Konvencio pri infanaj rajtoj. Tio estas metodo por enkonduko de voĉdonrajto de infanoj.

Laŭ la formulado, ni petas, ke UNICEF prenis por aŭspicio nian Internacian Sociologian esploron, enmetis ĝin en UNICEF-programon por la proksimaj tri jaroj kaj ekzamenis problemon pri ĝia financado en la unua etapo en la sumo \$ 130 000 (optimuma varianto) aŭ \$ 55 000 (alternativa, minimuma varianto). Krome, ni petas, ke UNICEF donu siajn rekomendojn laŭ ĉiuj aspektoj de la Konceptoj kaj esploroj, speciale pri Demandaro, pri la

landoj-objektoj de la esploro kaj ĝiaj hipotezoj, laŭ la personaro de la esplorantoj kaj pri aldonaj fontoj de la financado.

Kun la profunda estimo, Leo Semaŝko kaj Martha De Witt, la 10-an de februaro, 2004.

2. Infanoj, junularo kaj demokratia voĉdonrajto en la epoko de globalismo

2.1. Koncepto pri voĉdonrajto de infanoj kaj ties socialaj rezultoj

Abstrakto

Nia Koncepto, kiu esprimas¹ ideologion pri voĉdonrajto de infanoj surbaze de postpluralisma tetrasociologia teorio, neniel pretendas plene prezenti la problemojn de infanoj kaj ilia bonstato en la nuntempa globala mondo. Por tio ekzistas internaciaj kaj naciaj informfontoj. Ĝi pretendas prezenti nur unu el la problemoj, kiu estas la plej efika mekanismo por plibonigo de la bonstato kaj solvado de infanproblemoj en la nova jarcento. Ĝi, laŭ nia vidpunkto, estas *voĉdonrajto de infanoj, plenumita de iliaj gepatroj kaj zorgantoj*. La celo de la koncepto estas argumentado de tiu ĉi aserto. En ĝi estas analizataj sociala, politika kaj morala neceseco de voĉdonrajto de infanoj kaj ĝia kunligo kun konstitucia voĉdonrajto ĝenerale. En ĝi estas konturitaj esenca skizo pri la *leĝo* de voĉdonrajto de infanoj, ĝiaj ĉefaj normoj kaj konforma al ili ŝtata mekanismo de unuavica kaj sistema solvo de infanproblemoj. En ĝi montriĝas la spektro de pozitivaj sekvoj el la leĝo por ĉiuj sferoj de la socio kaj ankaŭ realaj socialaj obstakloj, starantaj sur la vojo de ĝia efektivigo. En ĝi estas difinitaj teoriaj, pli ĝuste, tetrasociologiaj bazoj de voĉdonrajto de infanoj kaj estas donitaj iuj statistikaj kaj faktaj ilustraĵoj. En la dua ĝia parto (Koncepto 2) estas difinitaj bazaj parametroj kaj hipotezoj de internacia kompara sociologia esplorado pri rilatoj de gepatroj kaj zorgantoj al tiu ĉi rajto, ĉar ili estos ĉefaj aktantoj (subjektoj) de voĉdonrajto de infanoj.

Bazaj nocioj: voĉdonrajto de infanoj, plenumita fare de iliaj gepatroj kaj zorgantoj; leĝo pri voĉdonrajto de infanoj; voĉdono de infano; voĉdonado de plenaĝuloj por siaj infanoj.

La rolo kaj bonstato de la infanoj en la mondo. UN kaj Konvencio de UN pri infanrajtoj

La rolo de la infanoj en socio estas esprimata de malnova veraĵo: «infanoj estas nia estonto». Kiaj estos niaj gefiloj, tia estos ĉio en la socio: homoj, kulturo, politiko, ekonomiko. Ecoj de la infanoj difinas estontan kvaliton de la socio, ĝiajn homojn, kulturon, politikon kaj ekonomikon. Ĉio elkreskas el la infanoj. Tio estas aksiomo. Ĝi esprimas fundamentan rolon de infanoj por la vivo de estonta socio. Sed estonto naskiĝas kaj formiĝas nuntempe. Ŝajnas, laŭ tiu ĉi logiko, la pozicio kaj bonstato de la infanoj nuntempe devas esti por la socio

¹ «Ideologio» en nia kunteksto estas doktrino pri sociaj idealoj en la kadroj de difinita mondkoncepto. En nia koncepto ni konsideras idealon de voĉdonrajto de infanoj en la kadroj de tetrasociologia mondkoncepto.

unuaranga problemo kaj la plej prioritata tasko. Tamen evidentiĝas, ke la infanoj ne fariĝas la plej unuarangaj taskoj. La infanoj restas flanke de la ŝtatzorgoj kaj ne spertas atenton de la socio. Tion konfirmas la plej aŭtoritataj internaciaj dokumentoj.

Ekzemple, Speciala UN-sesio pri problemoj de infaneco (majo 2002), okazinta laŭ UNICEF-iniciato kaj kunveninta 180 registarojn, konstatis sekvajn malĝojigajn konkludojn. En la fina Deklaro de la Sesio oni antaŭ ĉio rimarkis, ke nuntempaj globalismaj tendencoj rilate ekonomikon alkondukis al «malplibonigo de situacio de juna generacio». Tio reflektiĝis en sekvaj kvantoj: «Ĉiujare mortas pli ol 10 milionoj da infanoj, kvankam plimulto de la mortoj eblas eviti. 100 milionoj da geknaboj ne vizitas lernejojn, 60% nombras knabinoj. 150 milionoj da infanoj suferas pro malsato. AIDOSO disvastiĝas kun katastrofa rapideco». Ĝis nun ni ne povas venki *malriĉecon, diskriminacion kaj indiferentecon de la socio* al infanoj. Investaĵoj al socia asekuro, kiel antaŭe, *ne sufiĉas*. Milionoj da geknaboj daŭre suferas pro ekspluatado de ilia laboro, kiu ofte minacas al ilia sano pro komercado per infanoj kaj adoleskuloj kaj pro aliaj formoj de kruela utiligado, pro malatento, ekspluatado kaj perforto. La Speciala Sesio de UN, konsiderinte la faktojn, alvokis «ĉiujn membrojn de la socio» aliĝi al «la globala movado por kontribuo al konstruado de la mondo, inda por la infanoj»². (Ĉie estas niaj substrektoj. -L.S. kaj M.D.). Sekve, oni nerekte konfesas, ke la mondo, kiu ekzistas, ne indas je infanoj.

Analogia estas situacio pri principo de UN-Konvencio pri infanrajtoj: «la plej bonan estu al la infanoj», kiu signifas, ke ĝis nun la infanoj ricevas tute ne la plej bonan. En tiu ĉi fundamenta internacia dokumento la ĉefa ideo estas proklamo de prioritato de infanoj, iliaj rajtoj por *speciala zorgo*, por *speciala* gardado en *maksimuma* grado, por la plej bona asekuro k.t.p. Jen estas kelkaj citaĵoj el la Konvencio: «La infanoj rajtas havi *specialan* zorgon kaj helpon» (Prefaco). «La infano devas maturiĝi en familia rondo, en la etoso de feliĉo, amo, kaj kompreno» (Prefaco). «La infano, pro sia mensa kaj fizika nematureco bezonas specialan gardadon kaj zorgon, inkluzive *ĝustan rajtan* defendon» (Prefaco). «En ĉiuj agadoj rilate la infanoj... la unuavica atento efektiviĝas por la *plej bona* garantio de porinfanaj interesoj» (Ĉapitro 3.1).

«La ŝtatoj-partoprenantoj uzas tiajn rimedojn (por efektiviĝo de infanrajtoj – L.S. kaj M.D.) en maksimumaj eblecoj de disponeblaj ĉe ili resursoj» (Ĉapitro 4). «*La plej gravaj interesoj de la infanoj* estas objekto de ilia (de gepatroj kaj zorgantoj) ĉefa zorgo» (Ĉapitro 18)³ k.t.p. (ĉie substrekita de ni – L.S. kaj M.D.).

Sed reale la infanoj ofte ne ricevas «plej bonan», «specialan», «maksimuman», sed ili ne ricevas eĉ la plej necesan. Kial ne ekzistas prioritato de infanoj? Kial la problemoj de

² Dum Speciala UN-Sesio mondaj aŭtoritatoj promesas konstrui «mondon, indan de infanoj».

³ UN-Konvencio pri infanrajtoj «Defendu min», Moskvo, 1995

infaneco, okupantaj diversnivelelajn lokojn en diversaj landoj de la nuna mondo, eĉ en la plej riĉaj landoj ne estas unuavicaĵ? Kial dum jarcentoj konserviĝas «mizero, diskriminacio kaj indiferenteco fare de socio al la infanoj»? *Sistema kaŭzo de tio estas aĝa voĉdonrajta censo de la infanoj*, kiu ne permesas al la nuntempa demokratio krei politikan mekanismon, kiu konsiderus problemojn de infaneco. Zorgo, kiun ricevas la infanoj de la familio kaj ŝtato estas vere nesufiĉa por venki «mizeron, diskriminacion kaj indiferentecon de la socio al la infanoj»⁴.

Zorgo pri infanoj fare de familio, socio kaj ŝtato

Kiel atestas statistiko kaj faktoj el malriĉaj kaj riĉaj landoj (vidu sube), la zorgo fare de familio kaj socio kaj ŝtato pri la infanoj (kaj infana sfero) estas nesufiĉa. La infana sfero estas la plej grava parto de sociala sfero, kiu respondecas pri la reproduktado de nova generacio. Ĝi inkludas 20%--35% da loĝantaro antaŭ 18 jaroj (antaŭ plenaĝo) en diversaj landoj de la mondo. Ĝi inkludas ĉiujn faktorojn kaj resursojn de infaneco: familio, naskiĝokvanto/morteco de la infanoj, antaŭlerneja edukado, lerneja klerigado, porinfana sanprotektado, infana libera tempo, infana sporto k.t.p. La infana sfero inkludas koncernajn problemojn de infaneco: antaŭlerneja kaj lerneja edukado kaj klerigado, akuŝologio kaj sanprotektado, naskiĝokvanto/morteco, somera ripozo, libera tempo kaj sporto, orfeco, malzorgateco, senhejmeco, narkoteco, kriminaleco, prostituo, laboro de geknaboj malpliĝaj ol 14 jaroj k.t.p. La problemoj pri infaneco havas tendencon al plimultiĝo kaj streĉiĝo en ĉiuj landoj. Familio kaj ŝtato nuntempe ne kapablas kontentige solvi la problemojn per *malnovaj tradiciaj* rimedoj. En la nuna postindustria mondo multflanke ŝanĝiĝis kaj familio, kaj ŝtato kaj infanoj, sed la metodoj kaj mekanismoj pri la solvado de infanproblemoj, ilia prioritato, restis malnovaj, kiel antaŭ jarcento.

En ŝtataj potencoj la infanoj restas periferie kaj formas grandan politikan «nigran truon». La intereso de la infanoj ne estas prezentitaj en leĝdonantaj organoj per iaj deputitoj, havantaj respondecon pri ili. La infanoj estas protektataj far familioj, kies eblecoj estas tre limigitaj. Tion konfirmas pligrandigo de geknabaj kriminaleco, narkoteco, prostituo, ofteco de malsaniĝoj, senzorgateco k.t.p. La familio ne kapablas solvi la problemojn kaj tio konkludas, ke la infanoj ne havas plenaloran zorgon fare de socio kaj ŝtato. Pro tio la infanoj fakte fariĝas la plej surmarĝena loĝantara grupo, kaj tio kondukas al akumuligo kaj pliakriĝo de socialaj problemoj, malplibonigas kvaliton de la homo kaj loĝantaro. Ju pli surmarĝenaj estas infanoj, ju malpli bona ilia kvalito, des pli surmarĝena la estonto de la ŝtato kaj la homaro. La kvalito de la loĝantaro dependas de la kvalito de edukado, klerigado kaj sanstato de la infanoj. Por la kvalito kreskas respondeco de familio, socio kaj ŝtato. La respondeco de

⁴ Mizero, diskriminacio kaj indiferenteco de industria socio al infanoj genie malkovris J.Korĉak. vd. J.Korĉak Kiel ami «infanon», Moskvo, 1990

la ŝtato tre pligrandiĝas, ĉar ĝi posedas potencajn resursojn por la solvado de la infanproblemoj.

Infanproblemoj: metodoj de ilia solvado fare de la ŝtatoj

La infanproblemoj bedaŭrinde ne okupas unuarangan lokon en ĉiuj nunaj ŝtatoj. Prioritataj problemoj por la ŝtatoj restas tiuj pri ekonomiko kaj armeo. Tia estis strategio de industriaj socioj dum du pasintaj jarcentoj. Tamen en la dua duono de la 20-a jarcento en la plej progresemaĵoj landoj oni proklamis devizon pri «sociala ŝtato», «sociala demokratio», kio signifas starigo de socialaj problemoj sur la unuan lokon. Sed fakte, eĉ en tiuj landoj la situacio restas kiel antaŭe, kaj inter la socialaj problemoj nenie oni agnoskas infanproblemojn kiel la plej gravaj. En la plimulto da landoj la ĉefa maniero de solvado de infanproblemoj estas tradicia mekanismo kiel restaĵo de buĝeta financado. La plej karakteriza ĝi estis por ekssovetiaj landoj kaj precipe por Rusio. Ekonomia prioritato estas strategio je 90% por nuntempo, kiu faras financadon de infansfero nur restaĵa. Kontraŭe, la prioritato de infansfero estas je 90% strategio de estonto. La ŝtatoj preferas strategion de nuntempo, sed ne estonto. Tio kondukas al pliigo de infanproblemoj kaj al krizo de socio. Nuntempa ŝtato ne havas efektivajn rimedojn por solvado de infanproblemoj. Ĝiaj fortoj direktiĝas al postsekvoj, sed ne al kaŭzoj de infanproblemoj. Kial firmiĝis tia strategio? Pro tio, ke en demokratia balotrajto heredita de ni fare de industria socio, estas esenca difekto. En la prezentata de ni koncepto estas argumentata la tezo, ke efektiva maniero por venki la difekton kaj efektiva ilo de ŝtata solvado de infanproblemoj estas *voĉdonrajto de la infanoj, plenumita de la gepatroj aŭ zorgantoj*. Tiu rajto kaj ĝia realigo garantios legitiman unuavican financadon de infansferoj, direktos streĉojn de demokratia ŝtato por la kialoj sed ne postsekvoj de la infanproblemoj. Tio faras prioritata por la ŝtato longdaŭran strategion de estonto.

Genezo de voĉdonrajto. Aĝa censo estas speco de rasismo kaj politika kaŭzo de «mizero, diskriminacio kaj indiferenteco far socio al infanoj»

Historio de balotrajto estas malintensa: unue la balotrajton ricevis riĉaj plenaĝaj viroj, pli poste – ĉiuj plenaĝaj viroj, poste – virinoj kaj fine – junularo ekde 18 jaroj. Nuntempa balotrajto estis akirita de ni kiel heredaĵo de forpasanta industria socio. Ĝia balotrajto dum la tempo je pli ol du jarcentoj iom-post-iom liberiĝis de multnombraj censoj: rasaj, havaĵaj, genderaj k.a. Konservigis senŝanĝe nur la lasta – aĝa censo. En la «nigra truo» de balotrajto restis geknaboj malpliaĝaj ol 18-jaraj, el kiuj konsistas averaĝe ĉirkaŭ kvarono da loĝantaro. «La nigra truo» en balotrajto generas «nigran truon» de politiko kaj ŝtato. Pro tio rilate la infanojn restas indigniga maljusteco kaj diskriminacio. Fariĝante ŝtatcivitano ekde sia naskiĝo, la infano fariĝos voĉdonanto nur post 17 jaroj, kvazaŭ ĉiujn antaŭajn jarojn la infanoj loĝas ekster socio, kvazaŭ ili ne estas ĝiaj membroj, ne havas, problemojn kaj

bezonojn kaj per nenio utila estas okupitaj. Sed vere ili estas okupitaj per la plej grava afero: ili reproduktas sin mem kiel la ĉefa homa resurso de la lando kiu produktos *ĉiujn* landajn resursojn, de kiuj dependas la *tuta* landa estonto. Kial do la infanintereso ne estas prezentataj en leĝdonantaj organoj de demokratiaj ŝtatoj per speciale de la nomo de infanoj elektitaj deputitoj? Kial estas prezentitaj interesoj de ĉiuj loĝantaraj grupoj, sed infanaj interesoj ne estas prezentitaj kaj fakte eliminitaj ĝenerale el politiko? Kiel tion klarigi kaj pravigi? Tion eblas klarigi per profundigita balota tradicio, restinta de postindustria socio, kiu permesas *nur* rektan kaj unusolan balotadon: ĉiu plenrajta civitano rajtas havi nur *UNU* voĉon, voĉdonas nur mem sola, sed ne anstataŭ iu alia. Tia estis *ĉefa balota principo de nuntempa demokratio*, aperinta en industria socio. Laŭ unua supraĵa rigardo ĝi ŝajnas tute justa. Tamen, ĉe pli profunda analizo evidentiĝas, ke ĝi estas justa *nur* por plenaĝuloj kaj estas maljusta por infanoj. Laŭ tiu vidpunkto la infanoj ne estas plenrajtaj kaj ili ne kapablas fari konscian politikan elekton pro sia aĝo (tio estas justa kaj ne provokas kontraŭstarojn), sed al iu alia estas *malpermesite* fari anstataŭ ili politikan elekton. Ĉi tio estas *maljusta!* Ĝuste tiu *politika* malpermeso naskas balotan diskriminacion de infanoj kaj pravigas maljustecon rilate ilin. Tiu maljusteco, heredita de ni de post la industria socio⁵, *kontraŭas* al sociala funkcion de infanoj. Ĝi formas pezan politikan heredaĵon, kiu eblas konsideri kiel *specon de rasismo*, kiun eblas nomi generacia kaj kiu limigas nuntempan demokration, ĝian modernigon, kaj ne respondas al la postuloj de informeca socio. *Pro tio, aĝa balota censo, kiu senigas la infanojn havi balotrajton, kiu malpermesas al iliaj gepatroj/zorgantoj plenumi ĝin (t.e. voĉdoni por ili), kaj pro tio estante la ĉefa kaŭzo de «mizero kaj diskriminacio» de la infanoj, devas esti aboliciita kaj devas esti leĝe konfirmita ilia voĉdonrajto.*

Sociala, politika kaj morala neceseco de voĉdonrajto de infanoj

La infanoj estas membroj de socio kaj ŝtatacivitanoj ekde momento de la naskiĝo. Ili, same kiel plenaĝuloj, havas realajn bezonojn kaj vastan rondon de ĉiutagaj okupoj kaj problemoj. Ili sin okupas per tre grava afero por la socio: ili reproduktas sin mem kiel ĉefan socialan resurson. Ili socialigas sin. Tiu ĉi okupo ne malpli gravas, ol ajna alia utila okupo por la socio. Eĉ plie, socialigo de la infanoj, de la maturiĝanta generacio, estas la plej grava por la

⁵ Necesas rimarki, ke en la epoko de industria socio estis provoj politike konsideri infanajn interesojn per censoj de voĉdonrajto. Ekzemple, granda rusa sciencisto D.Mendelejev proponis en 1905 enkonduki por la deputitoj de ŝtata Parlamento (Dumo) kaj iliaj elektantoj «patran aŭ infanan» censon anstataŭ tiuj de posedaja kaj kleriga. Le senco de censo estus en tio, ke «elektantoj kaj duono de elektataj deputitoj estu patroj, havantaj difinitan minimumon da gefiloj», nome 3-4 gefiloj. La infana censo, laŭ opinio de Mendelejev, garantios altan kvaliton de deputitoj kaj subigos ilian agadon al interesoj de estonto. Vd.: Mendelejev D. «Infanaj pensoj», Moskvo, 1995, p.344.

En nuna tempo, 22-an de januaro, 2004, Belga kardinalo Gustaaf Joos primokas balotan principon: unu homo – unu voĉo. «Mi opinias stranga, ke nematura 18-aĝa junulo havas tian saman voĉon, kiel patro de sep gefiloj. La unua havas neniun respondecon, sed la alia zorgas pri estontaj civitanoj», -- diris li. Tiun mirindan citaĵon el aŭstralia tagjurnalo «The Age», 23-an de Januaro, 2004, p.8, sendis al ni aŭstralianino Hilarie Roseman, nia kolego. Grandan dankon al ŝi!

socio vivfonto, de kiu dependas ĝia estonto kaj ĝia kvalito. La procezo de socialigo estas tre komplika kaj peza por ĉiuj infanoj. Socialigo de la infanoj bezonatas ne nur al la infanoj mem, sed ĝi bezonatas al plenaĝuloj kaj al socio entute. Tial la socio devas uzi ĉiujn eblecojn por fari la procezon de socialigo efektiva. Se la socialigo postulas efektivan politikan instrumenton, kiu estas voĉdonrajto de infanoj, do la socio devas enkonduki ĝin en sian politikan mekanismon. Tia estas sociala neceseco de voĉdonrajto de infanoj.

Ĝia politika neceseco estas en tio, ke la politika mekanismo de demokratia ŝtato estas neefektiva kaj riproĉhava sen voĉdonrajto de infanoj, sen inkludo en la voĉdonrajton ĉirkaŭ kvaronon da loĝantaro. Demokratio estas evoluita tiomgrade, kiomgrade estas evoluita balotrajto de la civitanoj. Balotrajto – tio estas komenco kaj fonto de demokratio, tio estas eniro en ĝin, de kies kvalito kaj vasteco dependas kvalito kaj vasteco de demokratio. Nuntempa balotrajto estas limigita fare de plenaĝuloj kaj ne inkludas geknabojn malpli aĝaj ol 18 jaroj, kiuj konsistigas ĉirkaŭ 25% da loĝantaro. Pro tio nuntempa demokratio, je la vidpunkto de balotrajto, estas evoluigita nur je 75%. Balotrajto estas ĉefa fonto de formado de ŝtatpotenco en demokratia ŝtato. Se tiu ĉi fonto estas fermita je kvarono kaj la popolo – potencfonto – «mallongigita» je kvarono, tiam la kvalito de demokratia potenco signife pli malmulta kompare kun ebla pleneco.

La vivo de infanoj, same kiel la vivo de plenaĝuloj, formas siajn specialajn vivinteresojn, kiuj devas esti prezentitaj *politike* ne malpli ol interesoj de plenaĝuloj. Tial la infanoj havas, fakte, egalrajton kompare kun plenaĝuloj, por partopreno en balotado kaj referendumoj. Laŭleĝa certigo de voĉdonrajto de infanoj havas grandegan politikan signifon, plivastigas kaj pliprofundigas demokration, aldonas al ĝi bonkoran infanan aspekton. Per voĉdonrajto de infanoj demokratio plivastigas sian fonton – popolon – ĝis la kvanto de loĝantoj. Demokratio, ne malpli ol infanoj, bezonas ilian voĉdonrajton. Nur tiel ĝi povas ankoraŭfoje konfirmi sian vivkapablon kaj pruvi al siaj samtempuloj, ke malgraŭ sia neperfekteco, pli bonan ol ĝi dume nenio estas elpensita, kiel diris W.Churchill. Tia estas ĝenerala politika neceseco pri voĉdonrajto de infanoj. Ĝi postulas konvenan plivastigon de ĉefa balota principo. Por tio necesas kompletigi la rektan (por si mem) kaj unusolan (ne por iu ajn) voĉdonadon per *malrekta (ne nur por si mem)* kaj *plurnombran (por siaj gefiloj)*. Ĝuste tiamaniere, pro la nombro de infanoj, *disvastiĝas* la ĉefa balota principo. Nur per la enkonduko de voĉdonrajto de infanoj, plenumata de iliaj gepatroj kaj zorgantoj, la infanproblemoj povas esti atingataj al politika nivelo, trovi tie konstantan politikan volon kaj sisteman mekanismon de la solvado. Aliflanke, el ĉiuj eblaj ŝanĝoj de demokratio, ĝia transformigo pere de voĉdonrajto de infanoj estas la plej profunda, humana kaj sociale efektiva.

Krome, voĉdonrajto de infanoj havas moralan—psikologian necesecon, kiu troviĝas en la bazo de la du antaŭaj. Supre estis dirite pri la sociala *maljusteco* de la ĉefa principo de nuntempa demokratio, kiu plene eliminis infanojn el la politiko. Estas konate, ke la infanoj pro sia aĝo ne povas mem politike defendi siajn vivinteresojn. Tiu eco permesas al plenaĝuloj elimini infaninteresojn el balota sistemo de demokratia ŝtato kaj ne doni al infanoj voĉdonrajton. Tamen la nekapableco de la infanoj politike esprimi siajn interesojn ne povas senigi ilin je voĉdonrajto. Ĉu estas juste ne doni al la infanoj tiun rajton nur pro tio, ke ili ne kapablas esprimi siajn interesojn? Se la infanoj havas ne malpli gravajn problemojn kaj interesojn ol plenaĝuloj, tiam laŭ logiko de justeco plenaĝuloj devas ne *elimini* sed *inkludi* infaninteresojn en politikan sferon, ne *malhavigi* sed doni al infanoj voĉdonrajton. Laŭ la sama logiko plenaĝuloj *devas ne malhelpi* sed *helpi* al infanoj partopreni balotan procezon, alprenante al si, kiel al gepatroj kaj zorgantoj, direktadon de infaninteresoj je formo de *elekto* de indaj deputitoj, kiuj defendos infaninteresojn en leĝorganoj de ŝtatoj. Helpo al infanoj estas morala kaj psikologia devo de plenaĝuloj kaj precipe de gepatroj kaj zorgantoj. Kio *malhelpas* al ili *plenumi* ĝin? La plenumado ne postulas de la gepatroj ion eksterordinaran, iujn grandegajn elspezojn de la tempo, fortoj, rimedoj k.t.p. Sekve ĝi havas neniujn specialajn barojn. Eĉ plie, ĝia plenumado estas postulo de nuntempo pro malbonigo de kvalito kaj bonstato de infanoj. Tia estas morala neceseco de voĉdonrajto de infanoj. La plenumado de plenaĝuloj voĉdonrajton de infanoj estas indico de kreskanta devo antaŭ la infanoj kaj respondeco pri ili, kiujn postulas nuna tempo. Tio estas ankaŭ indico de kreskanta *konscienco* de la gepatroj. Kiu generacio de gepatroj ekkonscios sian kreskantan devon kaj respondecon pri infanoj? Kiu generacio ekkomprenos, ke ilia plenumado de voĉdonrajto por siaj infanoj ne kontraŭas al ilia amo al la infanoj, sed male, plifirmigas kaj pliriĉigas ĝin per nova kaj grava aspekto? Per sia esplorado la aŭtoro esperas konfirmi la hipotezon, ke jam nuntempa generacio de junaj gepatroj pretas al la nova respondeco por siaj gefiloj.

Voĉdonrajto de infanoj kiel postulo de globalismo

Voĉdonrajto de infanoj fariĝas postulo de globalismo kaj de kvalite nova postindustria aŭ informplena mondo. Movado de globala mondo al sociala harmonio kaj egaleco, venko de maljustaĵoj en la procezo de globaligo maleblas sen sistema politika konsiderado de interesoj de infanoj, kiuj konsistigas ĉirkaŭ kvaronon de la homaro. Globaligo de ekonomiko, politiko, scienco, klerigado, informa revolucio, akcelo de vivritmoj, transiro de rajta demokratio al tiu de sociala, pligrandigo de junularaj problemoj kaj de novaj familioj, plialtigo de kleriga rolo, starigo de sociala al prioritata loko, plifortigo de civitana socio, ŝanĝo de globalaj strategiaj interesoj el malpaco al kunlaboro – tiuj kaj multaj aliaj faktoroj postulas disvastigon de balotrajto por infanoj. Nur pere de la voĉdonrajto de infanoj eblas sistema politika

prikalkulado de infaninteresoj en la globaliga mondo. Pro tio la rajto, se ĝi estos aprobita fare de plenaĝuloj kaj donacita de ili al siaj gefiloj kaj genepoj, devas esti certigita per UN—Konvencio pri voĉdonrajto de infanoj kaj per konvenaj leĝoj en la ŝtatoj de la mondo.

La infanproblemoj estas ne nur naciaj kaj popolaj problemoj, sed ili estas mondproblemoj entute, sekve, ili estas problemoj de globaligo. La estonto de globaligo, ĝia eco kaj grado de justeco elmontriĝas pere de kvalito de infanoj surbaze de ricevita de ili klerigado, sanstato, mondkoncepto kaj bonstato. Voĉdonrajto de infanoj estas unu el la efektivaj vojoj por atingi altan nivelon de ilia klerigado, sanstato, mondkoncepto kaj bonstato. Ĝi ankaŭ estas maniero por konstruktiva solvado de infanproblemoj. Voĉdonrajto de infanoj estas postulo de globalismo, plialtigo de ĝia justeco kaj egaleco por la infanoj precipe kaj ankaŭ por sia estonto. Ĝi estas postulo de nova demokratio, kiu povas fariĝi vere sociala nur en tutmonda grado, pri kio atestas mondaj torentoj de enmigrado. Justa globaligo maleblas sen establigo de unuecaj altnivelaj kondiĉoj por evoluo de infanoj en la tuta mondo, kiu kreas voĉdonrajto de infanoj. Hodiaŭ malfacilas konfirmi, ĉu pli multon bonan aŭ malbonan donas la globaligo al la infanoj kaj ĉu ĝi donas al ili la plej bonan, kiel postulas UN—Konvencio pri infanrajtoj, kvankam evidentiĝas plivastigo de abismo inter la riĉuloj kaj malriĉuloj. Voĉdonrajto de infanoj kapablas, almenaŭ iomete malpliigi la abismon por la infanoj de la mondo kaj garantii al ili pli indan etoson. Aldonante al la globalismo kaj demokratio infanan dimension, ĝi anstataŭas ĝian oligarĥian vizaĝon per bonkora homa vizaĝo. *La globaliga mondo kaj globala demokratio postulas de la nova balotrajto novan balotsistemon, liberan de ajnaj censoj, inkluzive la aĝan.* Ne ekskluzivas la varianto, kiam nur sur globala nivelo la infaninteresoj povas esti plenumitaj kiel la plej gravaj. La tempo montros, kiu nivelo, ĉu la globala, ĉu la lokala estos pli sentema al la infaninteresoj, al ilia voĉdonrajto, kaj de kiu nivelo oni komencos ekkonduki ĝin.

Voĉdonrajto de infanoj. Konstitucio kaj balota statuto

(Laŭ la ekzemplo de Rusio. Aparte por aliaj landoj)

Por la sorto de voĉdonrajto de infanoj grandan signifon havas tiaj juraj faktoroj, kiel Konstitucio kaj Balota leĝdonado. Klaras, se la socio kaj ĝiaj ŝtataj institucioj *agnoskos* socialan, politikan kaj morale psikologian necescon pri voĉdonrajto de infanoj, kaj trovos necesa oficialigi ĝin jure, tiam ne fariĝos nevenkebla problemo pri konforma ŝanĝo kaj kompletigo de Konstitucio kaj balota leĝdonado. Sed antaŭ ol starigi tiun ĉi demandon, necesas dekomence esplori, ĉu Konstitucio de konvena lando malakceptas voĉdonrajton de infanoj kaj kiomgrade kategorie estas formulita aĝa censo en balotrajto. Konsideru de tiu ĉi vidpunkto konvenajn jurajn dokumentojn de Rusio.

Laŭ la Rusia Konstitucio la infanoj estas ŝtataĉanoj, rilate kiujn oni agnoskas «ĉefajn homajn rajtojn kaj liberecojn... de la naskiĝo»⁶. Inter tiuj rajtoj estas «la rajto elekti»⁷. (La leĝo pri civitaneco ankaŭ agnoskas infanojn kiel la civitanojn de Rusio ekde la naskiĝo⁸). En la Konstitucio voĉdonrajto ne limiĝas per iu-ajn aĝa censo. Tial la infanoj ne estas senigitaj je voĉdonrajto per la Konstitucio, en ĝi forestas tia *malpermeso*. Pro tio en Rusio ne ekzistas Konstitucia obstaklo al voĉdonrajto de infanoj kaj al akcepto de konvena federala leĝo. Por ĝi ne estas postulata ŝanĝo de la rusia Konstitucio.

Tamen, en la valida Federala balota leĝo⁹ estas enkondukita aĝa censo – aĝa limigo de balota rajto. La censo kontraŭas al la Konstitucio, kiu agnoskas balotrajton de la civitanoj ekde la naskiĝo, kaj ĝi kontraŭas al la determino de civitaneco en la leĝo pri civitaneco, kaj al la determino de bazaj nocioj en la balota leĝaro mem. Ni konsideru la determinojn kaj notu iliajn koliziojn.

«Voĉdonanto – tio estas civitano de Rusia Federacio, havanta aktivan voĉdonrajton»¹⁰. Tamen oni fariĝas civitanoj ekde la *naskiĝtago*, sekve la infanoj ankaŭ posedas aktivan voĉdonrajton, tio estas, ke ili devas esti voĉdonantoj, sed ili ne havas la permeson.

«Aktiva voĉdonrajto – estas rajto de la civitanoj de Rusia Federacio elekti organojn de ŝtata potenco kaj municipa memregado»¹¹. Sekve la infanoj posedas tiun rajton.

«Pasiva voĉdonrajto – tio estas rajto de la civitanoj de Rusia Federacio esti elektitaj en ŝtatorganojn kaj municipajn organojn»¹². Ĉu infanoj ankaŭ povas esti elektitaj?

«Voĉdonrajto de civitanoj – konstitucia rajto de civitanoj de Rusia Federacio baloti kaj esti elektitaj en ŝtatorganojn kaj municipajn organojn»¹³... La infanoj estas civitanoj, sekve ili havas ĉiujn balotrajtojn.

«La civitanoj de Rusia Federacio partoprenas la balotojn surbaze de universala, egala kaj rekta voĉdonrajto ĉe sekreta elektado»¹⁴. La infanoj estas civitanoj, sekve ili devas partopreni la balotojn.

«Universala balotrajto kaj rajto partopreni referendumon: La civitano de Rusia Federacio, kiu atingis aĝon 18 jarojn, rajtas elekti, voĉdoni en referendumoj...»¹⁵. *Jen estas*

⁶ Konstitucio de Rusia Federacio, Paragrafo 17.2

⁷ La sama fonto. Paragrafo 32.2.

⁸ Federala Leĝo de RF, 31-an de majo, 2002 «Pri civitaneco de RF: Paragrafo 12. Akiro de civitaneco de RF laŭ la naskiĝo, se en la **tago de naskiĝo de infano** (substrekite de ni – L.S.):

a) ambaŭ gepatroj aŭ unusola el liaj gepatroj havas civitanecan de RF (sendepende de la naskiĝloko de infano);

b) unu el la gepatroj havas civitanecan de RF...

⁹ Federala leĝo de RF, 12 de junio, 2002, N 67-Φ3. «Pri ĉefaj garantioj de voĉdonrajtoj kaj de rajtoj partopreni referendumon de RF-civitanoj»

¹⁰ La sama fonto. Paragrafo 2.18.

¹¹ La sama fonto. Paragrafo 2.26.

¹² La sama fonto. Paragrafo 2. 27.

¹³ La sama fonto. Paragrafo 2. 28.

¹⁴ La sama fonto. Paragrafo 3.1.

¹⁵ La sama fonto. Paragrafo 4.1.

aĝa censo! Universala balotrajto estas ne universala, sed limigita per civitanoj, kiuj atingis 18 jarojn.

«Ne havas rajton elekti kaj esti elektitaj, partopreni referendumon civitanoj, kiuj estas anoncitaj jure nekapablaj aŭ malliberigitaj laŭ juĝverdikto»¹⁶. Civitanoj, ne atingitaj 18 jarojn, ne trafis en tiun registron. Tio kontraŭas la antaŭan paragrafon.

«Egala balotrajto kaj rajto partopreni referendumon: 1. La civitanoj de Rusia Federacio partoprenas balotojn kaj referendumon egalrajte. 2. Se por balotoj en leĝdonantan (reprezentantan) organon de ŝtatpotenco aŭ en reprezentan organon de municipa memregado estas formataj elektaj distriktoj kun malsama mandatkvanto, ĉiu voĉdonanto havas egalan kvanton da voĉoj»¹⁷. La infanoj estas civitanoj de Rusio, sekve ili devas partopreni en balotoj kaj referendumoj egale kun aliaj plenaĝaj civitanoj, kiuj jam havas 18 jarojn.

«Rekta balotrajto, rajto por rekta libervola elmonro en referendumo: La civitano de Rusia Federacio voĉdonas en balotoj kaj referendumoj respektive por kandidato (listo de kandidatoj) aŭ kontraŭ ĉiuj kandidatoj (kontraŭ ĉiuj listoj de kandidatoj), por metita al referendumo demando aŭ senpere kontraŭ ĝi»¹⁸. Sekve la infanoj, kiel civitanoj, same devas voĉdoni mem, rekte.

«Sekreta voĉdonado: Voĉdonado en balotoj kaj referendumoj estas sekreta, esceptanta eblecon de iu ajn kontrolo por libervola elmonro de la civitano»¹⁹. Sekve, voĉdonado de infanoj, kiel civitanoj, esceptas kontrolon por ilia libervolo.

Ni faru mallongan resumon analizante paragrafojn de balotleĝo, koncerne aĝan censon. Kiel ni vidas, la leĝo enhavas en si amason de juraj kontraŭdiroj kaj sensencaĵoj koncerne infanojn. Laŭ la enhavo tiu leĝo, kiu senigas la infanojn voĉdoni laŭ aĝo, povas esti kvalifikita kiel *politika diskriminacio de infanoj kaj malfirmo de Rusia Konstitucio*. La Balota leĝo *ne solvas* bazan realan kontraŭdiron inter la *civitaneco de infanoj* kaj malebleco *plenumadi de ili* sian voĉdonrajton, kiu apartenas al ili kiel al la civitanoj denaske. Tiu leĝo nur implikas la kontraŭdiron. Por ĝia solvo estas nur unu maniero: pro la malkapableco de infanoj akcepti decidon kaj elekti memstare *ilia voĉdonrajto kaj ĝia plenumado* devas esti *dividitaj*. La rajto apartenas al la infanoj, sed ĝian plenumadon necesas komisi al iliaj gepatroj kaj zorgantoj. Sed tiucele la gepatroj, zorgantoj, ŝtatoj kaj socioj devas havi moralan kaj politikan *volon superi* balotan diskriminacion de infanoj, *agnoski* voĉdonrajton de infanoj kaj *starigi* ĝin kiel unu el la ĉefaj homaj rajtoj, apartenanta al ili denaske kaj ne forprenata de ili.

¹⁶ La sama fonto. Paragrafo 4.3.

¹⁷ La sama fonto. Paragrafo 5.1, 5.2.

¹⁸ La sama fonto. Paragrafo 6.

¹⁹ La sama fonto. Paragrafo 7.

Por plifirmigi tiun volon, se ĝi ekzistas, kaj por disdividi voĉdonrajton de infanoj kaj ĝian plenumadon bezonatas speciala Federala leĝo, kiun ni nomos «Leĝo pri voĉdonrajto de infanoj». La valida balota leĝo devos esti akordigita kun la nomita leĝo: el ĝi necesas forigi aĝan censon kaj konfirmi la principon: «ĉiu civitano ekde sia naskiĝo posedas rajton baloti (rajton havi voĉon), kiu antaŭ 18-jariĝo plenumiĝas pere de la gepatroj/ (zorgantoj) de la infanoj».

Ni konsideru pli detale le ĉefan enhavon kaj la destinon de la nova leĝo.

Jura mekanismo por realigi voĉdonrajton de infanoj

Jura institucio por voĉdonrajto de infanoj estos Federala «Leĝo pri voĉdonrajto de infanoj» (LVI). La leĝo fariĝos jura mekanismo por realigo de la rajto. La problemo estas – kiam estos akceptita LVI? En diversaj landoj ĝi estos solvita malsame. Ie oni akceptos ĝin pli frue, ie – pli malfrue. Sed ajneokaze la komenco de ĝia akceptado en ajna lando estos prilaborado de ĝia koncepto, analogia al la koncepto, donita de ni, kaj anketado de loĝantaro, antaŭ ĉio de gepatroj/zorgantoj. Ni difinu la sencon, la ĉefajn principojn kaj nociojn de LVI.

Politika senco (destino) de LVI estas formado de stabila parlamenta plimulto (pli ol 50% de deputitoj) sur ĉiuj niveloj de leĝdonanta potenco de demokratia ŝtato. La plimulto enhavas ĉirkaŭ 25% da deputitoj, elektitaj de infanaj voĉoj kaj pli ol 25% da deputitoj, elektitaj de la gepatroj/zorgantoj. Nomu tiujn deputitojn, kiuj estas elektitaj de la infanaj voĉoj kaj la gepatroj/zorgantoj kaj prezentas iliajn interesojn en parlamento, «infanaj (aŭ junularaj) deputitoj». Sekve, la infanoj kaj iliaj gepatroj/zorgantoj formas *socialan apogilon* de la parlamenta plimulto, kiun *povas krei* LVI. (Ni rimarku, ke la sociala apogilo estas *ĝenerala kaj konstanta* por ĉiuj landoj de la mondo, riĉaj kaj malriĉaj, ĉar ĝi konsistigas parton de *ĝeneralaj kaj konstantaj* aferaj klasoj de la loĝantaro, pri kiuj vidu sube). La tasko de la infanaj deputitoj, konformaj frakcioj kaj komitatoj en leĝdonantaj ĉiunivelaj organoj estas kreado de konstanta kaj efektiva ŝtata sistemo por solvado de infanproblemoj, tio estas forigo aŭ limigo de socialaj kaŭzoj, kiuj faras la problemojn. *La ĉefaj principoj kaj nocioj de LVI:*

1. «Ĉefa principo de voĉdonrajto de infanoj»: *ĉiu infano ricevas balotan voĉon* (aŭ voĉon por referendumo), *kiu plenumiĝas per unu el liaj gepatroj aŭ zorgantoj*. La principo esprimas disdividon de voĉdonrajto de infanoj je du partojn: a) *rajto por voĉo/elekto*, b) *rajto por baloto/elektado*, tio estas *plenumado* de la rajto partopreni en balotoj, en voĉdonado. Tio estas bifurkacio, disdivido de abstrakta rajto kaj ĝia reala plenumo. La principo konfirmas egalecon kaj gravecon de infaninteresoj en la socio, donante al ili rajton pri voĉo, sed ne rajton voĉdoni, kiun ili ne povas havi pro sia aĝa nekapableco.

2. «Ĝenerala balotrajto, balotrajto de infanoj, balotrajto de plenaĝuloj, balotrajto de plenaĝuloj por siaj gefiloj» -- estas kvar diversaj, sed interligitaj nocioj. Balotrajto de

plenaĝuloj estas rajto de la civitano ekde 18 jaroj voĉdoni por si, esti *memstara* elektanto. Balotrajto de plenaĝuloj por siaj gefiloj estas rajto de la civitanoj ekde 18 jaroj voĉdoni por siaj gefiloj. Balotrajto de infanoj estas rajto de civitanoj antaŭ 18 jaroj havi balotvoĉon kaj esti ne memstara elektanto. Ĝenerala balotrajto estas rajto de la tuta loĝantaro, enhavanta kaj rajtojn kaj voĉojn. Ĝi ne allasas voĉdonadon de la civitano por aliaj personoj, *krom* voĉdonadon por siaj gefiloj ne havantaj aĝon 18 jarojn.

3. «Memstara elektanto» -- tio estas plenaĝa jure kapabla civitano, havanta rajtojn voĉdoni por si kaj por siaj gefiloj. «Nememstara elektanto» - tio estas infano, havanta balotan voĉon, enmetita en la liston de elektantoj, sed ne havanta rajton voĉdoni mem. La rajto por li estas plenumata de unu el liaj gepatroj aŭ zorgantoj. Ĉe iuj kondiĉoj ne memstara elektanto povas fariĝi memstara. En LVI devas esti akceptita normo, ke speciala komisiono povas ekskluzive permesi al talentaj geknaboj de 10 ĝis 18 jaroj voĉdoni memstare laŭ ilia deziro post koncerna ekzameno aŭ testo.

4. «Voĉdonrajto de geknaboj/ de infano» estas rajto elekti por geknaboj/ por infano en la aĝo antaŭ 18 jaroj, kiu esprimas, ke infano posedas elektan voĉon (aŭ voĉon por referendumo). La voĉdonrajto de infanoj *povas esti nur aktiva*, sed ne pasiva, kio signifas ke la infanoj havas nur rajton elekti, sed *ne havas* rajton esti elektitaj pro sia nekapableco. Per tio la voĉdonrajto de infanoj diferenciĝas de la voĉdonrajto de plenaĝuloj (pri la aliaj distingoj vidu sube). La voĉdonrajto estas donita al *ĉiu* infano ekde ĝia naskiĝo, sendepende de ĝia sanstato, loĝloko, loĝkondiĉo. Tiel la voĉdonrajto estas *ĝenerala* por la infanoj. Ĝia enkonduko faras la voĉdonrajton vere ĝenerala, enhavanta la tutan loĝantaron, krom jure nekapabla parto de plenaĝuloj, tio estas ke la elektantaro ĉikaze preskaŭ egalus la nombron de la loĝantaro.

5. «Potenciala kaj aktuala voĉdonrajto de infanoj» estas determinita de LVI en tiaj landoj, kiuj uzos ĝin kiel ilo por limigi naskiĝokvanton kaj stabiligi kvanton de loĝantaro. Por tio en LVI oni enkondukas respektivajn normojn, limigitajn kvanton de infanoj, por kiuj unu el la gepatroj povas voĉdoni. Tio difinas aktualan voĉdonrajton de infanoj. Potenciala voĉdonrajto koncernas ĉiujn infanojn, sed la aktuala koncernas nur limigitan kvanton de infanoj, por kiuj leĝo permesas al plenaĝuloj voĉdoni. Parto de la infanoj en tiuj landoj ne estos enmetita en la liston de elektantoj, ne ricevos aktualan voĉdonrajton. Ĉe iuj difinitivaj kondiĉoj, ekzemple, pro la morto aŭ naskiĝo de la infanoj, ilia potenciala kaj aktuala rajtoj povas transiri unu en la alian. Kontraŭe, por stimuli naskiĝojn oni ne starigas limigon por la kvanto de infanoj, kaj la diferenco inter la aktuala kaj potenciala rajtoj oni ne enkondukas en la leĝon.

6. «Balotrajto de plenaĝuloj koncerne de siaj gefiloj» - tio estas rajto de gepatroj/zorgantoj plenumi voĉdonrajton de siaj gefiloj. Tiu rajto esprimas provizon al jure kapablaj gepatroj/zorgantoj havi difinitan kvanton de elektaj voĉoj, egalan al la kvanto de iliaj gefiloj (se leĝo ne limigas ilian kvanton). Tiu rajto faras voĉdonrajton de plenaĝuloj koncerne de siaj gefiloj *nerekta*, neegala (pro la kvanto de gefiloj) kaj ne senpera, sed ĝi lasas la voĉdonrajton de plenaĝuloj mem *rekta* kaj *senpera*. Tial ĝenerala balotrajto konservas nur du difinojn: universala kaj sekreta. Se infano estas orfo, ne havas la gepatrojn aŭ ili estas senigitaj pri gepatraj rajtoj, al la infano estas difinita zorganto, kiu estas komisiita plenumi voĉdonrajton de la infano. Plenaĝaj geedzoj, havantaj gefilojn, memstare decidis kiel (laŭvice aŭ konstante, egalparte aŭ ne) ili plenumos voĉdonrajton de siaj gefiloj. Konvenan decidon, kiu ajnamomente eblos ŝanĝi, la geedzoj dokumentigas skribe, certigas ĉe notario kaj fordonas en lokan elektan komisionon. Se unu el la gepatroj ne atingis 18 jarojn, lia balotrajto koncerne liajn gefilojn transdoniĝas al liaj gepatroj/zorgantoj.

7. «Devo de gepatroj/zorgantoj plenumi voĉdonrajton de siaj gefiloj» esprimas ne nur rajton, sed ankaŭ *devon* de gepatroj/zorgantoj voĉdoni por siaj gefiloj. Neniu krom gepatroj/zorgantoj pli bone scias interesojn de siaj gefiloj. Neniu povos pli bone fari la plej bonan elekton de deputito por intereso de sia infano. Delikto de tiu devo pro ĝia sociala signifo, altiras administran punon, monpunon, escepte pardoneblaj kaŭzoj. La listo de la pardoneblaj kaŭzoj kaj sumo de la monpuno estas difinitaj fare de leĝo. En tiu parto ĝenerala balotrajto fariĝas ne libervola, sed deviga, kaŭze de la prioritata signifo de infanintereso en la socio. Aliflanke, por stimuli gepatrojn/zorgantojn, estus utili antaŭvidi en la leĝo iujn rimedojn por premio, ekzemple, enkonduki por ili iujn laborajn kaj impostajn rabatojn, enkonduki negrandan pagon por la plenumo de tiu devo k.t.p.

8. «Ĉefaj plenumantoj (subjektoj) de voĉdonrajto de infanoj» - tio estas gepatroj/zorgantoj de infanoj. Gepatroj/zorgantoj estas la plej aktiva parto de loĝantaro, kies aĝoj plejparte estas 18-60 jaroj, sed kies la ĉefa tavolo konsistas el 18-35-jara junularo. En tiu aĝo plejparto da homoj kreas familiojn, naskas gefilojn kaj edukas ilin dum la plej fruaj, la plej gravaj stadioj de la evoluo. Pro tio LVI konformas al la intereso de junularo, de ĉiuj gepatroj/zorgantoj, tamen ĝi ŝarĝas ilin plenumi koncernan devon. Sen aktiva subteno de voĉdonrajto de infanoj kaj ĝia plenumado dum ĉiuj balotoj kaj referendumoj, ĝi restos morta kaj ne povos ekzisti. Pro tio la ĉefaj subjektoj de voĉdonrajto de infanoj estas gepatroj/zorgantoj. Pro ilia volo, respondeco kaj emocioj pri la sorto de siaj gefiloj, pro ilia preteco plenumi voĉdonrajton de infanoj dependas ĝia estonto. Se la gepatroj/zorgantoj ne bezonas voĉdonrajton de infanoj, ĝin ne bezonos la aliaj personoj. La gepatroj/zorgantoj estas ĝia politika kaj jura figuro duaspekte: a) por ĝia plenumado, b) laŭ la rolo en balota procezo,

en kiu la gepatroj/zorgantoj ricevas laŭleĝe, krom sia propra voĉo ankaŭ la voĉojn de siaj gefiloj. Tio signifas, ke ĉirkaŭ 25% da la loĝantaro, kiu konsistas el gepatroj/zorgantoj, posedos (kontrolos) pli ol 50% da ĉiuj voĉoj de elektantaro, konsiderante la voĉojn de siaj infanoj. Tiu *formala* malegaleco²⁰ ŝajnos maljusta al iuj, sed supre estis pruvite, ke nur ĝi *fakte* estas justa rilate al infanoj. Kion ni, plenaĝuloj, preferos: nian formalan egalecon aŭ faktan justecon por niaj infanoj? La respondo al tiu demando estas ambigua. Pro tio la unua sociologia esploro antaŭ la enkonduko de voĉdonrajto de infanoj devas esti dediĉita al la rilato al ĝi far la gepatroj/zorgantoj, kiuj estas la ĉefaj subjektoj de LVI (vidu Koncepton 2).

9. «Limigoj de rajtoj de gepatroj/zorgantoj voĉdoni por siaj gefiloj» estas enkondukitaj por la gepatroj alkoholuloj, narkotistoj k.t.p. LVI devas antaŭvidi mekanismon pri la limigoj (kvanto de gefiloj, rabatoj, tempo) aŭ senigo ilin pri la rajto voĉdoni por siaj gefiloj laŭ la iniciato de Klerigorganoj kaj loka memregado. Por la plej patologiaj gepatroj-alkoholuloj la leĝo devas antaŭvidi pli rapidigan reĝimon por senigo ilin pri gepatraj rajtoj. La similaj sankcioj kontraŭ la gepatroj-alkoholuloj efektive influos al malpliigo de ilia kvanto, por sanigo de psikologia etoso en iliaj familioj.

10. Demando pri akcepto de voĉdonrajto de infanoj kaj LVI en ĉiu lando estas konsiderata per tutpopola referendumo post aranĝo de necesaj sociologiaj esploroj. Antaŭ la referendumo devas esti organizita vasta intensa kaj longa, ne malpli ol unujara eksplika kampanjo pri socialaj kaj politikaj indecoj de LVI²¹.

La prezentita enhava skemo de LVI, kompletigita de sankcioj kontraŭ krimuzo de voĉdonrajtoj de infanoj, kreas necesan juran mekanismon por reglamenti la plenumadon de voĉdonrajto de infanoj. LVI estas *sendanĝera* laŭ la tuta spektro de la socialaj postsekvoj, sed ĝi, kiel ajna leĝo, povas esti utiligita por la nacionalismaj, rasismaj kaj similaj kontraŭhumanismaj kaj profitamaj celoj, por kiuj respondecas ne la leĝo, sed konvenaj agantoj (subjektoj). Pro tio en la leĝo devas esti antaŭviditaj sankcioj kontraŭ krimuzo per ĝi. La sola manko de la leĝo, kiu baldaŭ malaperos, estas ĝia noveco, nekutimeco.

²⁰ Malegaleco de plenaĝuloj garantios egalecon de infanoj kaj forigas ilian politikan diskriminacion. Tial malegaleco de plenaĝuloj tiukaze praviĝas politike kaj morale. Se allaseblas malegaleco laŭ riĉeco, klerigo, prestiĝo k.a., kial do ne allaseblas malegaleco laŭ la elektaj voĉoj, kondiĉitaj pro malegala kvanto de gefiloj? El ĉiuj malegalecoj tio estas la plej nobla, inda kaj politike necesa, ĉar ĝi ne estas profitcela kak egoisma, sed donas «specialan zorgon» kaj egalecon al la infanoj. Ĉu la plenaĝuloj ne devas iom cedi sian egalecon por la egaleco kaj bonstato de siaj gefiloj? Voĉdonmalegaleco de plenaĝuloj estas ne nur politika, sed ankaŭ morala postulo fare de socio rilate politikon. Kiomgrade ĝi konscias la postulon, estas objekto de nia esplorado.

²¹ Por gvidi la kampanjon necesas politika partio. Kiuj partioj faros LVI kiel sia standardo? Ĉu ekzistas tiuj partioj? Ĉu ekdeziros «potencaj partioj» levi tiun standardon? Ĉu inter ili ekzistas tiuj, kiuj zorgas pri strategia longdaŭra bonstato de la lando? Al tiuj malfermaj demandoj neniuj povas respondi. Tamen klaras, ke por la partioj «porinfana» movo en politika ŝakludo estos la plej efektiva kaj venkohava.

Leĝo pri voĉdonrajto de infanoj: parlamenta plimulto kaj transformado de infanproblemoj en la unuavicajn

Ĉi-tie ni pli detale konsideros la ĉefan destinon LVI. La leĝo kreas unikan politikan ŝancon ricevi plimulton (pli ol 50%) da lokoj en ĉiunivelaj parlamentoj fare de deputitoj, elektitaj per infanaj voĉoj (ĉirkaŭ 25% da la elektantaro) kaj per la voĉoj de iliaj gepatroj/zorgantoj (pli ol 25% da la elektantaro). Certe, tio estas ideala varianto, ĉar reale ne ĉiuj gepatroj/zorgantoj partoprenos la baloton. Tamen, pro tio, ke aliaj grupoj de elektantaro ne plene partoprenas la balotojn, estas granda probableco al infanaj deputitoj ricevi plimulton en parlamentoj. La probableco kreskas kune kun la kresko de balota aktiveco de gepatroj/zorgantoj. (Tiu leĝo enportas en la balotojn konkurantajn komponantojn de elektantaj grupoj, kaj tio multe plimultigas la kvanton de elektantoj). Parlamento, kies plimulto konsistas el infanaj deputitoj, faros unuavicajn decidojn de infanproblemoj pro ilia graveco kaj pri amplekso de ĝia financado el la ŝtata buĝeto. «Infana» (aŭ «junulara») parlamenta plimulto kreas necesan sistemon de konstanta kaj efektiva solvo de infanproblemoj. Tial LVI fariĝos laŭleĝa garantiinto por transformado de infanproblemoj je unuavicaj. Ĝi fariĝos fonto por kreado de efektiva sistemo de ilia solvo, kiu, antaŭ ĉio, balotos kun la kaŭzoj de la infanproblemoj. Sen LVI infanproblemoj *neniam* fariĝos unuavicaj, *neniam* ili ricevos konstantan kaj efektivan sistemon por ilia solvado kaj prioritata financado. Sen LVI la situacio de infanoj en la mondo *neniam* kvalite pliboniĝos, kaj ĉiuj infanrajtoj el Konvencio de UN restos formalaj, ne garantiitaj per jura mekanismo de ilia plenumado.

Leĝo pri voĉdonrajto de infanoj: fonto de sistema solvado de infanecaj problemoj

La problemoj de infaneco estas sistemaj. Tio signifas, ke ili unuflanke aperas el ĉiuj sferoj kaj institucioj de socio, kaj aliflanke ili kaŭzas al ili negativan malan agon. Pro tio la solvado de la infanecaj problemoj ne atingeblas en apartaj parlamentaj komitatoj aŭ komisionoj, en apartaj ministerioj kaj departementoj. La sistema karaktero de infanecaj problemoj postulas sisteman mekanismon por ilia solvado, kies konstruado kaj perfektigo devas esti seninterrompaj laŭ la tuta spektro de sociaj aferoj, ministerioj kaj departementoj de la ŝtato. Tia grandegan laboron povas efektiviĝi nur ĉiunivela parlamenta plimulto. Krei la parlamentan plimulton, direktitan por la unuavica kaj sistema solvado de la infanecaj problemoj povas *nur* konvena balota leĝo – LVI. Tial ĝi estas fonto ne nur de la unuavica, sed ankaŭ de la sistema solvado de la infanecaj problemoj laŭ la tuta spektro de la ŝtataj institucioj. La kreado de la sistema mekanismo por la solvado de la infanecaj problemoj estas afero treege komplika kaj longdaŭra, postulanta konstantan jure formitan fonton, kiu povas esti nur LVI. Sen ĝi maleblas revii pri la mekanismo.

Aliaj pozitivaj postsekvoj de la Leĝo pri voĉdonrajto de infanoj

LVI, kiel sistema leĝo, ŝanĝanta la balotan kaj politikan sistemon, havas grandegan spektron de pozitivaj socialaj postsekvoj, el kiuj ni, krom la menciitaj supre, distingos la sekvajn. Ni provos dividi tiujn sekvojn laŭ sferoj kaj tute por la socio. Do, la plenumado de tiu leĝo, kreado de ŝtata mekanismo sur ĝia bazo por la unuavica kaj sistema solvado de infanproblemoj:

Entute:

- malfermos novan vojon por ennoviga, avangarda kaj akcela evoluo de landoj, speciale por la landoj de la tria mondo, transformante negativan faktoron de superproduktado de loĝantaro (de infanoj) en pozitivan resurson de bonstato de la landoj (tia estas dialektiko de voĉdonrajto de infanoj);

- ŝanĝos la prioritaton de ekonomika kaj milita konkurado inter la landoj de la mondo al la prioritata konkurado en la sfero de la bonstato de infanoj – tio estas la plej humana konkurado (se eblas eĉ nomi ĝin humanisma);

- ŝanĝos en la mondo prioritaton de malpaco, malfido, maljusteco, perforto, armeoj k.t.p. al la prioritato de infanoj, tio estas al la prioritato de paco, justeco, kunlaboro je nomo de infanoj;

- plifortigos humanisman komponanton de globalismo, donos al ĝi homan vizaĝon kaj infanan dimension. La epoko de globalismo postulas de la homoj novan kvaliton, kiu komenciĝas per nova kvalito de infanoj, kio siavice komenciĝas per enkonduko de voĉdonrajto de infanoj;

- multe plifortigos pacamajn fortojn, humanismon kaj dialogon inter civilizacioj en la internaciaj interrilatoj de la nova jarcento, fortojn de mondkulturo;

- superos la krizon de socio, ŝtato kaj demokratio, plijunigos kaj modernigos ilin;

- plifortigos kaj stimulos evoluon de civitana socio.

En sociala sfero:

- signifoplene plibonigos la situacion de infanoj (kaj infanan sferon) en la socio, plialtigos ilian kvaliton kaj kvaliton de ilia socialigo (edukado, sanprotektado, libertempo, sporto k.t.p.);

- plifortigos familion, plialtigos rolon kaj aŭtoritaton de gepatroj ne nur en socio, sed je opinio de siaj infanoj;

- levos moralan-psikologian respondecon de gepatroj kaj zorgantoj por siaj gefiloj;

- venkos malhumanigecon de lernejo kaj levos moralan edukadon de lernejoj;

■ tre favore efikos por plialtigo de rolo kaj rajto de virinoj-patrinoj, precipe la junaj, kiuj portas la ĉefan ŝarĝon de zorgoj pri infanoj ĉe la fruaj stadioj de la evoluo. (Estas aliaj genderaj sekvoj de tiu leĝo);

■ kreas efektivan mekanismon por solvado de demografiaj problemoj, permesante plialtigi naskiĝokvanton en unuj landoj²², sed en la aliaj subteni ĝin stabile, pere de enkonduko de konvenaj normoj en LVI, kiuj donas voĉdonrajton al ĉiuj infanoj aŭ limigitan kvanton por familio, enkondukos aldone rabatojn aŭ impostojn je la infanoj k.t.p.;

■ disvastigos interŝanĝon per servoj inter generacioj kaj interligon inter ili, respondecon unu por la alia kaj reciprokan helpon. Unue la gepatroj voĉdonas por la infanoj, zorgas pri plialtigo de ilia bonstato, kaj poste, kiam la infanoj fariĝos plenaĝaj kaj memstaraj, ili zorgos pri la gepatroj, pri ilia sano kaj bonstato kun pli granda morala respondec. (Ekzistas ankaŭ aliaj generaciaj postsekvoj el la leĝo);

■ fariĝos potenca sociala kontraŭterorisma forto, kiu malhelpos uzi infanojn kiel teroristoj-memmortigantoj. Pli efektive edukos la infanojn kaj uzos iliajn voĉojn dum balotoj anstataŭ transformi ilin je teroristoj-memortigantoj.

En la sfero de kulturo

■ kvalite plialtigos politikan kulturon kaj konscion de familio (de la gepatroj, kaj de la infanoj) pere de komuna pridiskuto de partiaj listoj de kandidatoj, de iliaj programoj, pere de komuna elekto el ili plej bonajn infanajn deputitojn. Kreskado de politika kulturo kaj koincido de infanoj permesos eventuale malpliigi aĝan censon de infanoj unue ĝis 16 jaroj, poste ĝis 14 kaj eble ĝis 12 jaroj;

■ plibonigos kalkuladon de infanoj (pere de listoj de elektantoj) kaj plifortigos ŝtatan kontrolon pri ilia uzado fare de gepatroj. Tio fariĝos potenca informa kaj profilaktika rimedo kontraŭ infana krimo kaj kontraŭ malestimo de infanaj rajtoj. La listoj de elektantoj (elektoregistroj), kiuj inkluzivas infanojn, fariĝos praktike ĉiujara popolnombro;

■ starigos altkulturan moralpsikologian etoson de konfido kaj reciproka helpo inter generacioj, inter gepatroj kaj gefiloj;

■ sanigos rimedojn de amaskomunikiloj, liberigos ilin de propagando de perforto kaj pornografio, disvastigos kaj plibonigos informon por infanoj;

■ faros «specialan zorgon» pri infanoj samtempe nacia kaj globala ideo de socio, pli forta, ol «usona revo».

En organiza sfero

²²Al demografia funkcio de voĉdonrajto de infanoj kiel al mekanismo de evitigo de depopulacio kaj plialtigo de naskiĝokvanto en Rusio estas dediĉita granda kaj detala artikolo de fama peterburga sociologo. Vidu A.Baranov. *Depopulacio – sociala defio al la ŝtato* // «Zvezda» 2001, N 1, p.172–179.

- pliigos proksimume je 25% ĝeneralan kvanton de elektantaro pro balotaj voĉoj de infanoj;

- bruske malpliigas nivelon de infana krimeco, prostituo, narkotismo, senhejmeco, infanan izolecon de socio kaj familio;

- garantios efektivigon de infanrajtoj, egaligos infanojn je rajtoj (antaŭ ĉio je balotrajto) kun la aliaj grupoj de loĝantaro. Sen tiu leĝo bonega rajto de infanoj «por speciala zorgo kaj helpo» fare de socio, proklamita en Ĝenerala Deklaracio de Homaj Rajtoj, restos sensenca frazo;

- kreas novan, pli justan, politikan skemon de disdivido de ŝtatpotenco kaj riĉaĵo inter socialaj klasoj, seksoj kaj generacioj. Se nuntempe preskaŭ en ĉiuj landoj ŝtatpotenco estas dividita por utilo de pliaĝa generacio, por ĝia vira kaj pli riĉa parto, LVI garantios pli harmonian distribuon de potenco inter generacioj, seksoj kaj klasoj;

- plialtigos politikan rolon de infanoj kaj de familioj, precipe de junaj familioj;

- plialtigos politikan respondecon kaj aktivecon de gepatroj/zorgantoj;

- ŝanĝos la tendencon de abstinismo (evito de partopreno en balotoj), multoble pliigos la partoprenon en balotoj flanke de junularo, precipe de junaj gepatroj, kiuj voĉdonos ne nur por si mem, sed ankaŭ por siaj gefiloj;

- plialtigos politikan gravecon de sociala sfero entute;

- plifortigos kaj humanigos demokration, maksimume plivastigos ĝian socialan bazon, aldonos al demokratio bonkoran homan vizaĝon, infanan dimension kaj konfirmos ke politiko povas esti ne nur malpura, faros ŝtaton vere sociala, konfirmita en ĝi la prioritaton de sociala sfero;

- kreas efikan mekanismon por unuigo de ŝtataj organizoj, kiuj solvas infanproblemojn, unuigos ŝtatajn kaj neŝtatajn organizojn per solvado de tiuj problemoj;

- garantios politikan egalecon de la tuta loĝantaro, de ĉiuj ĝiaj socialaj grupoj, inkluzive infanojn rilate voĉdonrajton;

- unuigos organize penojn de familio kaj ŝtato en la solvado de infanproblemoj;

- transformos la infanojn el la senaga en la potencon resurson de la socio;

- provizos organojn de loka memregado per prioritataj plenrajtoj por solvado de infanproblemoj laŭ la loĝloko, garantios ilian prioritatan financadon;

- permesos al ŝtatoj-partoprenantoj en UN-Konvencio pri infanaj rajtoj superi ĝian *malplenumadon*, speciale de Paragrafo 4, en kiu estas enskribite: «ŝtatoj-partoprenantoj uzas ĉiujn necesajn leĝajn, administrajn kaj aliajn rimedojn por efektivigo de rajtoj, agnoskitaj en la Konvencio... en maksimumaj kadroj de havantaj ĉe ili resursoj...». Krome, superi malplenumadon de principo de la Deklaracio, ke infanoj estas objekto de «speciala

zorgo»²³ (estas substrekite tio, kion ne plenumas la ŝtatoj-partoprenantoj. – L.S. kaj M.D.). Nur voĉdonrajto de infanoj donos al ili *specialan zorgon* fare de ŝtato. *Kiu* postulos ĝin de la ŝtato?

- aldonos novan sencon al la baloto *kontraŭ* terorismo, koruptado, narkotaĵoj kaj krimoj kiel al la batalo *por* infanoj, *por* «*la mondo, inda por infanoj*»;

- plialtigos socialan valoron kaj signifon de ĝenerala voĉdonrajto.

En ekonomika sfero

- plialtigos multoble nivelon de subvencioj kaj materialan bonstaton de infanoj;

- pligrandigos je 2-4 fojoj areon de porinfanoj ejoj (antaŭlernejaj, lernejoj, medecinaj, sportaj, klubaj k.t.p.) kaj tio permesos malaltigi respektive personkvanton en infanaj grupoj kaj speciale en lernejoj klasoj, malpliigante kvanton de klasanoj je 30-35 gelernantoj ĝis 15 kaj pli poste ĝis 8 klasanoj;

- faros salajron por laborantoj en infanaj institucioj la plej alta inter buĝetaj laborantoj;

- plialtigos multoble «enhoman» kapitalon, tio estas ekonomikaj enmetaĵoj en homojn.

Fine, ni substrekos, ke nur surbaze de transformado de voĉdonrajto de infanoj je leĝon eblas krei «mondon, indan por infanoj», forigi «mizeron, diskriminacion kaj indiferentecon fare de socio al infanoj» kaj superi «plimalbonigon de situacio de juna generacio», kio estis konstatita en Deklaro de Speciala UN-Sesio en majo, 2002. Infanoj, senrajtigitaj je voĉdonado, fakte ne estas garantiitaj per aliaj rajtoj, fiksitaj en UN-Konvencio pri rajtoj de infano, kiu preskaŭ nenie plenumiĝas. Tion konstatis Speciala UN-Sesio. En tiu ĉi senespere nekorektebla situacio LVI fariĝas vera «lokomotivo» por plenumado de ĉiuj infanrajtoj.

Fortoj, kontraŭagantaj al voĉdonrajto de infanoj

Kiel ni konstatis supre, LVI kondukas al forta transformado de politika sistemo kaj de socio mem, al ilia profunda modernigo, al legitima redistribuo de potenco kaj riĉaĵoj por utilo de infanoj kaj ilia sfero. Pro tio ĝi spertos potencan kontraŭagon laŭ la principo: «kontraŭago egalas agon». Kiuj do estas kontraŭagaj fortoj?

La unua, la plej potenca sociala obstaklo estas centjara forto de psikologia tradicio pri politika ignorado kaj diskriminacio de infanoj, senkontesta rego de plenaĝuloj²⁴. La tradicio forte enradikiĝis en la konscion de nuntempaj homoj pere de miloj de antaŭaj agraraj kaj industriaj socioj, en kiuj la infanoj estis ignoritaj politike. Rompi tiun ĉi amasan mensan

²³ El ĉiuj sociaj grupoj sole infanoj havigas «specialan zorgon» laŭ la Deklaracio pri rajtoj. Sed ili ĝis nun ne ricevas tiun zorgon. Sekve la ŝtato ignoras tiun internacian normon.

²⁴ Tiun tradicion genie malkovris Januŝ Korĉak. Vidu lian libron, rekomenditan supre.

kutimon estos tre komplike, tamen la moderna vivo jam profunde konsumis ĝin. La junaj generacioj pli inklinas disiĝi de ĝi, ol sekvi ĝin. (Tio postulas specialan social-psikologian esploron).

La dua. Al LVI rezistos la fortoj, kiuj nun posedas la plej grandan parton de ŝtata buĝeto – tio estos oficistaro (burokratio), potencaj strukturoj, milit-industria bloko. LVI akcelos al redistribuo de ŝtata buĝeto por utilo de infanoj, kaj tio kunpuŝiĝos kun kontraŭago de regantaj socialaj grupoj.

La tria. Kontraŭagon al LVI efektiviĝos oligarĥoj, kiuj ne estas interesitaj pri redistribuo de naciaj riĉaĵoj por utilo de infanoj.

La kvara. La obstaklon al LVI efektiviĝas plimulto da nuntempaj deputitoj kaj juristoj, kiuj priservas regantajn grupojn kaj oligarĥojn.

Tiaj estas ĉefaj obstakloj kaj kontraŭagaj fortoj, kun kiuj kunpuŝiĝos LVI. Tamen la gepatroj, malriĉa kaj mezriĉa loĝantaro, precipe junularo kaj virinoj, laborantoj de sociala sfero (instruistoj, kuracistoj k.a.) ekvidos en la leĝo potencon instrumenton por plialtigo de bonstato de siaj gefiloj kaj familioj kaj en sia plimulto *subtenos* ĝin. Por evidentigo de la problemo estas planata serio de sociologiaj esploroj (vidu Koncepton 2).

Tetrasociologio kiel teoria fonto de la ideo pri voĉdonrajto de infanoj kaj ĝia estiĝo el praktiko

Voĉdonrajto de infanoj estas unu el logikaj sekvoj kaj aplikaĵoj de tetrasociologio²⁵. Tetrasociologio estas postpluralisma «granda teorio» kaj multdimensia modelo de socio en 24 parametroj de kvardimensia spac-tempa metriko. (Ĝi baziĝas sur preciza kvanto de sociaj dimensioj). La teorio estas prilaborata de unu el la aŭtoroj (L.Semaŝko) dum pli ol 25 jaroj. En Okcidento ĝi fariĝis konata ekde 2002, kiam estis publikigita ĝia unua libro angle²⁶. Al tetrasociologio apartenas kvin socialaj eltrovaĵoj, faritaj «plumpinte», kiuj pro tio estas hipotezoj, postulantaj fundamentajn empiriajn konfirmojn. Al tiuj eltrovaĵoj-hipotezoj apartenas: sferaj klasoj²⁷ kiel agantoj de sociala harmonio, sfera demokratio, sfera sociologia statistiko, sfera inform-statistika teknologio, socikultura teknologio de prosperado per harmonio kaj informado. Kvankam tetrasociologio aperis en Rusio, dekomence ĝi estas ne

²⁵Entute pri tetrasociologio la aŭtoro publikigis ĉirkaŭ 40 artikolojn kaj 5 librojn, el kiuj du lastaj estas tradukitaj anglen. Vidu sube.

²⁶ Семашко Л.М. *Тетрасоциология: ответы на вызовы*. СПбГТУ, 2002, www.peacefromharmony.spb.ru
Semashko, L (2002). *Tetrasociology: Responses to Challeges*. St.Petersburg. Technical University. Alia libro en tri lingvoj (la rusa, angla, esperanto): Семашко Л.М. с соавторами. *Тетрасоциология: от социологического воображения через диалог к универсальным ценностям и гармонии*. СПбГПУ, 2003.
Semashko L. with co-authors (2003) *Tetrasociology: from Sociological Imagination through Dialogue to Universal Values and Harmony*. St.-Petersburg State Polytechnical University.

²⁷Ekzisto kaj dinamiko de sferaj klasoj sur ekzemplo de Rusio estas konfirmitaj per statistikaj esploroj de la aŭtoro en la libro (2002, 84-93)

nacia, sed internacia kaj toleranta paradigmo. Ĝi apartenas al okcidenta kulturo, daŭrigas kaj evoluigas «tetran», kvardimensian pluralisman tradicion de okcidenta pensmaniero, kiu iras de Pitagoro kaj Platono en antikva tempo ĝis M.Weber, Parsons, Toffler, Bourdiu, Giddens, Sztomka kaj Castelles en la 20-a jarcento. Ĝi staras sur la ŝultroj de tiuj gigantoj²⁸ kaj koincidas kun la ideoj de multaj aliaj aŭtoroj. Inter la lastaj necesas nomi ideojn de sociologia imagpovo de Mills²⁹, retan aliron de Phillips³⁰, universalajn valoraĵojn de Bachika³¹, socialajn konstruojn de moralaj universalajoj de Aleksander kaj lia «kultura sociologio»³², disdivido de regpotencoj de DeWitt³³, instruitan koron de Roseman³⁴, kulturajn diferencojn kaj historiajn apartaĵojn de Calhoun³⁵, kvar emociajn fortojn/resursojn de Turner³⁶, kvar socialajn perspektivojn de Capra³⁷, socicibernetikajn rektajn kaj reajn ligojn de B.Hornung kaj Scott³⁸ kaj multajn aliajn.

La plej grava merito de tetrasociologio estas eltrovaĵo de specialaj sferaj tre grandaj klasoj de loĝantaro, kiuj diferenciĝas laŭ sia okupiteco en unu el la sferoj de socia reproduktado, kaj konstante celas al sociala harmonio, superante malharmonion kaj malegalecon de aliaj fakaj kaj apartaj socialaj grupoj. En tetrasociologio la infanoj estas konsiderataj kiel egalrajtaj partoprenantoj kaj membroj de sferaj klasoj, kaj antaŭ ĉio de sociala klaso, kiu okupiĝas per reproduktado de homoj. (En tetrasociologio estas uzata nocio «sociala reproduktado de homoj», kiu inkluzivas ĉiujn branĉojn de sociala sfero: edukado, sano, kredo, libera tempo, sporto k.t.p. Tiun ĉi nocion oni ne devas kompreni kiel biologia reproduktado, kiu koncernas nur naskiĝon). La infanoj egalas al la aliaj homoj je la vidpunkto de memreproduktado. La infanoj okupiĝas per memreproduktado, kaj tio estas la plej grava funkcio por la socio, ĉar nur per infanoj la socio plenigas sian homan resurson. Se oni agnoskas, ke la infanoj estas membroj de la socio, egale kun la aliaj laŭ ilia ĉefa reproduktiva okupiteco, ke la infanoj estas civitanoj de la ŝtato ekde la naskiĝo, tial de la naskigo ili devas

²⁸La ideoj de tiuj aŭtoroj estas konsideritaj de mi en la libro (2002, 23-27).

²⁹Mills, C. Wright. (1959) *The Sociological Imagination*. New York: Oxford Univ. Press

³⁰Phillips, Bernard. (2001). *Beyond Sociology's Tower of Babel: Reconstructing the Scientific Method*. Hawthorne, NY: Aldine de Gruyter.

³¹Bachika Reimon (2003). *Tetrasociology and Values*. In: Semashko L. *Tetrasociology: from Sociological Imagination through Dialogue to Universal Values and Harmony*. St.-Petersburg State Polytechnical University, p.191-195

³²Alexander Jeffrey (2003). *The Meanings of Social Life. A Cultural Sociology*. Oxford University Press.

³³De Witt, Martha R. (2000). *Beyond Equilibrium theory; Theories of Social Action and Social Change Applied to a Study of Power Sharing in Transition*. Lanham, MD: University Press of America.

³⁴Roseman, Hilarie (2003). *The Enlightened Heart: Common Values Engage the Sacred with the Secular*. Manuscript.

³⁵Calhoun, Craig (2003). *Critical Social Theory. Culture, History, and the Challenge of Difference*. Blackwell Publishing.

³⁶Turner, Jonathan (2003). *Face to Face. Toward a Sociological Theory of Interpersonal Behavior*. Stanford Univ. Press.

³⁷Capra, Fritjof (2003). *The Hidden Connections. A Science for Sustainable Living*. Harper Collins Publishers.

³⁸Scott, Bernard R. (2000). *Cybernetic explanation and development*, *Kybernetes*, 29, 7/8, pp. 966-994.

Hornung, Bernd R. (2002). *Emergency – A Key Concept for Sociocybernetic Theory of Information Society*, Paper presented at the 15th World Congress of Sociology, Brisbane, July 8-13, 2002, PC51 on Sociocybernetics.

ricevi voĉdonrajton en demokratia ŝtato. Tetrasociologio diferencigas voĉdonrajton de infanoj disde balota okupiteco (partopreno en balota procedo), kiun havas nur plenaĝuloj. Sur tio baziĝas divido inter voĉdonrajto de infanoj kaj ĝia plenumado fare de gepatroj kaj zorgantoj.

Supre ni emfazis, ke la infanoj kaj iliaj gepatroj/zorgantoj konsistigas *socialan subtenon* de parlamenta plimulto, kiun kreas LVI. Tiu sociala subteno estas neordinara kaj povas esti eksplikita nur je pozicio de sferaj klasoj³⁹ de tetrasociologio. Deveno de la sociala subteno estas difinita de sferaj klasoj, kiuj estas tuthomaraj, globalaj kaj harmoniaj, superantaj malvastajn limojn de tradiciaj antagonismaj klasoj kaj grupoj. Tial sociala subteno, formita de tiuj klasoj, havas specialan tuthomaran, globalan kaj harmonian karakteron. La infanoj kaj iliaj gepatroj/zorgantoj havas sferan socialan strukturon, apartenas al sferaj klasoj, okupitaj en sferoj de socia reproduktado. La infanoj apartenas al sociala klaso, sed ili *pretigas sin* al okupiteco en ĉiuj kvar sferaj klasoj. Sed la gepatroj/zorgantoj de la infanoj *jam* apartenas al sferaj klasoj kaj jam sin okupas en ili. Tial la sociala subteno, inkluzivanta infanojn kaj iliajn gepatrojn/zorgantojn estas ĝenerala por ĉiuj ŝtatoj de la mondo, riĉaj kaj malriĉaj, grandaj kaj malgrandaj, sekve ĝi estas ankaŭ globala, tuthomara kaj harmonia. La saman karakterizon havas voĉdonrajto de infanoj kaj LVI.

Inter tiu rajto kaj sferaj klasoj ekzistas ankoraŭ unu grava interligo. Ĝi konsistas jene: de unu flanko voĉdonrajto de infanoj bezonatas al homoj kiel membroj de sferaj kaj harmoniaj klasoj, aliflanke ĝi helpas al la homoj konscii sian novan sferan tuthomaran identecon kaj komuncon. Ĝi estas momento survoje al politika memkonscio de sferaj klasoj kaj ilia movado al sociala harmonio, inkluzive al harmonio de aĝoj kaj generacioj. Tiu harmonio trovas politikan reflektan en voĉdonrajto de infanoj, kiu inverslige helpas ĝin trovi adekvatan politikan organizon. Enkonduko de voĉdonrajto de infanoj signife levos nivelon de sociala harmonio kaj memkonscio de homoj. Tia skize estas tetrasociologia fonto pri ideo de voĉdonrajto de infanoj.

Tiu teoria fonto pri voĉdonrajto de infanoj estas prezentita en formo de sistema politika mensmaniero, kiu konceptiĝas per skolo de profesoro A.Jurjev⁴⁰ en kadroj de politika psikologio. Politiko-psikologia aspekto de voĉdonrajto de infanoj postulas specialan esploron. La teoria bazo por meza nivelo de voĉdonrajto de infanoj estas juvenologio, kiu pli sisteme estas prezentata en kolektiva monografio, redaktita de profesoro E.Sluckij⁴¹.

³⁹ Pri la sferaj klasoj, kiuj konsistigas tiun socialan apogilon kaj difinas ĝian globalan, tuthomaran kaj harmonian karakteron, pli detale vidu en la verkoj de L.Semaŝko.

⁴⁰ Jurjev A. *Enkonduko en politikan psikologion*. S.-Peterburg, 1992. Ankaŭ li: Rusa Projekto: Pretendoj por estonto // Kuriero de politika psikologio. 2002, N 2, p.20-23. Ankaŭ li: Globalismo kiel nova formo de politika potenco, ŝanĝanta la homon kaj mondordon. // Rusio: Tutplanedaj procezoj. S.-Peterburgo, 2002, p.235-264 k.a.

⁴¹ Fundamento de juvenologio. Scienca redaktoro prof. E.Sluckij. S.-Peterburg, 2002.

Praktika estiĝfonto de ideo pri voĉdonrajto de infanoj estis deputita kaj socia agado de unu el la aŭtoroj (L.Semaŝko). En 1990-1993 li estis elektita kiel deputito de urba parlamento en Sankt-Peterburgo (Lensovet-Petrosovet) kaj okupiĝis en ĝi pri problemoj de familio kaj infaneco. Ekde 1990 ĝis 1997 li estis fondinto kaj prezidanto de Infana fondaĵo je nomo de F.Dostojevskij en Sankt-Peterburgo. En tiu fondaĵo sub lia gvidado en 1991 estis ellaborita la unua projekto de Familia kodekso de Rusio⁴², en kiu la unua ĉapitro estis dediĉita al infanrajtoj, sed voĉdonrajto de infanoj inter ili ankoraŭ ne ekzistis. La agado kiel deputito kaj fondaĵa prezidanto estis ligita kun la infanecaj problemoj de la kvinmiliono urbo, montris, ke la problemoj nesolveblas en ekzistanta politika sistemo, ĉar anstataŭ unu prizorgita senhejmulo, aŭ narkotisto aŭ orfo k.t.p. aperas 2-3 novaj similaj infanoj, ke la tuta sociala-politika sistemo multoble reproduktas infanecajn problemojn. Ĝi direktiĝas al iliaj postsekvoj, sed ne al la kialoj. Tiam fariĝis klare, ke por la vera sed ne proforma solvado de infanecaj problemoj necesas sistema ŝtata mekanismo, kies *socialan subtenon povas formi nur voĉdonrajto de infanoj*. Tiu ideo, aperinta proksimume en 1993 ŝajnis tiam al la aŭtoro mem tro freneza. Sed post iom da tempo, kune kun pripensado de ĝiaj diversaj detaloj, li konvinkiĝis je ĝia praveco kaj neceseco. La unua publika ĝia mencio okazis en la jaro 2000⁴³, kaj poste ĝi evoluiĝis en liaj sekvaj libroj kaj artikoloj⁴⁴. Do, la ideo pri voĉdonrajto de infanoj havas kaj teorion kaj praktikan fonton, elpruvita per tempo, kaj tio faras ĝin vivkapabla.

Voĉdonrajto de infanoj – nova tuthomara rajto kaj universala valorajo de la globalisma epoko

La nova epoko disvastigas rajtojn kaj liberojn de la homo, kio evidente videblas laŭ la disvastigo de opiniaj liberoj, laŭ ricevado kaj distribuado de informoj. Vaste disvastiĝas aperantaj rajtoj de konsumantoj. Disvastiĝas voĉdonrajto. Ĝia ĝenerala disvastigo povas esti kunligita nur per likvido de aĝa censo, kiel rudimento de industria socio, kaj per jura konfirmo de voĉdonrajto de infanoj. Tio faros voĉdontaĵon vere universala. Voĉdonrajto de infanoj signife influas aliajn rajtojn kaj liberojn de la homo, likvidas de ili limigojn, aperantajn pro la aĝa censo. Ni donu kelkajn konsiderojn.

⁴²*Familia Kodekso de RF*. Semaŝko L. – gvidanto de prilaboranta grupo. Projekto. S.-Peterburg. 1991.

⁴³ Semaŝko L. *Tetrasociologio – revolucio de sociala pensado, vojo al harmonio kaj prospero*. S.-Peterburg, 2000, p.45. Tie estis skribita, ke en la kadroj de estonta sfera demokratio «voĉdonrajton ricevos ĉiuj infanoj, kaj ilian rajton efektivigos la gepatroj ĝis plenaĝo de la infanoj».

⁴⁴L. Semaŝko, 2002, p.105, 134; 2003, p.34-35. Ankaŭ li: *Procezoj de demokratiigo de socio kaj voĉdonrajto de infanoj* // Filozofio de infaneco kaj socikultura kreado. Materialo de la 10-a Internacia konferenco. S.-Peterburg, 2003, p. 336-339. Liaj tezoj pri voĉdonrajto de infanoj «Tetrasociology: Children's Suffrage» estas prezentitaj en la programo *Iberoamerican Congress on Childhood, Health and Society 'Globalization and Social Equity'* University of Guadalajara, Guadalajara, Mexico, November 3-5, 2003 <http://www.cucs.udg.mx/INBOX/congresoibero.htm>

A. La aĝa censo limigas tian universalan valoron, kiel *amo* al la homoj, kiu speciale efikas en reciproka amo de gepatroj kaj gefiloj. La aĝa censo ne permesas al la gepatroj uzi politikajn rimedojn por elmontri sian amon al la gefiloj kaj zorgon pri ili. Voĉdonrajto de infanoj, kontraŭe, likvidas tiujn limigojn kaj permesas al la gepatroj uzi fortan politikan ilon de la voĉdonrajto por konfirmi sian amon al la gefiloj, kiu kreskigos la amon kaj zorgon de plenaĝaj gefiloj al siaj gepatroj.

B. Aĝa censo limigas *liberon* de la homo, ne permesas al la gepatroj efektiviĝi liberan politikan elekton, konsiderante interesojn de siaj gefiloj, kiuj estas la plej humanismaj. Male, voĉdonrajto de infanoj likvidas tiun limigon de libero, humanigas kaj ege disvastigas ĝin aldonante al ĝi kvalite novan formon de libero kiel voĉdonrajto por siaj gefiloj.

C. Aĝa censo limigas *egalecon* de la homoj, enkondukas klaran politikan diskriminacion de infanoj kaj eliminis infanajn interesojn el politika procezo. Male, voĉdonrajto de infanoj rompas ilian politikan malegalecon kaj diskriminacion, egaligas ilin politike kun la aliaj loĝantaraj grupoj en politike grava voĉdonrajto. Ĝi konfirmas veran voĉdonan egalecon, kaj tio permesas enkonduki «rajton voĉdoni» en la rangon de tuthomaraj homaj rajtoj kaj *kompletigi per ĝi* Deklaracion pri homaj rajtoj kaj UN-Konvencion pri rajtoj de infano.

Ĉ. Aĝa censo starigas nesupereblajn obstaklojn survoje de *frateco*, sociala justeco kaj harmonio. Male, voĉdonrajto de infanoj likvidas tiujn obstaklojn kaj faras signifan paŝon antaŭen sur tiu ĉi vojo, kies ĝenerala sociala senco estas tre simpla, sed profunda: se pliboniĝos la situacio pri infanoj, sekve estos pli bone al la socio, al ĉiuj homoj.

Tiel, voĉdonrajto de infanoj, demetante aĝcensajn limigojn for de rajtoj, liberoj kaj universalaj homaj valoroj, humanigante kvaliton de ilia kompreno kaj apliko, fariĝas mem nova rajto, nova libero kaj nova universala valoro de la globalisma epoko. *Ĝi renovigas kaj levas la principojn pri «libero, egaleco kaj frateco» al nova humanisma nivelo.* Ĝi fariĝas jura esprimo de tuthomara rilato de infanoj. Per ĝi la nova informa socio superas limigon – aĝan censon – de la malnova industria socio. Voĉdonrajto de infanoj estas kvalita transformado de rajtoj, liberoj kaj valoroj de socio.

Kiu politika partio faros kiel sia manifesto voĉdonrajton de infanoj?

Voĉdonrajto de infanoj estas politika objekto, kaj ĝia ŝanĝo eblas pere de politika forto, pere de partio. Ĉi tie aperas demando, al kiu hodiaŭ maleblas respondi: kiu politika partio faros voĉdonrajton de infanoj kiel sia manifesto kaj politika programo? Sendube, ke la politika partio devas esti nova laŭ siaj mondkoncepto kaj ideologio, havi novan konscion pri rajtoj, liberoj kaj universalaj homaj valoroj, konvenaj al la nova epoko. Kiu grupoj de loĝantaro povas konsistigi socialan subtenon de tiu partio? Tio estas junularo kaj virinoj, al kies intereso unuavice respondas voĉdonrajto de infanoj. Ni ne plu disvolvos tiun politikan

temon, ĉar nia tasko, nia Koncepto ne estas politiko, sed scienco, sociologia esploro pri rilato de gepatroj/zorgantoj al voĉdonrajto de infanoj. Tamen, tiuj ĉi problemoj estas ege interligitaj. Por ilustrati la aktualecon de voĉdonrajto de infanoj ni donos kelkajn ekzemplojn.

Suplemento. Jaro 2003: iuj faktoj pri situacio de infanoj

Ni donos kelkajn freŝajn, la plej karakterajn faktojn pri situacio de infanoj en diversaj landoj.

En **Rusio** la infanoj pli vere estas fonto de malriĉeco, ol ĝojo. 45% da familioj kun infanoj havas enspezojn pli malgrandajn ol minimumaj vivrimedoj⁴⁵. Tio signifas, ke proksimume duono da la Rusiaj infanoj – ĉirkaŭ 17 milionoj da homoj – loĝas en mizero, nesufiĉe sin nutras, ofte malsanas, lernas en malbonaj lernejoj kaj havas minimumajn ŝancojn aliĝi al universitatoj. Kvanto de senzorgataj infanoj en Rusio, laŭ la pritaksoj de ekspertoj, estas 4 milionoj⁴⁶. Tio estas proksimume 12% da infanoj. La jaro 2003 estis neordinare tragika, sed tipa por la Rusiaj infanoj. Tiel, en marto en du lernejoj dum incendio forbruliĝis ĉirkaŭ 50 infanoj, kaj en novembro en studenta komuna loĝejo dum incendio forbruliĝis ĉirkaŭ 40 studentoj de la unuaj kursoj. Tiuj ĉi faktoj estas simbolo de situacio de Rusiaj infanoj, ili rekte kaj figure brulas en sia lando, en sia mizera stato. Sociala-politika sistemo de la lando forbruligas ilin per sia indiferenteco kaj malzorgemo. Kiel rilatas la loĝantaro de la lando al la infanecaj problemoj? Laŭ la pridemandadoj, la infanecaj problemoj ne trafas en la listojn de la plej signifoplenaj problemoj de loĝantaro. La plej ĉefaj estas nomataj problemoj de malriĉeco – 47% da demanditoj, ekonomikaj problemoj – 32%, k.a., inter kiuj la problemoj pri infanoj forestas⁴⁷. Tio konfirmas indiferentan rilaton fare de socio al infanoj. Tio estas fiksita de Speciala Sesio de UN pri infaneco. Alia karakteriza fakto: al la demando, kian vi dezirus vidi vian infanon, 45% da gepatroj⁴⁸ embarasiĝis pri respondo. Tio signifas, ke preskaŭ duono da gepatroj ne pripensas la sorton de siaj infanoj, ne pensas pri helpo al ili kaj pri sia respondeco. Povas esti, ke voĉdonrajto de infanoj, kiun ili devos plenumi, devigos ilin iomete enpensiĝi kaj tio malpliigas la kvanton de indiferentaj gepatroj. Indiferenta rilato de la ŝtato al la infanoj elmontriĝas per porinfana monata monhelpo je 75 rubloj, kiuj sufiĉas nur por 5 kilogramoj da pano aŭ 7 litroj da lakto! Por monato! Tia estas «valoro» de infano por nuna rusia ŝtato! La kvanto de similaj faktoj⁴⁹ pri indiferenteco de la socio kaj ŝtato al infanoj eblas doni multoble, sed pro tio ili ne malpliigas, kaj ne pliboniigas la

⁴⁵Argumentoj kaj Faktoj, 49, 2003.

⁴⁶Argumentoj kaj Faktoj, 46, 2003.

⁴⁷Argumentoj kaj Faktoj, 49, 2003.

⁴⁸Argumentoj kaj Faktoj, 46, 2003.

⁴⁹ Vidu ekzemple eldonon de Infana fondaĵo je la nomo de Dostojevskij F. «*Nigra libro pri krimoj kontraŭ infanoj en S.-Peterburgo. Faktoj, dokumentoj, komentarioj*». Redaktoroj Semaŝko L., Anoŝin A., Kroŝnja G., Maĥov F., S.-Peterburg, 1994. Bedaŭrinde, dum 10 jaroj la situacio ne pliboniĝis, sed ege malboniĝis.

situacio pri la infanoj. Por venki la situacion necesas aliaj efikaj rimedoj, el kiuj la plej efektiva estas voĉdonrajto de infanoj.

USONO. Ni citu du fragmentojn el tagĵurnaloj de Usono. La unua fragmento el artikolo de Sam Dillon «Lernejo kiel azilo, kiam la geknaboj senhejmas» el *New York Times*⁵⁰, 27-a de novembro 2003.

«Senhejmaj plenaĝuloj ne ricevas multe da helpo de la registaro, ĉar multaj programoj pri helpo al malriĉuloj estis nuligitaj en 1990-aj jaroj. Sed la federala leĝo, kiu devigas lerneajn distriktojn serĉi, registri kaj priservi senhejmajn gelernantojn, postulas fari socialajn lernejojn je sendanĝeraj aziloj kiel lasta espero, kun pedagogoj kaj specialistoj pri senhejmuloj...

Ekspertoj diras, ke ili povas nur proksimume kalkuli la kvanton de senhejmaj gelernantoj en Usono, ĉar neniu amasigis tutlandajn donitaĵojn post raporto por la Kongreso en 2000 far la Kleriga Departamento. En la raporto oni informis pri 930 mil senhejmaj gejunuloj, el kiuj 621 mil estis registritaj en socialaj lernejoj. Doktoro Martha Burt, esploristino el Urba Instituto en Washington, kiu en 1996 efektivigis federale financitan esploradon de senhejmuloj, diris, ke la raporto 2000 ege intence malpliigas la kvanton de senhejmaj geknaboj, havantaj lerneajn aĝojn...

Statistiko de apartaj ŝtatoj konfirmas, ke la kvanto de senhejmaj lernantoj kreskas rapide. En oktobro 2002 oficistoj de kleriga fako de ŝtato Colorado fiksas 4103 senhejmajn gelernantojn, registritajn en socialaj lernejoj, sed al majo ilia kvanto pliiĝis ĝis 5963.

Oficistoj de ŝtato Maryland fiksas 5605 senhejmajn infanojn, havantaj lernejanajn aĝojn en 2001, sed en 2002 ilia kvanto fariĝis 7322.

En ŝtato Oregono oficistoj, uzante donitaĵojn de popolnombrado pri homoj, loĝantoj en aziloj, fiksas antaŭ du jaroj, ke en la ŝtato loĝas proksimume 21000 senhejmuloj de lernejana aĝo. Uzante la saman metodikon aŭtune 2003, la ŝtato Oregono nomas jam ilian nombron 28600.

La leĝo de McKinney-Vento, akceptita en 1987 kaj pliboniganta rajtojn de senhejmaj lernantoj, estis denove reviziita de Kongreso en 2002⁵¹. Ĝi postulas, ke ĉiu el 15000 lerneaj distriktoj de la lando devas difini «situacion de senhejmaj geknaboj kaj gejunuloj», la distriktoj devas efektivi serĉadon de geknaboj, loĝantaj en aziloj, moteloj, tendaroj kaj aliaj nekonstantaj loĝlokoj, helpi al ili registriĝi en lernejoj kaj garantii al ili ricevon de inokuloj kaj de alia medicina kaj stomatologia helpo. Tio postulas provizi la lerneajn distriktojn per transportiloj, por ke senhejmaj geknaboj povu viziti la saman lernejon, eĉ se iliaj gepatroj

⁵⁰New York Times, November 27, 2003, *School Is Haven When Children Have No Home* By Sam Dillon

⁵¹De la leĝoj, plibonigantaj rajtojn de *senhejmaj* infanoj, logike sekvas transiro al la leĝo pri voĉdonrajto de infanoj, kiu kondukos al forigo de kialoj pri *senhejmeco* de infanoj.

transloĝiĝos, serĉante azilon aŭ laboron. Federalaj subvencioj al ŝtatoj por plenumado de tiuj devoj konsistas el 50 milionoj da dolaroj en la jaro (po unu miliono por la ŝtato – ne tro multe. –L.S.). La pedagogoj diras, ke la financado estas ege malpli granda ol bezonatas. Multaj lernejoj distriktoj aldonas al tio subvenciojn por helpi malriĉajn geknabojn. Laŭ la leĝo, infano, kiu fariĝas senhejma en Usono, havas rajton esti registrita en ajna lerneja distrikto de la lando, senprokraste post aperigo en la distrikto, kaj povas resti registrita, se la distrikto ne refutas, ke la postulo pri registrado estis malvera...»

La dua fragmento koncernas senhejmajn gelernantojn de urbo Milwaukee, ŝtato Viskonsino, Usono. Tio estas fragmento el artikolo de Georgia Pabst «7000 gelernantoj estas senhejmaj» en tagĵurnalo «Milwaukee Journal Sentinel»⁵², 21-an de novembro 2003.

«Kreskado de malriĉeco kaj senhejmeco – tio estas «granda monto» inter la barieroj al la lernaj sukcesoj de gelernantoj de socialaj lernejoj en urbo Milwaukee», – diris gvidanto de urba Distrikto pri Socialaj Lernejoj (DSL) William Andrekopoulos dum urba forumo pri senhejmeco kaj moviĝo de gelernantoj vendrede la 21-an de novembro 2003. Li diris, ke proksimume el 100 000 gelernantoj de DSL oni klasifikas kiel senhejmajn 7-8 mil gelernantojn. Ĉirkaŭ 10 000 gelernantoj loĝas en komunaj loĝejoj. Pli ol 25 000 gelernantoj de DSL ne havas asekuron pri sano. Krome, Andrekopoulos diris, ke proksimume 80% (80 000) gelernantoj de la distrikto havas rajton ricevi senpagan aŭ rabatan tagmanĝon. Tio signifas, ke ili estas malriĉaj⁵³. Andrekopoulos emfazis neceson de plialtigo de socia atento al kriza problemo de malriĉeco, staranta antaŭ la gelernantoj. Li ankaŭ emfazis le neceson plialtigi individuan sentemon en «koroj kaj cerboj» kaj alvokis «vidi la mondon per infanaj okuloj, kies lerneja nutrado povas esti sola dumtage»⁵⁴.

«Aliaj oficistoj de DSL deklaris, ke ili deziras kunlabori kun registaraj agentejoj pri solvado de kreskantaj problemoj de malriĉeco de gelernantoj. Tamen, Joe Volk, prezidanto de kriza azilo kaj kunordiganto de Societo pri helpo al senhejmuloj, diris, ke en la pasintaj jaroj estos tre malfacile devigi oficistojn de DSL labori kun senhejmuloj... Li diris, ke Societo pri helpo al senhejmuloj kunlaboras kun multaj privataj nekomercaj grupoj, sed la oficistoj de DSL malofte vizitas la Societon. Oni ĉiam sendas al ili invitilojn por la renkontiĝoj, sed ili malofte respondas»⁵⁵.

⁵²Milwaukee Journal Sentinel, November 21, 2003, «7,000 MPS students reported homeless...» by Georgia Pabst.

⁵³Atentigu pri kvazaŭ paradoksa fakto, ke malriĉeco de 80% da gelernantoj estas konstatitaj en la plej riĉa lando de la mondo! Sekve, la landa riĉeco tute ne identiĝas al la riĉeco de ĝiaj infanoj. La landa riĉeco povas kunekzisti kun malriĉeco de infanoj. Tio atestas pri ilia diskriminacio, pri indiferenteco al la infanoj ankaŭ en riĉaj landoj. Ĉi tiun veron malkovris genia Januŝ Korĉak.

⁵⁴Bonega alvoko al la socio kaj civitanoj, sed absolute utopia sen voĉdonrajto de infanoj. La riĉa Usono kaj la malriĉa Rusio neniam solvos la problemon pri malriĉeco de siaj infanoj sen tiu ĉi rajto, sen LVI.

⁵⁵En Usono, same kiel en Rusio dekoj da ŝtataj organizoj okupiĝas pri infanaj problemoj, sed ili ne havas organizan kaj juran unuiĝon. Tio farus ilian laboron neefika, dispecigita. Ili burokrate transmetas la

Aŭstralio. Ni citas fragmenton el artikolo de Angela Shanahan el aŭstralia gazeto «Age»⁵⁶, sendita al ni de Hilarie Roseman, por kio ni ŝin kore dankas. La artikolo havas titolon «Infanoj de meza Aŭstralio spertas krizon».

«Ŝajnas, ke edukada tradicio de nia junularo estas malĝusta... Malbona rilato al la infanoj fariĝis centro de komentarioj en la amaskomunikiloj, kio indikas pri treega disfunkciado, pro kio respondecas aŭ sociala patologio aŭ persona krueleco. Sed kio generas tion, se plimulto el aŭstraliaj infanoj neniam antaŭe spertis kruelecon, materiajn embarasojn, malbonan traktadon? Kreskas statistiko pri tio, ke la infanoj el «ĉefa fluo» de apudurba Aŭstralio havas gravajn fizikajn, intelektajn kaj emociajn problemojn. Ni scias, ke pliiĝas kondukataj ekscesoj kies kaŭzoj etendiĝas de deficiito de atento, de giperaktiveco ĝis modera aŭtismo (enprofundigo en sin mem). Ni scias, ke aŭstraliaj infanoj estas pli grasaj, ol necesas, kaj ili ricevas la duan gradon de diabeto. Ni scias, ke la knaboj pli kaj pli malprogresas en lernado kompare kun la knabinoj, kaj ili eĉ havas suicidajn intencojn... Pasintmonate estis publikigita raporto, aldonanta la statistikon. Ĝi montras, ke ege pli multe da aŭstraliaj geknaboj ol antaŭe dubas pri sia kapablo atingi necesan klerigan nivelon. Tiu ĉi raporto baziĝis sur vaste uzata Kanada Kleriga Indekso de Evoluo kaj ĝi montris maltrankviligan neperfektecon de aŭstraliaj infanoj, kiu povas alkonduki al prokrasto de intelekta evoluo. La rezultoj montris, ke 26% da geknaboj dubis pri sia kapablo atingi necesan klerigan nivelon, kaj 13% da geknaboj aperigis altan riskon pri intelektaj kaj lingvaj kapabloj... Aŭstralianino de la jaro Fiona Stanley alvokas al pli frua interveno en infanajn problemojn... Koncerne la infanojn, troviĝantajn en senespera fino de disfunkciiga spektro, tiuj decidoj estas vana elspezo de la tempo... Problemoj de aborigenaj aŭstraliaj infanoj estas absolute lokaj kaj ne povas esti solvitaj per klasikaj intervenoj... (malgraŭ tio), ke laboras aŭ ne laboras ilia patrino, petas ili aŭ ne petas helpon por infanoj, estas ili saĝaj aŭ ne, sed ili bezonas ambaŭ gepatrojn. Aŭstralia familio integras per premo kaj malsukcesoj elekstere»⁵⁷.

La donitaj faktoj pruvas tion, ke la infanecaj problemoj estas akraj por malriĉaj kaj riĉaj landoj. Tio estas eternaj problemoj. Sed la ŝtatoj ankoraŭ ne scipovas solvi la problemojn komplekse kaj profunde, komencante de kialoj, sed ne de sekvoj. Voĉdonrajto de infanoj kaj la leĝo pri ĝi malfermos por la ŝtato kaj kune kun ĝi por la familio eblecon de sistema kaj profunda solvado. Certe, tiu ĉi metodo ne estas universala, sed nuntempe ne videblas pli efektivaj metodoj. Ĝuste voĉdonrajto de infanoj, inkluzivita en UN-Konvencion pri

respondecon de unu al la alia. Tio lasas la problemojn nesolvitaj. Necesas al ili unuiĝon kaj efikecon de ilia agado povas garantii nur voĉdonrajto de infanoj kaj LVI.

⁵⁶Age, Monday, 8th December, 2003, page 11 Opinion, «*The children of middle Australia are in crisis*» by Angela Shanahan.

⁵⁷Se familioj de aŭstraliaj aborigenoj kaj iliaj infanoj ne integriĝas al la ŝtato, se la aborigenoj ne partoprenas balotojn, tiam, vere, iliaj problemoj ne solviĝas per klasikaj metodoj, inkluzive voĉdonrajton de infanoj. Tio estas speciala problemo. Ĉu multe da tiaj infanoj ekzistas en la mondo?

infanrajtoj kaj certigita per konvenaj leĝoj en la ŝtatoj de la mondo vere kapablas «konstrui la mondon, indan por la infanoj» kaj «venki la mizeron, diskriminacion, indiferentecon fare de socio al infanoj», kiujn dum la 20-a jarcento kaj «ĝis nun ne povas venki» la landoj de la mondo, kiel konstatis Speciala UN-Sesio en 2002.

24-an de januaro 2004.

La aŭtoroj sincere dankas saĝajn kaj helajn virinojn, edukintajn gefilojn kaj genepojn kaj kontribuantajn la ideon pri voĉdonrajto de infanoj:

Al Larisa Litvinova (Rusio), kiu «starigis» la koncepton;

Al Hilarie Roseman, magistro pri arto, patrino de ok gefiloj kaj avino de dek genepoj (Aŭstralio), kiu ege helpis al la verko per sia bonkoro, per preĝoj, ideoj, konsiloj kaj presitaj materialoj;

Al Aleksandra Aĉilova, Maria Ovĉinnikova, ankaŭ al Vladimir Kavtorin (Rusio) por valoraj rimarkoj.

2.2. Koncepto de internacia kompara esploro pri rilato de gepatroj/zorgantoj al voĉdonrajto de infanoj (Koncepto 2)

Celoj kaj taskoj de la esploro

Ni nomu la Koncepton pri voĉdonrajto de infanoj – «Koncepto – 1», sed la sekvan – «Koncepto—2». En ili estis formulita konvena sociala idealo, kiu rilate la nuntempan realecon estas hipotezo. La hipotezo postulas specialan sociologian esploron, kies argumentadon estas dediĉita Koncepto—2. En ĝi oni konsideras celojn kaj objektojn de la esploro, ĝiaj hipotezoj, demandaro, organizado kaj etapoj k.t.p. Ni formulos ilin koncize.

La celo de la esploro entenas studon pri *rilato* de diversaj sociaj grupoj en diversaj landoj al voĉdonrajto de infanoj. Pri «rilato» ni ĝenerale komprenas «gradon de aprobo aŭ malaprobo (akcepto aŭ malakcepto) de tiu ĉi rajto. La studado pri la grado de rilato de la loĝantaro en diversaj landoj al voĉdonrajto de infanoj permesos difini, kiuj landoj pretas agnoski la rajton, kiuj ne pretas, aŭ ĉiuj landoj malaprobos ĝin, aŭ ĉiuj landoj pretas ĝin agnoski. La pozitiva, same kiel negativa, rezultoj de la esploro havos grandan socialan signifon. La pozitiva rezulto konfirmos, ke la socio havas konscian neceson pri efektiva mekanismo por solvado de infanecaj problemoj pere de akcepto de voĉdonrajto de infanoj kaj konvenan leĝon. La negativa rezulto signifos pri foresto en la socio de simila konscio, kiu metas novan problemon por la esplorado: kial ĝi forestas? (*Ĉu la socio malintegriĝas kaj ne kapablas konscii siajn vivnecajn bezonojn, aŭ ĝi opinias, ke valida mekanismo por la solvado de infanecaj problemoj estas sufiĉa, aŭ ĝi indiferentas al la problemoj, aŭ io alia*).

La spektron de pozitivaj kaj negativaj rezultoj vidu sube.

Taskoj de la esploro. La celo de la esploro dispartiĝas je vico de taskoj laŭ socialaj grupoj kaj landoj.

Laŭsocialaj grupoj la esploro dispartiĝas je tri taskoj: esploro de rilato al voĉdonrajto de infanoj (VI): 1) de gepatroj/zorgantoj, 2) de plenaĝa loĝantaro sen gepatroj/zorgantoj havantaj gefilojn en la aĝo malpli ol 18 jarojn, 3) de geknaboj en la aĝo 14-17 jarojn. Sekve, laŭ la socialaj grupoj, la esploro havas tri konvenajn taskojn.

Al tiuj *sociologiaj* esploroj aliĝas konvenaj *psikologiaj* esploroj, kiuj postulas apartan koncepton. Sekve, laŭ la sociala larĝeco la esploro enmetas en sin la tutan loĝantaron krom geknaboj antaŭ 14 jaroj, kiuj ankoraŭ ne kapablas konscii sian rilaton al VI.

Laŭ la landoj la esploro dispartiĝas je tri partojn: esploro pri rilato al VI fare de loĝantaro de 1) riĉaj landoj, 2) malriĉaj landoj, 3) la plej malriĉaj landoj el la demokratiaj, en kiuj ekzistas balotrajto. La kriterio por distingi la landojn estas totala interna produktado por unu loĝanto kaj la nivelo de enspezoj por unu loĝanto. Tial, laŭ la landoj la esploro havas tri taskojn. La inkludo de diversaj landoj de la mondo faras la esploron *internacia*, kaj la komparo de la rezultoj faras ĝin komparebla. Internacia, sed ne nacia karaktero de la esploro direktas ĝin dekomence ne nur al regiona, sed al globala nivelo. La internacia kaj komparebla karaktero de la esploro ebligas difini malsamajn gradojn de percepto de VI en diversaj partoj de la mondo (globala kaj regiona), ebligas difini rilaton de diversaj landgrupoj (riĉaj, malriĉaj, la plej malriĉaj). En la programo de la esploro por ĉiu lando devas esti donata argumentado pri inkludo de la lando en unu el la tri grupoj. La esploro laŭ la landoj difinos nivelon (globala aŭ regiona) kaj grupon de la landoj (riĉaj, malriĉaj, la plej malriĉaj) eblos komenci VI aŭ nenie eblos. Por kompari la landojn ne nur inter la grupoj, sed ankaŭ en la grupoj, utilas en ĉiu grupo inkludi almenaŭ du landojn.

Do, la celo de la esploro dispartiĝas minimume je 9 taskojn. Tio signifas, ke unu granda esplorado inkludas vicon da apartaj esploroj. *Nia* esploro estas *limigita* nur per kelkaj el tiuj esploroj, kiuj estos difinitaj sube. Al la taskoj konvenas objektoj de la esploro inter socialaj grupoj kaj landaj grupoj, kiuj estas minimumigitaj por nia esplorado.

Gepatroj (zorgantoj) kiel ĉefa objekto de la esplorado

La ĉefa objekto de la esplorado estas gepatroj (zorgantoj) de la infanoj

Rilato de tiu sociala grupo la VI estas ĉefa kaj decidohava por ĝi. La argumentado estas evidenta: se la plenumado de VI estas komisiita al gepatroj/zorgantoj, do, certe de ili dependas la vivo aŭ morto de VI. Se aliaj socialaj grupoj «jesos», sed tiu ĉi «neos», tiukaze ilia «ne» superos ĉiujn «jes». Vere, kiu, krom gepatroj/zorgantoj, scias pli bone infanajn interesojn? Kiu, pli bone ol ili, povas elekti deputitojn por la esprimo de infanaj interesoj? Kiu pli multe amas la infanojn, kiu pli multe zorgas pri ili, kiu pli multe, ol la aliaj,

respondecaj por la infanoj? La respondo estas sola – neniu, krom la gepatroj/zorgantoj. Reala prioritato de la gepatroj/zorgantoj al la infanoj faras tiun socialan grupon unuavice por la esploro pri rilato de loĝantaro al VI. Pro tio nia esplorado *estas limigita nur pri rilato de la gepatroj/zorgantoj* al VI. En tiu ĉi grupo decidan rolon ludas junularo 18-35 aĝaj, kiu en tiu ĉi aĝo fondas familiojn, naskas infanojn kaj edukas ilin dum la plej fruaj, la plej malfacilaj etapoj de socialigo de infanoj. Pro tio nia esploro koncernas, precipe, esploron de junularo, de junaj gepatroj.

Elekto de landoj kaj urboj

Nia esplorado estas limigita nur per du grupoj de landoj: riĉaj kaj malriĉaj, kiuj estas la plej karakterizaj por la nuntempa mondo kaj en kiu vivas plimulto da loĝantaro. (La plej malriĉaj landoj restos por plua esplorado). En la riĉaj landoj oni supozas altan nivelon de infana bonstato kaj tiun de gepatroj/zorgantoj. En la malriĉaj landoj oni supozas multe malpli altan nivelon de bonstato de la infanoj kaj la gepatroj/zorgantoj. Estus ideale esplori *ĉiujn* riĉajn kaj *ĉiujn* malriĉajn demokratiajn landojn, sed por nia esplorado tio ne estas laŭcela. Por tio sufiĉas limigi la elekton per unu paro da landoj el malsamaj kontinentoj. Ekzemple, paro da riĉaj landoj: Usono kaj Francio, Aŭstralio kaj Kanado, Japanio kaj Germanio k.t.p. Nia esploro *limiĝas* per unu paro da riĉaj landoj, ekzemple, Usono kaj Francio aŭ Usono kaj Aŭstralio (la lasta paro estas preferata je la vidpunkto de unueca lingvo). Definitiva elekto estos farita pli poste, depende de la preteco de la sociologoj el la landoj.

El la malriĉaj landoj taŭgas la paro da Rusio kaj Ĉinio, aŭ Rusio kaj Meksiko, aŭ Rusio kaj Brazilo. La definitiva elekto de la paro da malriĉaj landoj ankaŭ estos farita pli poste. Ĉar la iniciato pri la esploro devenas el Rusio, ĝi nepre partoprenos en ĝi. Sekve, entute kvar landoj fariĝos objektoj *en nia* esploro: du riĉaj landoj kaj du malriĉaj.

Por minimumigi la esploron, la elektitaj landoj reduktiĝas al *unu* sufiĉe granda *urbo*. Ekzemple, en Rusio estos elektita Sankt-Peterburgo, havanta preskaŭ kvin milionojn da loĝantoj. Elekton de la urboj en aliaj landoj faras sociologoj (partoprenontoj de la esploro) el tiuj landoj. Tiamaniere, *nia* esploro estas limigita per *kvar* urboj el kvar landoj. Plue, ĝi povos okazi laŭ aprobitaj metodikoj en ajnaj landoj kaj urboj.

Bazaj hipotezoj de la esploro

Laŭ elekto de sociala grupo, landoj kaj urboj kiel objektojn de la esploro ebligas formuli ĉefajn hipotezojn pri rilato de gepatroj/zorgantoj al VI kaj al konvena leĝo en diversaj grupoj da landoj. La hipotezoj respegulas diversajn supozojn *rilate la kaŭzoj kaj sekvoj de pozitiva aŭ negativa rilato* de gepatroj/zorgantoj al VI. La hipotezoj enhavas la ĉefan spektron de la rilato fare de gepatroj/zorgantoj al VI, kiu situas inter «jes» (pozitiva rilato, subteno, akcepto) kaj «ne» (negativa rilato, rifuzo, malakcepto). La rilaton oni konsideras pozitiva aŭ

negativa, se «por» ĝi estis pli *granda* kvanto de la respondantoj ol «kontraŭ». Sekve, la hipotezoj diferenciĝas laŭ la kvalito (pozitivaj aŭ negativaj) kaj laŭ landoj (por riĉaj aŭ malriĉaj landoj). Krom tiuj du, la esploro ankaŭ konsideras nedifintan rilaton, kiu esprimiĝas per la respondoj «mi ne scias», «malfacilas respondi» k.t.p. Tamen la nedifinita rilato ne fiksiĝas sur hipoteza nivelo pro abundaj kialoj, kaŭzintaj ĝin. Tamen la kialoj aperigis sur analiza nivelo de esplorrezultoj. Ekzistas ankoraŭ unu malsameco *inter* grupoj da malriĉaj kaj riĉaj landoj, kiu esprimas *naciajn* diferencojn de rilato al VI ĉe relative egala nivelo de «riĉeco» aŭ «malriĉeco». Tiuj diferencoj estas abundaj, kaj ni ne fiksas ilin sur hipoteza nivelo, sed ili aperos kaj fariĝos atingeblaj sur analiza nivelo de esplorrezultoj.

Bazinte sur la nomitaj premisoj kaj limigoj ni formulu ses bazajn hipotezojn, kiuj estos konfirmitaj aŭ refutitaj per la rezultoj de *nia* esplorado.

Hipotezoj por riĉaj landoj

1. Gepatroj/zorgantoj *ne subtenos* VI, se ili opinias, ke bonstato de infanoj kaj decido de infanaj problemoj estas *kontentigaj* en la lando. Tiukaze, por la landoj la leĝo ne estas aktuala, sed ĝi povas fariĝi aktuala post 5 aŭ 10 jaroj.

2. Gepatroj/zorgantoj *subtenos* VI, se ili opinias, ke la alta nivelo de bonstato de infanoj kaj decido de infanaj problemoj *ne plene sufiĉas* por la lando. Tiukaze akcepto de la leĝo por tiuj landoj fariĝas aktuala.

3. Gepatroj/zorgantoj *ne subtenos* akcepton de VI en sia lando, sed *subtenos* ĝian akcepton en malriĉaj kaj la plej malriĉaj landoj kiel rimedon por malpliigo de naskiĝokvanto en la landoj kaj plialtigo de vivkvalito de ilia loĝantaro. Tiukaze supozeblas helpo fare de riĉaj landoj por ellaboro laŭ realigo de VI en malriĉaj kaj malriĉegaj landoj. Tiu hipotezo esprimas globalnivelan prioritaton pri akcepto de VI. (La spektro de hipotezoj povas esti vastigita).

Hipotezoj por malriĉaj landoj

1. Gepatroj/zorgantoj *ne subtenos* VI, se ili

a) ne kredas al sia ŝtato kaj ĝia kapablo plibonigi bonstaton de infanoj per ajna maniero, inkluzive VI;

b) ili mem estas indiferentaj al bonstato de siaj gefiloj. Tio estas maltrankviliga signalo pri rompo de ligoj inter generacioj kaj pri demoralizo interne de la socio. Ambaŭ kaŭzoj atestas pri sistema krizo de la socio kaj postulas, ke la ŝtato urĝe serĉu rimedojn por solvi la problemojn. Krome, necesas okazigi konformajn sociologiajn esplorojn. Tiukaze, por tiaj landoj la konforma leĝo povas plenumi mobilizan kaj unuigan rolojn en la socio kaj preventi ĝian disfalon.

Tiu ĉi funkcio de la leĝo estas aktualega por la socio, kvankam la socio ne konscias ĝian aktualecn. Tia situacio postulas intensan kaj vastan propagandan kampanjon pri indecoj de VI.

2. Gepatroj/zorgantoj *subtenos* VI, se ili

a) maltrankviliĝas pri bonstato de infanoj kaj pri la solvo de la infanproblemoj en la lando;

b) ili kredas, ke la ŝtato kapablas solvi la problemojn. Tio signifas, ke en la socio konserviĝas reciproka respondeco inter diversaj generacioj (antaŭ ĉio, respondecon de gepatroj por siaj gefiloj) kaj respondeco inter loĝantaro kaj ŝtatpotencoj. Tio subtenas optimismon kaj kredon je plibonigo de bonstato de infanoj kaj je plialtigo de vivkvalito. Tiuokaze la akcepto de la konvena leĝo fariĝas aktuala por la landoj.

3. La gepatroj/zorgantoj *ne subtenos* la akcepton de VI en sia lando, sed subtenos ĝian akcepton en riĉaj landoj kiel modelon por imitado kaj fonton por helpo al malriĉaj landoj. La hipotezo esprimas prioritaton de globala nivelo de VI-akcepto.

La ĝenerala hipotezo de la esploro estas formulata jene: la gepatroj/zorgantoj el malriĉaj landoj plej verŝajne *aprobos* VI, sed la gepatroj/zorgantoj el riĉaj landoj *plej verŝajne ne aprobos* VI. Tio klariĝas per malsameco de bonstato de loĝantaro inkluzive infanojn.

Eblas ankoraŭ unu hipotezo malpli verŝajna je nia vidpunkto: hipotezo pri plimulta respondo «Mi ne scias», kiu atestos pri indiferenteco fare de la gepatroj/zorgantoj al siaj gefiloj aŭ pri nesufiĉa ilia informado pri VI.

Negativa rezulto de la esploro (konfirmo de negativa rilato al VI) havos ne malpli gravan socialan signifon ol pozitiva rezulto.

Demandilo – baza instrumento de la esploro

Konforme kun la celoj, taskoj kaj hipotezoj de la esploro estas ellaborata demandilo, kiu estas baza ilo de selekta pridemandado. La demandilo destenita por plenigi far gepatroj/zorgantoj inkludas mallongan eksplikitan parton, demandojn kaj «pasporton».

Demando:

Rilato de gepatroj/zorgantoj al voĉdonrajto de infanoj

Estimataj gepatroj kaj zorgantoj!

La demando, okazita de internacia grupo de sociologoj celas esplori Vian rilaton al la ideo pri akcepto de Federala Leĝo «Voĉdonrajto de infanoj».

Voĉdonrajto de infanoj estas nova ideo, pro tio Vi, verŝajne, ne scias, kion ĝi signifas kaj kion ĝi donos al Vi, al Viaj gefiloj kaj al la socio entute. Ni koncize klarigos tion.

Voĉdonrajto de infanoj signifas, ke ĉiuj geknaboj, ne havantaj 18 jarojn, ricevas laŭ la Leĝo *rajton* havi balotan voĉon, ili enskribiĝas en listojn por voĉdonado, sed la *plenumado* de la rajto (voĉdonado) estos komisiita al iliaj gepatroj aŭ laŭleĝaj zorgantoj.

La Leĝo estas necesa por forigi en la mondo «mizeron, diskriminacion kaj indiferentecon fare de socio al infanoj», kiel konstatis Speciala UN-Sesio laŭ la infanproblemoj en 2002.

La Leĝo likvidos aĝan censon, kaj tio metos finon al indiferenteco fare de socio al infanoj. Ĝi venkos politikan diskriminacion de infanoj kaj egaligos ilin kun plenaĝuloj rilate la balotrajtojn. Ties rezulto estos fondado en Leĝdonantaj organizoj de tia *parlamentaj plimulto*, kiu kreas ŝtatan mekanismon por efektiva solvado de infanproblemoj (klerigado, sano, krimo, narkotaĵoj, senhejmeco, prostituo k.a.). La mekanismo trovos resursojn por ega plibonigo de infana bonstato kaj plialtigo de vivkvalito de iliaj familioj. Ĝi levos la aŭtoritaton kaj rolon de gepatroj, precipe de patrinoj. Ĝi garantios prioritatan financadon de sociala sfero kaj signifan plialtigon de salajro al instruistoj, kuracistoj kaj aliaj, kiuj okupiĝas kun infanoj. Se ĝi estos akceptita, gajnos ĉiuj grupoj de loĝantaro.

Tamen, ĉu Vi, gepatroj deziras voĉdoni por Viaj gefiloj? Ĉu maltrankviliĝas Vi pri solvado de infanproblemoj kaj pri situacio de infanoj? Ĉu Vi pretas plenumi voĉdonrajton por viaj gefiloj? Ĉu vi bezonas tion? Jen estas la ĉefa demando.

Viaj respondoj al la demandoj de la demandilo helpas kontroli niajn hipotezojn, difini Vian rilaton al voĉdonrajto de infanoj en diversaj landoj de la mondo.

La demandilo estas preparita de L.Semaŝko, doktoro de filozofiaj sciencoj, docento. Rusio, kaj Marta Ross Dewitt, doktoro de filozofio, Usono.

Demandilo

(Anonimeco garantiitas. Faru cirklon al nur unu respondo je ĉiu demando).

1) Laŭ Via opinio, kiomgrade gravas la infanproblemoj por nia socio?

1. (Tio estas la plej gravaj problemoj, ĉar la estonta socio dependas de niaj gefiloj)
2. (Ili estas gravaj, sed ne unuagrada. Nomu 1-2 pli gravajn problemojn:
3. (Mi ne scias)

2) Ĉu kontentigas Vin nivelo de la ŝtata solvado de sekvaj infanproblemoj:

1. Antaŭlerneja edukado kaj lerneja klerigo? 1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes
2. Obsteriko kaj por infana sanprotektado? 1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.
3. Malaltigo de naskiĝokvanto? 1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.
4. Somera ripozo, libertempo kaj sporto por infanoj? 1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.
5. Orfeco kaj senhejmeco de infanoj? 1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.
6. Narkotismo, krimeco, prostituo de infanoj? 1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.

3) Ĉu vi opinias, ke necesas plialtigi ŝtatan respondecon por infanaj problemoj?

1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.

4) Kio povas plialtigi ŝtatrepondecon por la infanaj problemoj?

1. (Plialtigo de ŝtata monhelpo por infanoj)
2. (Konvena leĝo)
3. (Voĉdonrajto de infanoj kaj rezultita pro tio parlamenta plimulto)
4. (Io alia, skribu:)

5) Ĉu utilas formi parlamentan plimulton por interesoj de infanoj?

1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.

6) Se Vi ricevos rajton voĉdoni por Viaj infanoj, ĉu Vi uzos ĝin?

1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.

7) Se voĉdonrajto de infanoj sole garantios parlamentan plimulton por interesoj de infanoj, do kiel Vi rilatos al la rajto?

1. (negative). 2. (mi ne scias). 3. (pozitive).

8) Ĉu Vi partoprenas ĉiunivelajn balotojn?

1. ne. 2. iam. 3. jes.

9) Ĉu Via partopreno en balotoj influas nun por ŝtata decido pri infanaj problemoj, por plibonigo de la vivo de Viaj infanoj?

1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.

10. a) Ĉu riĉaj landoj povas aprobi la akcepton de voĉdonrajto de infanoj en malriĉaj landoj, se ĝi plibonigos ilian bonstaton kaj demografian situacion?

(La demando nur por riĉaj landoj) 1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.

10. b) Ĉu malriĉaj landoj povas aprobi akcepton de voĉdonrajto de infanoj en riĉaj landoj kiel rimedo por plialtigo de kvalito de loĝantaro kaj vivo?

(La demando nur por malriĉaj landoj) 1. ne. 2. mi ne scias. 3. jes.

11) Kiomgrade detale Vi konas la ideon pri voĉdonrajto de infanoj kaj ĝiaj socialaj postsekvoj?

- a) (Mi detale scias la ideon kaj ĝiajn postsekvojn)
- b) (Mi parte scias la ideon kaj ĝiajn socialajn postsekvojn)
- c) (Mi eksciis pri la ideo el Via demandilo)

Viaj donitaĵoj

12) Via rolo rilate infano(j)n.

a) (Patrino). 2. (Patro). 3. (Zorgantino). 4. (Zorganto).

13) Via aĝo (plenaj jaroj): 1. (18-25). 2. (26-35). 3. (36-50). 4. (pli ol 50).

14) Kvanto de Viaj gefiloj en ĉiu aĝa grupo (enkrampe notu la kvanton)

1. () 0-6 jaroj. 2. () 7-11 jaroj. 3. () 12-17 jaroj

15. Vi edukas Viajn gefilojn

1. (sola ino/sola viro). 2. (Kun edzo/edzino). 3. (Sole, sed kun helpo de aliaj plenaĝuloj).

16) Via klereco

1. (Ne plena meza). 2. (meza). 3. (supera).

17) Via labora stato

1. (mi laboras). 2. (mi ne laboras)

18) Sfero de Via ĉefa okupo

1. (Sociala sfero: sanprotektado, klerigo, sporto, pensiulo, dommastrino, studento, invalido k.t.p.)

2. (Informa sfero: sciencisto, ĵurnalista, programisto, projektisto, inĝeniero, reklamisto, komunikisto k.t.p.)

3. (Organiza sfero: politikisto, juristo, manaĝero, financisto, asekuristo, militisto k.t.p.)

4. (Materia sfero: laboristo, terkulturisto, farmisto, komercisto, trafikisto k.t.p.)

19) Enspezo por unu familiano monate

en rubloj

1. (0-1500). 2. (1501-3000). 3. (3001-5000). 4. (5001-10000). 5. (10 001-30 000). 6. (pli ol 30 000)

en dolaroj

1. (0-50). 2. (51-100). 3. (101-170). 4. (171-330). 5. (331-1000). 6. (pli ol \$ 1000)

(La skalo taŭgas nur por Rusio. Por aliaj landoj necesas fari konvenajn skalojn, kiuj respegulas malaltan, mezan kaj altan klasojn. Ĉiuj skaloj devas esti kondukita al dolara skalo por komparo).

Dankon por la respondoj!

La demandilo estas egala kaj por malriĉaj kaj por riĉaj landoj, krom unu-du demandoj. Ĝi havas 10-11 ĉefajn demandojn kaj ok demandojn laŭ pasportaj donitaĵoj. La ĉefaj demandoj ebligas ekspliki la rilaton de la respondanto al diversaj aspektoj de infaneco, komencante de la plej ĝeneralaj, de taksado pri graveco de infanproblemoj por la socio, ĝis la plej konkretaj, koncernantaj la rilaton al voĉdonrajto de infanoj en diversaj variantoj. La ĉefaj estas demandoj 5-7. La demandoj pri pasportaj donitaĵoj permesas difini gravajn por tiu ĉi esplorado socialajn grupojn, laŭ kiuj distingiĝas la respondantoj kaj iliaj respondoj, pri kiuj estos difinita reprezentantiveco de la elmetaĵo. La demandoj konformas al Koncepto de la esploro kaj permesas ricevi sufiĉe precizan kaj riĉan bildon laŭ ĉiuj ĝiaj hipotezoj. *La unuo en nia esploro estas unu el la gepatroj/zorgantoj, havantaj gefilojn en la aĝo antaŭ 18 jaroj.*

(En esploroj de aliaj socialaj grupoj estos aliaj unuoj de observado. Por ties esploro aŭ por la tuta loĝantaro estas ellaborataj aliaj variantoj de demandilo).

Specialeco kaj reprezentantiveco de la esploro; metodo de hazarda elmetado

Nia esploro, konforme kun ĝia koncepto kaj la demandilo, malfacilas atribui al iu unu specon de sociologia esploro. Ĝi havas trajtojn de diversaj ĝiaj specoj. Tio distingas ĝin de la aliaj.

Unue, ĝi estas ennoviga, tio estas, ke neniu kaj nenie ĝi okazis. Ĝi tuŝas la rilaton de socio al la nova problemo pri voĉdonrajto de infanoj, kiu ankoraŭ ne estas bone konsciata kaj studata. Pro tio la esplorantoj devas esti pretaj al multe da komplikaĵoj kaj surprizoj, kiuj akompanas novaranĝon.

Due, ĝi estas esploro *surkampa* (sed ne enlaboratoria) kaj diagnoza (havanta problemojn), kiu havas celon evidentigi praktikan socialan problemon pri voĉdonrajto de infanoj kaj trovi vojon por ĝia solvado.

Trie, ĝi estas *pilota* en tiu senco, ke ĝi havas vicon da fortaj limigoj (laŭ sociala grupo, laŭ kvanto da urboj, landoj k.t.p.), kiuj faras ĝin komenca etapo antaŭ pli vastaj esploroj.

Kvare, ĝi estas *amasa* (sed ne eksperta), kies ĝeneralan tutecon konsistigas milionoj da observunuoj (gepatroj/zorgantoj). Nur en Sankt-Peterburgo la kvanto de ĝenerala tuteco de gepatroj/zorgantoj estas 1,5 de milionoj, kaj la loĝantaro de la urbo estas 4,7 de milionoj kaj la kvanto da infanoj ĉirkaŭ 1 miliono.

Kvine, ĝi povas esti nur *elmeta*, sed ne absoluta. Reprezentantiva elmetaĵo laŭ nia taksado, estas 1000 unuoj de observado, tio estas 1000 gepatroj kaj zorgantoj en la esplorata urbo.

La elmetaĵo devas esti reprezentantiva al ĝenerala tuteco laŭ la sekvaj dimensioj (grupoj):

- laŭ rolo (patrino, patro, zorganto)
- laŭ sekso
- laŭ aĝo
- laŭ proporcio de diversaĝaj infanoj
- laŭ proporcio de plenaj kaj neplenaj familioj
- laŭ klereco
- laŭ enspezoj
- laŭ okupateco

(Tio estas maksimumaj postuloj al reprezentiveco. La minimumaj postuloj povas enhavi tri parametrojn: sekso, aĝo, klereco).

Ĉiuj dimensioj de la respondintoj oni enmetas en la tabelon de donitaĵoj. Per la metodo de formigo de elementa tutaĵo aperas hazarda stratifika elmetaĵo. Ĝi donas stratifikan elmetan tutaĵon, kiu garantias la plej validan konsideron de la ĝenerala tutaĵo.

Etapoj kaj datoj de la esplorado

Proksimume la etapo kaj limdatoj de la sociologia esploro estas jenaj:

Prepara etapo: novembro 2003 – februaro 2004 (koncepto, organizado, financado)

La 1-a etapo: esploro de gepatroj/zorgantoj en 4 urboj de 4 landoj: marto 2004 – junio 2004. La rezultoj de la etapo oni prezentas kiel komuna raporto al 36-a Universala Kongreso de Internacia sociologia instituto en Pekino en julio 2004. La raporto estos sendita al UNICEF.

La 2-a etapo: esploro de gepatroj/zorgantoj en 4 landoj (esploro de landoj, sed ne urboj). Septembro 2004 – decembro 2004.

La 3-a etapo: esploro de plenaĝa loĝantaro krom gepatroj/zorgantoj kaj infanoj en la aĝo 14-17 jaroj en 4 urboj de 4 landoj de la mondo: januaro 2005 – junio 2005.

La 4-a etapo: esploro de la samaj objektoj, sed nur laŭ landaj niveloj. Septembro 2005 – decembro 2005.

La 5-a etapo: preparo de resuma raporto laŭ ĉiuj objektoj de 4 landoj kaj raporto de esplorplano de la similaj objektoj sur kvin kontinentoj (po 5 landoj sur ĉiu kontinento plus Aŭstralio): januaro 2006 – junio 2006.

Surbaze de la resuma raporto oni faras komunan raporton por la 16-a Universala Sociologia Kongreso de Internacia Sociologia Asocio en Durban (Afriko) en julio 2006. La resuma raporto kaj prelego estos sendita al UNICEF kun konvenaj proponoj.

Alternativa (plisimpliga) varianta de la esploro

La prepara etapo: novembro 2003 – februaro 2004 (koncepto, organizado, financado).

La 1-a etapo: esploro de 1000 plenaĝuloj en kvar urboj de kvar landoj: marto 2004 – junio 2004.

La 2-a etapo: esploro de la rilato far loĝantaro al LVI en tri nomitaj grupoj en 4 landoj (esploro de landoj sed ne urboj). Septembro 2004 – junio 2005.

La 3-a etapo: esploro pri rilato de loĝantaro (en tri nomitaj grupoj) al VI sur 4 kontinentoj po 4-5 landoj sur ĉiu. Septembro 2005 – decembro 2005.

La 4-a etapo: kunmetado de resuma raporto laŭ ĉiuj objektoj de 4 kontinentoj (+ Aŭstralio). Januaro 2006 – junio 2006.

Kolekto kaj prilaboro de donitaĵoj de la unua etapo

Kiel estis indikite, la kolekto efektiviĝas per metodo de selekta demando de gepatroj/zorgantoj de kvar grandaj urboj en kvar landoj. Por ĉiu urbo estos farita propra esplorprogramo, sed la metodo de priskribo de la elmeta tutaĵo restas la sama – hazarda stratifika elmetaĵo. La kvoto de la elmetaĵo por ĉiu urbo determiniĝas en la limoj ĉirkaŭ 1000–1500 unuoj de la observado.

La kolekto de donitaĵoj efektiviĝas helpe de la demandilo, kies modelon ni prezentis supre. La demandado de gepatroj oni efektivigas en antaŭlernejaj kaj lernejoj institucioj (aŭ en lernejoj distriktoj en tiuj landoj, en kiuj ili ekzistas). En lernejoj estas utile ĝin efektiviĝi dum gepatraj kunvenoj de diversaj klasoj. Pri zorgantoj necesos informiĝi per fakoj de klerigo (aŭ lernejoj distriktoj) kaj interparoli kun ili pri la demandado.

Alternativa metodo de kolekto de informo. La kolekto de informoj efektiviĝas per telefonaj intervjuoj laŭ reprezentativa elmetaĵo (1000 respondantoj). La kontrolo de elektata tutaĵo okazas laŭ parametroj pri sekso, aĝo, nivelo de klereco. La metodo permesos ricevi respondojn laŭ la esplorita temo, donos informon pri kvanto de loĝantaro, havantaj neplenaĝajn infanojn, pri kvanto de infanoj en diversaj socialaj grupoj de loĝantaro, pri kvanto da neplenaj familoj, pri kvanto de infanoj, havantaj zorgantojn. La metodo donos eblecon kompreni rilaton al VI ne nur fare de gepatroj/zorgantoj havantaj neplenaĝajn infanojn, sed ankaŭ fare de alia loĝantaro.

En diversaj landoj eblas apliki sian propran metodon de kolekto de informoj, sed gravas, ke ĝi garantiu reprezentivecon kaj kompareblecon de la rezultoj.

Post ricevo de necesa kvanto da demandilo okazos statistika prilaboro de la kolektitaj informoj. Ĝi inkludas kontrolon de plenigitaj demandiloj, kompletigo de duonaj respondoj, kodigon de la respondoj, formigo de diversaj statistikaj grupoj, farado de tabeloj, kalkulado de averaĝaj kaj aliaj statistikaj karakterizaĵoj.

Analizo kaj formo de prezento de esplorrezultoj

Analizo de esplorrezultoj inkludas analizon de distribuaj vicoj, enhavantaj respondojn al ĉiu demando, farado de komuna portreto pri esplorata tutaĵo de respondantoj, farado de laŭgrupaj tabeloj konforme kun ĉefaj analizaj direktoj, kiuj estas kunligitaj kun la demandoj 5-7 de la demandilo. Specialan atenton oni turnu al kompara analizo de esplorrezultoj laŭ du linioj: inter riĉaj kaj malriĉaj landoj kaj interne de tiuj landoj.

La esplorrezultoj prezentiĝas laŭ ĉiu el kvar urboj en du lingvoj: la nacia kaj la angla (por angloparolantaj landoj – en unu lingvo). La rezultoj kunmetiĝas en unuecan raporton, surbaze de kiu estas kompilita komuna konkludo. La raporto kaj konkludo estas pridiskutataj

de la esploristoj. La raporto kaj konkludo kun konformaj proponoj estas prezentataj al al UNICEF, al sociologiaj Kongresoj, al ŝtataj organoj, al amaskomunikiloj, al interesiĝantaj politikaj partioj kaj sociaj organizoj.

Organizado kaj financado de la esploro

En la unua etapo por la esplorado oni formas en ĉiu urbo de kvar landoj propran sociologian grupon, kies kvanto difiniĝas pro specialaĵoj de ĉiu urbo, sed inter 2-5 personoj. Ĉiu nacia sociologia grupo elektas sian gvidanton. La naciaj grupoj unuiĝas en internacian grupon, kiu elektas du gvidantojn: krea kaj administranta. La komunikado inter la membroj de la internacia esplorgrupo efektiviĝas plejparte per elektronika poŝto.

La internacia esplorgrupo difinas, sub protektado de kiuj internaciaj organizoj ĝi funkcias. La plej adekvata estas protektado de UNICEF, kiu kiel Infana fondaĵo de UN koncentrigas ĉiujn internacie-gravajn esplorojn kaj projektojn koncerne infanojn. La voĉdonrajto de infanoj certe estas globale signifoplena esplora kaj praktika projekto, konsideranta infaninteresojn de la tuta mondo. Tial la internacia esplorgrupo devas aspiri UNICEF-protektadon. Aliaj internaciaj, regionaj kaj naciaj organizoj: Internacia, Eŭropa, Usona sociologiaj, virinaj, gepatraj, junularaj asocioj, Internacia sociologia instituto k.a. ankaŭ povus protektadi la esploron, konsiderante ĝian financadon kaj formadon de esplorgrupo surbaze de jam ekzistantaj sociologiaj laboratorioj kaj centroj.

La financajn problemojn devas solvi la internacia grupo kune kun organizoj, sub kies protektado efektiviĝas la esploro. Certe, eblas atendi, ke la organizoj fariĝos, se ne solaj, sed almenaŭ ĉefaj financaj fontoj. La ampleksoj de la financado difiniĝas laŭ la landoj kaj etapoj de la esploro konforme kun ampleksoj de laboro kaj kun normoj de salajro de sociologoj en la landoj. Ekzemple, la prepara kaj la unua etapo en Rusio, en Sankt-Peterburgo *postulos proksimume \$ 10 000*, el kiuj 5000 necesas por la demandado kaj 5000 necesas por preparado de koncepto kaj raporto laŭ la unua etapo.

Ĉiuj demandadoj de la loĝantaro laŭ nia temo en ĉiuj etapoj povas efektivigi Agentejo de Sociala Informo (ASI) en Sankt-Peterburgo, kiu estas unu el la plej famaj esplorcentroj en Rusio.

ASI pretas aliĝi al la internacia esplorprojekto «Rilato de diversaj loĝantaraj grupoj en diversaj landoj al voĉdonrajto de infanoj». En 2003 ASI jam efektivigis internacinivelan esploron «**Eŭropa projekto**», farita laŭ mendo de informagentejo «Rosbalt» antaŭ 300-jariĝo de Sankt-Peterburgo. La ĉefa celo de la projekto estis elaperigo de rilato de respondantoj al la festado de Sankt-Peterburga jubileo kaj ankaŭ al aliaj aktualaj internaciaj problemoj. Unikeco de la projekto estas en tio, ke la pridemandado estis okazita en ties naciaj

lingvoj en 12 ĉefurboj de Orienta Eŭropo el oficejo de ASI. Entute estis pridemanditaj 1500 respondantoj.

La urboj, inkluditaj en la demandado:

Amsterdamo (Nederlando)

Bruselo (Belgio)

Vieno (Aŭstrio)

Hamburgo (Germanio)

Kopenhago (Danio)

Londono (Britio)

Madrido (Hispanio)

Oslo (Norvegio)

Parizo (Francio)

Romo (Italio)

Stokholmo (Svedio)

Helsinko (Finnlando)

En januaro 2004 ASI okazigos sekvan internacian demandadon en 8 ĉefurboj de Okcidenta Eŭropo. En la kadroj de la demandado oni pristudos rilaton de eŭropanoj al diversaj pozicioj de Konstitucio de Eŭropa Unio kaj pri la ebleco por Rusio aliĝi al Eŭropa Unio.

Tianivelaj internaciaj demandadoj oni efektivas surbaze de metodo kun uzado de komputila sistemo por okazigo de telefonaj demandadoj CATI BELLVIEW FUSION/TCI (Computer Assisted Telephone Interviewing). La teknologio permesas plej rapide ricevi precizajn kaj fidindajn donitaĵojn. La ĉefa avantaĝo de CATI-uzado kompare kun aliaj esploraj teknologioj estas tio, ke la procezoj de kolektado kaj enkonduko de donitaĵoj okazas paralele. Tio ebligas ricevi dum limigita tempo necesan informamplekson pri ajna demando.

Efektiviĝas plena kontrolo pri la laboro de intervjuantoj. Rezulte la kvalito de la ricevita informo estas tiel alta, kiom tio eblas dum okazigo de demandadoj.

La kosto de unu intervjuo, okazigita laŭ sistemo CATI ŝanĝiĝas depende de la metodo de elmetaĵo, de la necesaj kvotoj, de la daŭro de intervjuo, de urbo kaj lando, en kiuj loĝas respondantoj. La demandado povas esti en ĉiuj eŭropaj lingvoj kaj en aliaj ĉefaj mondlingvoj.

En la tabelo estas kalkulado de kosto de unu telefona dekminuta intervjuo en usonaj dolaroj pere de la demandilo.

| | | | | |
|--|--------|--------------|---------------|----------------|
| | Sankt- | Aliaj rusiaj | Eŭropaj urboj | Urboj de aliaj |
|--|--------|--------------|---------------|----------------|

| | Peterburg | urboj | (averaĝe) | kontinentoj |
|--|-----------|-------|-----------|-------------|
| Ĉefaj kvotoj: Sekso Aĝo Klereco (simpligita varianto) | 2 | 5,3 | 13,2 | 15,8 |
| Aldona kvoto: Laŭ gepatroj/zorgantoj (pligrandiĝas tempaj elspezoj por serĉado de respondantoj je 2,5 fojoj) | 5 | 13 | 33 | 39,6 |

Demandado de 1000 respondantoj (gepatroj/zorgantoj) en Sankt-Peterburgo, okazigita pere de uzado de komputila sistemo per telefonaj demandoj CATI BELLVIEW FUSION/TCI kostas \$ 5 000, en alia rusia urbo -- \$ 13 000, en eŭropa urbo -- \$ 33 000, en alikontinentaj urboj -- \$ 40 000.

Sekve la prepara kaj la unua etapo de la esploro postulos nur \$130000. La alternativa (plisimpligita) varianto postulos \$ 55 000.

Tiaspeca demandado okupas ne malpli ol 1,5 monatoj, se esploratas unu urbo, kaj preskaŭ 2,5 monatoj se oni esploras 4 urbojn. Tiuj limdatoj inkludas preparlaborojn, kampan periodon, analizon de la donitaĵoj kaj preparado al la prezentado.

Kontaktaj personoj de ASI:

Tatjana Ŝajdarova, ĝenerala direktoro
Roman Mogilevskij, scienca gvidanto.

Agentejo de Socialaj Informoj

Str. Zastavskaja 21/2, oficejo 305,
196084 Sankt-Peterburg, RUSIO
Tel. (812) 380-29-84
Fakso (812) 380-29-85
E-mail info@asinfo.ru
<http://www.asinfo.ru>

Konklude, ni rimarkas, ke Koncepto-1 estas teori–metodologia argumentado de la proponita internacia kompara esploro, sed Koncepto-2 difinas ĝeneralajn kadrojn por prilaboro de ĝiaj programoj kaj plan-grafikaĵoj en diversaj landoj.

3. Projekto «Leĝo pri voĉdonrajto de infanoj» en Rusia Federacio

(prilaborita de L.Semaŝko)

Ĉapitro 1. Ĝeneralaj tezoj

Artikolo 1. Limoj de funkciado de la Federala leĝo

1. Limoj de funkciado de tiu ĉi Federala leĝo inkludas neplenaĝajn geknabojn antaŭ 18 jaroj kaj iliajn gepatrojn kaj zorgantojn, kiuj estas civitanoj de Rusia Federacio.

2. Per tiu ĉi Federala leĝo estas difinitaj la ĉefaj kondiĉoj por realigo fare de geknaboj de Rusia Federacio iliajn konstituciajn rajtojn por partopreno en balotoj kaj referendumoj, okazitaj sur la teritorio de Rusia Federacio konvene kun Konstitucio de Rusia Federacio, federalaj leĝoj, konstitucioj (statutoj) de laŭleĝaj subjektoj de Rusia Federacio, statutoj de municipaj instancoj.

3. Tiu ĉi Federala leĝo havas rektan efikon kaj estas aplikata sur la tuta teritorio de Rusia Federacio.

4. Per Federalaj konstituciaj leĝoj, per aliaj federalaj leĝoj, per leĝoj de subjektoj de Rusia Federacio povas esti akceptitaj kondiĉoj de voĉdonrajtoj kaj rajtoj por partopreno en referendumoj de infanoj de Rusia Federacio, kompletigitaj kondiĉojn, starigitajn per tiu ĉi Federala leĝo kaj ne kontraŭaj al ĝi.

5. La bazaj kondiĉoj de voĉdonrajto de infanoj kaj rajto por ilia partopreno en referendumo en Rusia Federacio, starigitaj per tiu ĉi Federala leĝo, kaj ankaŭ suplementaj kondiĉoj, akceptitaj per alia leĝo, povas esti ŝanĝitaj nur per enmeto de la ŝanĝoj kaj suplementoj en la koncernaj leĝoj.

6. Federalaj leĝoj, konstitucioj (statutoj), leĝoj de la subjektoj de Rusia Federacio, aliaj laŭnormaj juraj aktoj pri balotoj kaj referendumoj, akceptitaj aŭ akceptataj en Rusia Federacio ne devas kontraŭstari al tiu ĉi Federala leĝo. Se federala leĝo, konstitucio (statuto), leĝo de subjekto de Rusia Federacio aŭ alia laŭnorma jura akto pri balotoj kaj (aŭ) referendumo kontraŭstaras al tiu ĉi Federala leĝo, tiuokaze estas aplikataj normoj de tiu ĉi Federala leĝo.

7. La Federala Leĝo pri voĉdonrajto de infanoj de Rusia Federacio kompletigas Federalan Leĝon de 12 jun. 2002 «Pri bazaj garantioj de balotrajtoj kaj rajtoj pri partopreno en referendumo por civitanoj de Rusia Federacio en la parto pri voĉdonrajto de infano(j) kaj

konservas ĉiujn ĝiajn normojn krom tiuj, kiuj kontraŭstaras al la normo de tiu ĉi Federala Leĝo pri voĉdonrajto de infanoj.

Artikolo 2. Bazaj terminoj kaj nocioj.

Por la celo de tiu ĉi Federala leĝo aplikataj terminoj kaj nocioj signifas:

1) *infano(j)* – estas civitano(j) de Rusia Federacio havantaj aĝon ekde naskiĝo ĝis 18 jaroj (ĝis plenaĝo), posedantaj laŭ Konstitucio de Rusia Federacio «rajton elekti» (artikolo 32.2) «de naskiĝo» (17.2); civitaneco de infano(j) estas determinataj de Federala leĝo RF de 31 majo 2002 *Pri civitaneco de Rusia Federacio* (artikolo 12);

2) *gepatroj* – estas civitanoj de Rusia Federacio, havantaj infano(j)n ĝis 18 jaroj por la celo de tiu ĉi Leĝo; la patreco certiĝas per respektivaj dokumentoj: atesto pri naskiĝo de infano, atesto pri adopto de infano kaj per aliaj dokumentoj, validaj sur la teritorio de Rusia Federacio;

3) *zorganto(j)* – estas civitano(j) de Rusia Federacio, kiuj dokumentigis la zorgadon por unu aŭ kelkaj infanoj konvene kun la Leĝoj kaj normoj de Rusia Federacio;

5) *domicilo* de infano(j) tio estas adreso (nomo de subjektoj de Rusia Federacio, distrikto, urbo, alia loĝloko, numero de domo kaj apartamento aŭ ŝtata kaj sociala infanzorgejo), en kiu infano(j) de Rusia Federacio estas registrita(j) en organoj pri registrado de civitanoj laŭ la loko de ĉeestado aŭ la loko de loĝado en la kadroj de Rusia Federacio;

6) *bulteno infana (infanbulteno)* – balotilo de infano, balotilo de infano por referendumo; la balotilo estas donata al unu el gepatroj aŭ zorgantoj de infano fare de baloteja komisiono post montrado de necesaj dokumentoj kaj konvene kun la normoj de tiu ĉi Leĝo;

7) *deputito infana (junulara)* – persono, elektita pere de voĉoj (balotiloj) de infanoj kaj iliaj gepatroj aŭ laŭleĝaj zorgantoj de konvena elekta distrikto en reprezentantan organon de ŝtata potenco aŭ en reprezentan municipan organon surbaze de ĝenerala elektorajto ĉe sekreta voĉdonado;

8) *memstara voĉdonanto* – civitano de Rusia Federacio post 18 jaroj, enmetita en balotilon kaj havanta aktivan balotrajton;

9) *nememstara voĉdonanto* – tio estas infano, civitano de Rusia Federacio ĝis 18 jaroj enmetita en elektoliston, havanta aktivan kaj aktualan voĉdonrajton, kiu estas plenumata fare de unu el la gepatroj aŭ zorgantoj;

10) *voĉdonrajto aktiva (aktiva voĉdonrajto)* de infano(j), tio estas rajto de infano(j) de Rusia Federacio elekti en organojn de ŝtata potenco kaj organojn de municipa memregado pere de siaj gepatroj aŭ zorgantoj;

11) *voĉdonrajto pasiva (pasiva voĉdonrajto)*, tio estas rajto de civitanoj de Rusia Federacio ekde 18 jaroj esti elektitaj en organojn de ŝtata potenco kaj en organojn de municipa memregado;

12) *malesto de pasiva voĉdonrajto de infano(j)* tio estas senrajtigo de infano(j)n de Rusia Federacio esti elektita en organojn de ŝtatpotenco kaj en organojn de municipa memregado kaŭze de jura malkapableco, nekapableco okupi elektajn oficojn en la ŝtato;

13) *elektorajto por voĉo (rajto por balotilo)* – konstitucia rajto de civitanoj de Rusia Federacio elekti ekde naskiĝo en organojn de ŝtatpotenco kaj en organojn de municipa memregado;

14) *elektorajto por voĉdonado (rajto por uzado de balotilo)* – konstitucia rajto de civitanoj de Rusia Federacio ekde 18 jaroj elekti en organojn de ŝtata potenco kaj en organojn de municipa memregado de sia nomo kaj de la nomo de siaj gefiloj (infano); plenaĝaj civitanoj rajtas voĉdoni nur por si mem kaj por siaj neplenaĝaj gefiloj; voĉdonado por aliaj elektantoj, partoprenantoj de referendumo ne estas permesita;

15) *voĉdonrajto de infano(j)* – konstitucia rajto de infano(j) de Rusia Federacio elekti en organojn de ŝtata potenco kaj organojn de municipa memregado;

16) *voĉdonrajto de gepatroj kaj zorgantoj anstataŭ siaj infano(j)* – rajto de civitanoj ekde 18 jaroj voĉdoni por siaj infano(j);

17) *voĉdonrajto de plenaĝuloj* – konstitucia rajto de civitanoj de Rusia Federacio ekde 18 jaroj voĉdoni por si, esti memstara elektanto;

18) *ĝenerala elektorajto* – konstitucia rajto de civitanoj de Rusia Federacio, inkludanta rajton voĉdoni; ĝenerala elektorajto de Rusia Federacio estas komuna (disvastigita por ĉiuj civitanoj, inkludante infanojn kaj ĉiun plenaĝulojn, jure plenrajtajn) kaj sekreta;

19) *porelekta voĉo* – elektan balotilon de civitano de Rusia Federacio;

20) *voĉdonanto (elekta dum balotoj aŭ referendumo)* – uzado de balotilo(j) fare de civitanoj de Rusia Federacio ekde 18 jaroj;

21) *potenciala voĉdonrajto de infano(j)* – rajto de ĉiu(j) infano(j) de Rusia Federacio havi elektan voĉon;

22) *aktuala voĉdonrajto de infano(j)* – rajto de limigita kvanto de infanoj de Rusia Federacio anstataŭ kiuj tiu ĉi Leĝo permesas voĉdoni al iliaj gepatroj kaj zorgantoj; pretekstoj kaj gradoj de la limigo estas determinitaj per tiu ĉi Leĝo (ili prilaboriĝas speciale);

23) *kandidato infana (junulara)* – persono, proponita laŭ la ordo, determinita per tiu ĉi Federala Leĝo, aŭ per alia leĝo, kiel pretendanto por ofico, kiu okupiĝas per baloto, aŭ por membreco en organo de ŝtatpotenco, aŭ por organo de municipa memregado aŭ registrita de

konvena elektkomisiono kiel kandidato flanke de gepatroj kaj zorgantoj de infanoj aŭ de diversaj unuiĝoj por gepatroj kaj zorgantoj;

24) *listo de infanaj (junularaj) kandidatoj* – unuiĝinta listo de kandidatoj, proponita far partio, elekta asocio aŭ far alianco de gepatroj kaj zorgantoj dum balotoj en leĝodonantan (reprezentantan) organon de ŝtatpotenco, reprezentantan aŭ alian elektitan organon de municipa memregado, ankaŭ la listo certigita aŭ registrita fare de balotkomisiono, organizanta la baloton.

Ĉapitro II. Bazaj normoj

Artikolo 3. Voĉdonrajto de infanoj de Rusia Federacio

1) Voĉdonrajto de infano(j) de Rusia Federacio supozas disdividon de voĉdonrajto al aktiva kaj pasiva, potenciala kaj aktuala, kaj ankaŭ al voĉdonrajto por balotilo, apartenanta al infano, kaj voĉdonrajto por uzado de balotilo, apartenanta al gepatroj aŭ laŭleĝaj zorgantoj de infano.

2) Al infanoj de Rusia Federacio apartenas nur aktiva voĉdonrajto (rajto elekti), sed al ili ne povas aparteni, pro ilia jura nekapableco, pasiva voĉdonrajto (rajto esti elektita).

3) Al la infanoj de Rusia Federacio apartenas nur elektorajto por voĉo (rajto posedi infanan elektantan balotilon), sed al ili ne povas aparteni, pro ilia nekapableco, rajton por balotado (faktan uzon de infana elekta balotilo dum balotoj aŭ referendumo), kiu estas komisiita al iliaj gepatroj aŭ juraj zorgantoj.

4) La infanoj de Rusia Federacio ekde la naskiĝo estas provizitaj per potenciala voĉdonrajto, kiu faras ĉiun infanon posedanto de potenciala elekta voĉo.

5) Enskribo de infano en elektajn listojn kaj la posedo de la infano per infana elekta balotilo garantias nur aktualan voĉdonrajton de infanoj.

6) Aktualan voĉdonrajton povas havi nur du infanoj de unu el la gepatroj aŭ zorganto en Rusia Federacio; ĉiu patro (aŭ patrino) aŭ zorganto povas enmeti en elektan liston ne pli ol du el siaj infanoj kaj ricevi por voĉdonado ne pli ol du infanajn balotilojn.

7) Ekde la naskiĝo de la unua aŭ la dua infano ili (la infanoj) tuj estas provizigitaj per aktuala voĉdonrajto. La aktuala voĉdonrajto de mortinta infano aŭtomate transdoniĝas al alia (la tria, aŭ la kvara k.t.p.) infano. Ĉe la naskiĝo kaj morto de infanoj, kaj ĉe la morto de unu aŭ ambaŭ gepatroj aktuala kaj potenciala voĉdonrajto de infanoj povas transformiĝi unu en la alian. (Variantoj de la transformiĝo estas speciale prilaborataj).

8) La infanoj, havantaj aktualan voĉdonrajton, estas enskribitaj en elektoliston kaj fariĝas nememstaraj elektantoj, ricevas rajton por infana balotilo, per kiu voĉdoni havas rajton nur iliaj gepatroj aŭ zorgantoj.

9) Kiel escepto, speciala komisiono, konsistanta el reprezentantoj de distrikta elekta komisiono kaj el organoj de municipa memregado kaj edukado povas permesi al talentaj infanoj ekde 10 ĝis 18 jaroj, laŭ ilia petskribo, surbaze de konvena testo aŭ ekzameno, partopreni en balotoj memstare, transigante ilin el la kategorio de nememstaraj elektantoj en la kategorion de memstaraj elektantoj. (La testo aŭ ekzamenaj demandoj de memstara elektanto, datoj kaj procedo de la kontrolo kaj enskribo de infano sukcese ekzamenita en la liston de memstaraj elektantoj estas speciale prilaborita).

10) Se infano fariĝis orfo, ne havas eĉ unu el la gepatroj aŭ liaj gepatroj estas senrajtigitaj la gepatrajn devojn, tiuokaze al la infano estas destinita laŭleĝa zorganto, kiu devos plenumi voĉdonrajton de la infano.

11) Se unu el la gepatroj ne havas 18 jarojn, lia voĉdonrajto por sia(j) infano(j) transdoniĝas al liaj gepatroj aŭ zorganto.

12) Infano havas nur unu infanan elektovoĉon, pro tio voĉdoni por li povas nur unu el la gepatroj (aŭ patrino, aŭ patro) aŭ unu zorganto.

13) Plenaĝaj geedzoj ekde 18 jaroj, havantaj komunajn infanojn, kaj geedzoj aŭ gepatroj, havantaj infanojn de diversaj geedziĝoj, kiuj havas aktualan voĉdonrajton, memstare decidas, por kiuj el la infanoj voĉdonas ĉiu el la geedzoj aŭ gepatroj. Sian decidon la geedzoj aŭ gepatroj dokumentigas per petskribo, certigas ĝin ĉe notario (aŭ per alia maniero) kaj transdonas ĝin en distriktan elektan komisionon laŭ la domicilio de sia(j) infano(j). La distriktaj elektokomisionoj laŭ la similaj skribaj dokumentoj fare de gepatroj (zorgantoj) enskribas la infanojn en la elektolistojn apud la familia nomo de unu el la gepatroj (zorgantoj). La gepatroj kaj/aŭ geedzoj rajtas ŝanĝi sian decidon en ajna momento, dokumentinte ĝin analogie.

14) Manieroj de disdividoj de infanaj voĉoj inter gepatroj (patro kaj patrino) povas reguliĝi ne nur per Federala, sed ankaŭ per regionaj leĝoj, kompletigitaj Federalan Leĝon.

15) Enskribo de infanoj en elektoliston (la procezo estas speciale prilaborata).

16) Limigo de plenumado de voĉdonrajto de infanoj por gepatroj/zorgantoj, kiuj estas alkoholuloj, narkotistoj k.t.p. (La limigoj por tiaj gepatroj per la kvanto de infanoj, por kiuj ili povas voĉdoni, per tempo de malpermeso voĉdoni por siaj infanoj, limigo per rabatoj aŭ malpermeso voĉdoni por siaj gepatroj aŭ senrajtigo iliajn gepatrajn rajtojn estas speciale prilaborataj).

17) Plenumo de voĉdonrajtoj de infanoj estas devo de gepatroj kaj zorgantoj.

18) Administra sankcioj por malplenumo de gepatroj/zorgantoj la devon voĉdoni por siaj infanoj. (La listo de pardoneblaj kaŭzoj por neplenumado de la devo, sumo de monpuno

por la neplenumado sen pardoneblaj kaŭzoj kaj transkontigo de la monpunoj en buĝeton de municipa memregado estas prilaborataj speciale).

19) Premio al gepatroj/zorgantoj por la plenumo de la afero voĉdoni por siaj infanoj. (Specoj de la premioj por la gepatroj/zorgantoj kiel iaj laboraj, impostaj aŭ pagaj rabatoj, kaj ankaŭ kiel fiksita negranda pago, ekzemple, 50 rubloj por infana elekta voĉo el rimedoj de Federala buĝeto, estas prilaborataj speciale).

20) Sankcioj por krimuzo de voĉdonrajto de infanoj, por korupto aŭ provoj korupti gepatrojn/zorgantojn, por provoj politike influi al la infanoj kaj por similaj kontraŭleĝaj agoj fare de kandidatoj al deputitoj kaj fare de ajnaj aliaj personoj, politikaj partioj kaj antaŭbalotaj unuiĝoj (prilaborataj speciale).

21) Tutnacia referendumo estas rimedo por akcepto de leĝo pri voĉdonrajto de infanoj en Rusia Federacio. (La procedo de la referendumo estas prilaborata speciale konforme kun Leĝo de Rusia Federacio pri okazigo de referendumoj).

Rimarkoj. 1. Tiu ĉi projekto estas la unua kaj plej ĝenerala, skiza varianto pri Leĝo de voĉdonrajto de infanoj, kiu, sendube, devos multfoje pliiĝi kaj prilaboriĝi en la procesoj de diversaj diskutoj. La aŭtoro neniel pretendas al finfaro kaj definitiveco de la projekto, nur por ĝiaj ĝeneralaj bazaj konceptoj.

2. (Al artikolo 3.6). Problemo de la kvanto de infanoj, por kiuj povas voĉdoni unu el la gepatroj aŭ zorganto estas tre komplika kaj solviĝas surbaze de demografia politiko de la ŝtato. Se tia politiko supozas reduktion de kvanto de loĝantaro, tiuokaze al du gepatroj (aŭ patrino aŭ patro) oni permesas voĉdoni nur por unu infano. Se la politiko supozas minimuman kreskadon de la loĝantaro, proksima al stabiligado, tiuokaze al ĉiu el la gepatroj estas permesate voĉdoni por unu infano. Se tiu ĉi politiko supozas moderan kreskadon de loĝantaro, tiuokaze al unu el la gepatroj oni permesas voĉdoni por du infanoj. Se tiu ĉi politiko supozas maksimuman kreskadon de loĝantaro, tiuokaze al unu el la gepatroj estas permesate voĉdoni por ĉiuj siaj infanoj. Tiuokaze aktuala elektorajto koincidas kun la potenciala kaj ilia difirencas perdas la sencon, fariĝas superflua. En tiu ĉi projekto estas supozata demografia politiko de modera kreskado de la Rusia loĝantaro. Tiu ĉi leĝa normo ŝanĝiĝas konforme al ŝanĝiĝo de demografia ŝtata politiko.

26-a de marto 2004.

4. Voĉdonrajto de infanoj: neceseco kaj sekvo

Speciala kurso por studentoj kaj aspirantoj. 12 lekcioj, 24 horoj.

La programo

(elaborita de L.Semaŝko)

Temo 1. Loko kaj rolo de infanoj en socio kaj ŝtato. Problemoj de infaneco

Infana sfero kiel la plej grava parto de sociala sfero de socio, respondanta por reproduktado de novaj generacioj. Signifo de okupiteco de infanoj pri memevoluo kaj socialigo por la vivo de socio.

Aliigo de kvanto kaj kvalito de infanoj dum diversaj periodoj de historia evoluo. Loko kaj rolo de infanoj en diversaj socioj. Zorgo pri infanoj fare de gepatroj, familio, socio kaj ŝtato. Rolo de infanoj en ŝtato kaj politika respuguligo de iliaj interesoj. Politiko en infana konscio

kaj infana politika socialeco. Nuntempaj problemoj de infaneco: sistema karaktero, klasikado, tendencoj kaj pritakso de la problemoj. UN kaj UNICEF pri situacio kaj bonstato de la infanoj en la mondo. Manieroj de ŝtata solvado de la infanaj problemoj.

Temo 2. Historio de balotrajto

Balotrajto kiel origina instituto de demokratio kaj unu el la ĉefaj homaj rajtoj. Formiĝo de la nuntempa balotrajto en la epoko de industria socio. Genezo de balotrajto: plivastigo de ĝia grado kaj samtempe malpliigo de kvanto de diversaj censoj. Reguligo de balotrajto en Konstitucioj kaj leĝaro de diversaj landoj.

Temo 3. Aĝa censo kiel rudimento de industria socio kaj speco de rasismo

Balotaj censoj kiel formo de diskriminacio kaj rasismo. Specifikeco de aĝa censo kiel rudimento de industria socio. Psikologiaj kaj social-politikaj kaŭzoj de longdaŭra ekzistado de aĝa censo. Aĝa censo kiel speco de psikologia, kultura kaj politika rasismo. Malkoincido de aĝa censo al institucioj de civitaneco kaj demokratio. Aĝa censo kiel politika kialo de «mizereco, diskriminacio kaj indiferenteco de socio al infanoj» en nuntempaj demokratioj. Neceso likvidi la aĝan censon en informa socio en la epoko de globalismo.

«Infana censo» de D.Mendelejev – la unua provo venki la aĝan censon. Aliaj provoj de politika prezentado de infanaj interesoj.

Temo 4. Voĉdonrajto de infanoj: sociala, politika kaj morala neceseco

Ĝenerala determino de voĉdonrajto de infanoj kaj ĝia specialeco. Voĉdonrajto de infano estas rajto elekti, sed ne esti elektita. Sociala kaj jura esenco de voĉdonrajto de infanoj. Disdivido en ĝi de rajto kaj ĝia plenumo. Voĉdonrajto de infanoj kiel rimedo de likvido kaj venko de aĝa censo. Sociala, morala kaj politika neceseco de voĉdonrajto de infanoj por la nova epoko. Voĉdonrajto de infanoj kiel postulo de justa globaligo. Rajtoj de infano, enmetitaj en la Konvencio de UN, kaj voĉdonrajto de infanoj.

Temo 5. Jura mekanismo por realigi voĉdonrajton de infanoj

Ĉefaj principoj kaj nocioj de la leĝo, fiksanta voĉdonrajton de infanoj. Rajto de infano havi balotan voĉon kaj plenumado de la rajto fare de la gepatroj aŭ zorgantoj. Infano kiel nememstara elektanto. Rajto por voĉo de ĉiu infano estas infana voĉo. Manieroj de divido de infanaj voĉoj inter la gepatroj (inter la patro kaj patrino). Limigo per la kvanto de infanaj voĉoj por la gepatroj en diversaj landoj cele de reguligo de naskiĝokvanto kaj de kvanto de loĝantaro. Enskribo de infanoj en elektolistojn. Permeso al talentaj infanoj ekde 10 ĝis 18 jaroj partopreni memstare en la balotoj surbaze de speciala ekzameno. Limigoj por

plenumado de voĉdonrajto de infanoj por la gepatroj, kiuj estas alkoholuloj, narkotistoj k.t.p. Plenumado de voĉdonrajto estas devo de la gepatroj kaj zorgantoj. Administraj sankcioj por la malplenumado de la devo. Premio al gepatroj por la plenumado de la devo. Sankcioj por krimuzo de voĉdonrajto de infanoj. Tutlanda referendumado kiel rimedo por akcepto de la leĝo de voĉdonrajto de infanoj en ĉiu lando. Korektado de leĝaro konforme de la leĝo pri voĉdonrajto de infanoj.

Temo 6. Politika esenco kaj rezultoj de voĉdonrajto de infanoj

Politika esenco de voĉdonrajto de infanoj kiel plenvalora politika kalkulo kaj esprimo de infanaj vivintereso sur ĉiuj teritorioj de la lando. Politika destino de voĉdonrajto de infanoj kiel formado de parlamenta plimulto en ĉiunivelaj leĝdonantaj organoj ekde municipa memregado ĝis la federala, konsiderante la voĉojn de gepatroj kaj infanoj. Gepatroj kaj infanoj kiel sociala apogo de parlamenta plimulto. Deputitoj, elektitaj per la voĉoj de infanoj kaj iliaj gepatroj estas «infanaj (aŭ junularaj)» deputitoj. Konfirmo de infanecaj problemoj kiel unuavicaj fare de «junulara» parlamenta plimulto. Formado fare de parlamenta plimulto de leĝdonanta kaj plenumanta ŝtata mekanismo por efektiva kaj sistema solvado de infanecaj problemoj. Prioritata distribuo de diversnivelaj buĝetoj por intereso de infanoj, por solvado de infanecaj problemoj. Plialtigo de politika aktiveco de la junularo. Plialtigo de politika rolo de infanoj kaj junularo en la socio. Pliigo da kvanto de elektantaro. Plialtigo de kvalito de demokratio. Transformado de la ŝtato en la vere socialan. Abrupta malpliigo de la nivelo de infana kaj poste de plenaĝula krimagado. Plenvalora plenumado de infanaj rajtoj. Garantio al la infanoj de speciala prizorgo fare de la ŝtato. Plialtigo de sociala valoro kaj humana signifo de voĉdonrajto. Purigado de politiko. Nova senco en la batalo kontraŭ terorismo, koruptado, krimeco. Politika mekanismo por konfirmado de voĉdonrajto de infanoj.

Temo 7. Spektro de socialaj rezultoj de voĉdonrajto de infanoj

Voĉdonrajto de infanoj estas prioritato de sociala sfero kaj politiko, grava plibonigo de situacio kaj bonstato de infanoj, pliigo de kvalito de edukado, sanprotektado, libera tempo, sporto de infanoj, plifortigo kaj plisano de familio, pliigo de la rolo kaj aŭtoritato de la gepatroj, precipe de la patrinoj, kreado de mekanismo por solvado de demografia problemo, plifirmigo de interligo kaj reciproka respondeco de generacioj, formado de potenca sociala kontraŭterorisma forto kaj aliaj socialaj rezultoj.

Temo 8. Moral-psikologiaj kaj kulturaj sekvoj de voĉdonrajto de infanoj

Voĉdonrajto de infanoj estas sanigo de moral-psikologia etoso en familio kaj socio, pliigo de politika konscio kaj kulturo de junularo, plifortigo de interhelpo kaj konfido inter

generacioj, inter gepatroj kaj gefiloj, plisanigo de amaskomunikiloj, liberigo ilin de la propagando de perforto kaj pornografio, kvalita plibonigo de informoj por infanoj, speciala zorgo pri la infanoj kiel nacia socia ideo kaj aliaj sekvoj.

Temo 9. Eventualaj argumentoj kontraŭ voĉdonrajto de infanoj

Socialaj fortoj por subteno kaj kontraŭstaro al voĉdonrajto de infanoj. Kolizio de innovigoj kaj tradicioj en politiko kaj balotrajto. Religiaj kaj moralaj aspektoj de kontraŭstaro al voĉdonrajto de infanoj. Argumentoj pro formala egaleco de elektantoj. Argumentoj pro krimuzo de voĉdonrajto de infanoj. Argumentoj pro nekompreneo kaj malĝustigo de voĉdonrajto de infanoj. Argumentoj pro nerespondeca kaj indiferenta rilato al infanoj. Argumentoj pro malkredo al ŝtato kaj politiko. Rasismaj kaj naciismaj argumentoj. Argumentoj pro pseŭda danĝero por infanoj. Argumentoj pro prioritato de ekonomiko. Aliaj argumentoj.

Temo 10. Teoriaj fontoj de voĉdonrajto de infanoj

Pedagogiaj kaj aksiologiaj ideoj pri socia kaj politika valoro de infanoj de J.Korĉak, D. Mendelejev, J. Piaget, S. Gessen, E. Sokolov kaj multaj aliaj. Tetrasociologio kiel teoria sociologia fonto de voĉdonrajto de infanoj. Reprodukta okupiteco kaj sferaj klasoj de loĝantaro kiel bazo de sociala egaleco de infanoj kaj plenaĝuloj, ideo fonto por voĉdonrajto de infanoj. Voĉdonrajto de infanoj kiel vojo al sociala harmonio de sferaj klasoj kaj generacioj. Fakaj kaŭzoj de vasta reproduktado de problemoj de infanoj kaj sferaj rimedoj por ilin venki. Sfera origino de voĉdonrajto de infanoj. Sociologiaj esploroj pri rilato de gepatroj kaj loĝantaro al voĉdonrajto de infanoj.

Temo 11. Voĉdonrajto de infanoj kiel nova valoro, rajto, libero kaj respondeco de globaliga epoko

Plivastigo de rajtoj, liberoj kaj valoroj en sociala historio. Kvalita evoluo de valoroj pri amo, libero, egaleco kaj frateco sub influo de voĉdonrajto de infanoj. Humanigo de komprenado kaj aplikado de tradiciaj valoroj, rajtoj kaj liberoj de la homo lige kun voĉdonrajto de infanoj. Voĉdonrajto de infanoj estas tuthomara kaj harmonia rilato al infanoj. Voĉdonrajto de infanoj estas nova valoro, rajto, libero kaj respondeco de globaliga epoko kaj informa socio. Voĉdonrajto de infanoj kiel suplemento al la Ĝenerala Deklaracio pri infanaj rajtoj kaj al la Konvencio de UN pri infanaj rajtoj en la nova epoko.

Temo 12. Voĉdonrajto de infanoj estas vojo de antaŭvena kaj harmonia evoluo de Rusio

Infanoj estas la ĉefa homa kapitalo de estonta Rusio. La plej granda efektiveco de investado en homan kapitalon. Investado en la infanojn kiel vojo de antaŭvena kaj harmonia evoluo de Rusio kaj bazo por sistema politika strategio de la lando por 21-a jarcento. Voĉdonrajto de infanoj kiel sociala trarompo de Rusio sur la lokon de unu el la centroj de la multpolusa mondo en la nova epoko.

Baza literaturo

1. Bachika Reimon (2003) Tetrasociology and Values. In: Semashko L. Tetrasociology: from Sociological Imagination through Dialogue to Universal Values and Harmony. St.-Petersburg State Polytechnical University, p.191–195.
2. Semashko L with co-authors (2003) Tetrasociology: from Sociological Imagination Through Dialogue to Universal Values and Harmony. St.-Petersburg State Polytechnical University
3. Semashko L.M. Tetrasociology: Children's Suffrage. Iberoamerican Congress on Childhood, Health and Society 'Globalization and Social Equity' University of Guadalajara, Guadalajara, Mexico, November 3-5, 2003
<http://www.cucs.udg.mx/INBOX/congresoibero.htm>
4. Semashko, L. (2002). Tetrasociology: Responses to Challenges. St. Petersburg: Technical University.
5. Баранов А.В. Депопуляция – социальный вызов государству // Звезда, 2001, № 1, с.172–179.
6. Гессен С.И. Основы педагогики. М., 1995
7. Головин Н.А., Сибирев В.А. Дети и выборы в Государственную Думу: о начале формирования базовых политических установок. Рукопись, 2000
8. Конвенция ООН о правах ребёнка // Защити меня. Москва, 1995
9. Конституция РФ. М., 1994
10. Корчак Я. Как любить ребёнка. 1990.
11. Менделеев Д.И. Заветные мысли. Москва, 1995
12. На Специальной Сессии ООН мировые лидеры обещают построить «мир, достойный детей» // One Country, Москва, апрель-июнь 2003 (на русском)
<http://www.unicef.org/specialsession/>
13. Никитин Б., Никитина Л. Мы и наши дети. М., 1980
14. Основы ювенологии. Ред. Проф. Е.Г.Слуцкий. СПб, 2002
15. Пиаже Ж. Избранные психологические труды. М., 1969
16. Семашко Л.М. Процессы демократизации общества и избирательное право детей // Философия детства и социокультурное творчество. Материалы X Межд. Конференции. СПб, 2003, с. 336-339
17. Семашко Л.М. с соавторами. Тетрасоциология: от социологического воображения через диалог к универсальным ценностям и гармонии. СПбГПУ, 2003
18. Семашко Л.М. Тетрасоциология – революция социального мышления, путь гармонии и процветания. СПб., 2000;
19. Семашко Л.М. Тетрасоциология: ответы на вызовы. СПбГТУ, 2002, <http://www.tetrasociology2002.spb.ru>
20. Семейный Кодекс РСФСР. Семашко Л.М., руководитель группы разработчиков. Проект. Санкт-Петербург, 1991

21. Соколов Э.В. Диалог в культуре детства // Философия детства и социокультурное творчество. Материалы X Межд. Конференции. СПб, 2003, с.47-57.
22. Соловейчик С. «Агу» и «Бука» // Новый мир, № 3, 1985
23. Сухомлинский В.А. Сердце отдаю детям. Киев, 1972
24. Федеральный закон РФ от 12 июня 2002 г. № 67-ФЗ «Об основных гарантиях избирательных прав и права на участие в референдуме граждан Российской Федерации».
25. Федеральный Закон РФ от 31 мая 2002 г. О гражданстве Российской Федерации
26. Философия детства и социокультурное творчество. Материалы X Межд. Конференции. СПб, 2003
27. Чёрная книга преступлений против детей в Санкт-Петербурге. Факты, документы, комментарии. Редакторы: Л.М.Семашко, А.И.Аношин, Г.А.Крышня, Ф.С.Махов; СПб, 1994
28. Чуковский К.И. От двух до пяти. Киев, 1950
29. Щетинин М.П. Школа будущего рождается сегодня // Новый мир, № 3, 1982
30. Юрьев А.И. Введение в политическую психологию. СПб, 1992
31. Юрьев А.И. Глобализация как новая форма политической власти, изменяющая человека и миропорядок // Россия: планетарные процессы. СПб, 2002, с.235-264

Rimarkoj. 1. Pro neceseco la kvanto de la temoj kaj horoj de la speciala kurso povas esti reduktita aŭ plivastigita duoble.

2. Laŭ ĉiu temo eblas okazigi seminariojn po 2 horojn.

3. La lekcioj de la speciala kurso eblas okazigi laŭ la ajna el la sekvaj katedroj: politologio, kulturologio, antropologio, psikologio, politika psikologio, pedagogio pri familio kaj infaneco, sociala laboro k.a.

5. La unuaj reeĥoj de alilandaj sociologoj

El Brazilo

Kara profesoro Leo Semaŝko!

Mi atente tra legis Vian «Koncepton de infana voĉdonrajto», kiun Vi afable sendis al mi. Via propono, krom tio, ke ĝi estas bonega kaj kuraĝa, ŝajnas al mi tre ĝustatempa, speciale Viaj ideoj en la «Koncepto—2». Mi sendos Vian Koncepton al profesoro Uta Kramer, gvidantino de unu el la plej signifaj eksperimentoj pri saniga socialigo de infanoj en mizerkvartaloj de Brazilo. Ŝi estas prezidanto kaj fondinto de «Alianco por neplenaĝuloj» en Brazilo. Krome ŝi gvidas internacian movadon, kiu solvas la taskon krei ĉe registaroj kaj socio komprenadon pri senprokrasta fokusado de nia atento al la infanoj de la mondo. Mi kredas, ke Via interŝanĝo per informoj kun prof. Kramer, al kiu mi sendas Vian koncepton, estos samtempe produktiva kaj fruktodona.

Kiel preleganto dum la 20-a Nacia Kongreso de infanoj kaj junularaj juĝistoj kaj prokuroroj de Brazilo mi informos ilin pri Viaj proponoj. Akceptu mian varman saluton kaj deziron pri antaŭenmovo de Via signifoplena laboro por la infanoj de la mondo.

Lia Diskin, profesoro pri sociologio el universitato San-Paŭlo, Brazilo, 27-a de februaro, 2004.

El Japanio

Kara Leo!

Necesis tempo por respondi al Via propono, plena da entuziasmo, pri la nova libro-dialogo pri infana voĉdonrajto el pozicioj de diversaj religioj. Jes, vere tio estas grandega nova ideo! Mi estas ravita pri Via entuziasmo, sed, daŭrigante nian metaforan lingvaĵon, mi akvumis Viajn sakurojn, sed nun Vi petas, ke mi laboru en Via tetrasociologia ĝardeno!!! Mia propra negranda ĝardeno el sakuroj kaj aliaj floroj atendas mian atenton. Mi neglektis ilin tiom longe!..

Dum mia konferenco «Kulturo, valoraĵoj kaj estonta socio» (Kioto, 24-26-a de septembro, 2004) mi estus salutonta prezentadon de Via raporto pri «Infana voĉdonrajto kiel nova politika kulturo kaj estonta valoraĵo». Tamen infana voĉdonrajto ŝajnas al mi pli ĝuste institucio ol valoraĵo. Ĝi pli multe rilatas al politika movado, ol al valoraĵoj. Ekzistas ja granda diferenco inter aparta valoraĵo kaj ilia aro.

Kun la plej bonaj deziroj al Vi kaj al Via laboro,

Rejmon Bachika, profesoro de katedro pri religia sociologio el universitato Kioto, prezidanto de Esplorkomitato 07 «Esplorado de futuro» de Internacia sociologia Asocio.

Japanio, 29-a de februaro, 2004

6. Temaro por Internacia Konferenco «Infano en la nuntempa mondo» en 2005.

Proponoj anstataŭ konkludo

(prilaborita de L. Semaŝko)

La prezentita supre teoria kaj fakta materialo, kiu konfirmas socialan gravecon de voĉdonrajto de infanoj, servas kiel bazo por la propono okazigi sekvan, la 12-an Internacian konferencon «Infano en nuntempa mondo» en 2005 laŭ la temo: «*Voĉdonrajto de infanoj*». *La temo estas logika daŭrigo kaj pliprofundigo de la Konferenco 2004 «Ŝtato kaj infanoj».*

Proksimuma temaro de la proponata konferenco 2005 ŝajnas al mi jena:

- Loko kaj rolo de infanoj en socio kaj politiko
 - Problemoj de infaneco: politikaj kaj juraj solvoj
 - Historio de elektorajto: de elimino ĝis inkludo de infanoj
 - Aĝa censo kiel rudimento de industria socio kaj speco de rasismo
 - Voĉdonrajto de infanoj: sociala, politika kaj morala neceseco, postulo de informa socio kaj globalismo
 - Voĉdonrajto de infanoj, Konstitucio kaj Balota leĝo
 - Jura mekanismo por realigo de voĉdonrajto de infanoj
 - Politika esenco kaj socialaj sekvoj de voĉdonrajto de infanoj
 - Voĉdonrajto de infanoj kiel efektiva rimedo por plenumo de Konvencio de UN pri infanaj rajtoj kaj ilo por sistema solvo de infanecaj problemoj
 - Voĉdonrajto de infanoj: nova kvalito por afero de infanoj, edukado, sanprotektado kaj rimedo por plibonigo de situacio de pedagogoj kaj kuracistoj
 - Voĉdonrajto de infanoj: nova politika kulturo de junularo kaj virinoj
 - Laboro pri edukado de infanoj en familio estas socie utila kaj pagata laboro kiel sekvo de voĉdonrajto de infanoj
 - Eblaj argumentoj kontraŭ voĉdonrajto de infanoj
 - Teoriaj fontoj de voĉdonrajto de infanoj
 - Voĉdonrajto de infanoj kiel nova valoro, rajto, libero kaj respondeco de globalisma epoko
 - Socilologiaj, psikologiaj kaj juraj sekvoj de voĉdonrajto de infanoj kaj rilato al ĝi fare de loĝantaro kaj ŝtatpotenco
 - Voĉdonrajto de infanoj kiel vojo de antaŭvena kaj harmonia evoluo de Rusio, ĝia homa kapitalo, bazo de sistema politika strategio en la 21-a jarcento
- Prezentitaj en la broŝuro materialoj oni povas konsideri kiel starigo de problemoj por diskutoj laŭ la temaro dum konferenco en 2005. Pridiskutado de la temaro ege levos teoriantajn kaj praktikan signifon de la Internacia konferenco «Infano en la nuntempa mondo». Al la konferenco eblos inviti dekojn da famaj eksterlandaj specialistoj el Usono, Aŭstralio, Kanado, Japanio, Ĉinio, Brazilo kaj el aliaj landoj. Ĝi trovos grandan politikan kaj teoriantan reeĥon en la tuta mondo.

27-a de marto 2004.

7. DIALOGO KUN UNICEF

Infana Fondaĵo UN (UNICEF)
La 19-an de majo 2004

Leo Semaŝko, doktoro pri filozofio kaj Martha Ross De Witt, doktoro pro filozofio.

Karaj sinjoro Semaŝko kaj sinjorino Ross De Witt.

Mi dankas Vin por Via mesaĝo al Carol Bellamy, kiu estis transdonita al mi por respondo. Kvankam UNICEF aprobas ĉiujn iniciatojn, kiujn povas pozitive kontribui al infanaj rajtoj, ni kun bedaŭro informas Vin, ke ni ne povas subteni vian projekton.

Vi ja scias, ke UNICEF subtenis Konvencion pri Infanaj Rajtoj ekde ĝia komenca stadio ĝis preskaŭ ĝia universala ratifikado. La Konvencio ŝanĝis funkciadon de UNICEF kaj plivastigis eblecojn por organiza penetrigo. Tiuj ŝanĝoj duafoje konfirmitaj en Misio de UNICEF, 1996, kiu deklaras: «UNICEF estas komisiita defendi infanajn rajtojn kaj instaligi ilin kiel longdaŭraj principoj kaj internaciaj modeloj pri rilatoj al infanoj».

Dum la pasinta jardeko UNICEF helpis al registaroj en iliaj penoj efektiviigi principojn kaj postulojn de la Konvencio. La rajto de la infanoj esprimi siajn opiniojn kaj la neceso atentigi iliajn problemojn estas unu el la kvar gvidaj principoj de la Konvencio. Tiu principo, same kiel la principoj de maldiskriminacio, de la plej bonaj interesoj de infano kaj de la rajto por vivo kaj evoluo baziĝas sur la koncepto, ke la infanoj estas subjektoj de rajto samvalore kiel plenaĝuloj. UNICEF opinias, ke partopreno de infanoj en la procedo de akcepto de reguloj estas grava por plibonigo kaj realigo de infanaj rajtoj. Pro tio UNICEF stimulis en multaj landoj agadon, kies celoj estis realigo de infanaj rajtoj esprimi sian opinion. Ekzemple, en Meksiko UNICEF helpis al Meksika Federala Balota Instituto organizi nacian pridemandadon de infanoj kaj adoleskuloj. Estis farita spaco, kie la infanoj povis esprimi siajn opiniojn pri bazaj problemoj, kaj la socio povis respondi al infanaj maltrankviliĝoj. En Ĉilio, Ekvadoro, Nikaragvo kaj Jamajko UNICEF subtenis iniciatojn pri konsultiĝoj kaj balotoj de infanaj parlamentoj, en kiuj aktive partoprenis miloj da infanoj kaj ili esprimis siajn opiniojn rilate problemojn de iliaj ŝtatoj, lernejoj, familioj.

La funkciadon de UNICEF en tiu ĉi kampo estas direktata de la Konvencio pri infanaj rajtoj. Tiamaniere emfazante la gravecon de partopreno de la gepatroj kaj laŭleĝaj zorgantoj gvidi la infanojn, la Konvencio esprimas signifan eblecon al infanoj lerni, partopreni kaj formuli proprajn solvojn en la problemoj, kiuj senpere koncernas ilian vivon. La Konvencio konfirmas specialan statuson de la infanoj rilate de ilia «aĝo kaj maturiĝo»⁵⁸ en la peza procedo de enkonduko de la infanoj al solvadoj, kiujn oni akceptas por ilia bonstato en politika vivo. La Konvencio petas ŝtatojn garantii al gepatroj kaj laŭleĝaj zorgantoj eblecon por laŭgrada preparo de la infanoj «konforme kun la nivelo de la evoluo de iliaj kapabloj»⁵⁹ al

⁵⁸ La Konvencio, paragrafo 12.

⁵⁹ La Konvencio, paragrafo 15.

memstara plenumo de siaj rajtoj. Kiel montras Roger A.Hart en sia libro pri infana partopreno, «estas malreale atendi, ke la infanoj povas subite fariĝi respondecaj, partoprenantaj civitanoj sen antaŭa akirado de sperto kaj devo»⁶⁰. Nur per multoblaj spertoj de senpera demokratia partopreno en institucia ĉirkaŭo la infanoj povas laŭgrade aliri al partopreno en solvadaj procedoj.

UNICEF ricevis valoran sperton dum sia laboro kun junaj homoj. La plej grava estas tio, por ke kompetenceco de la infanoj esprimi siajn opiniojn ne estu maltaksata. Sekve, la infanoj mem devas decidi, ĉu ili deziras partopreni en demokratiaj politikaj procedoj. Por garantii efektivan infanan partoprenon en akceptado de decidoj, neceas grave atentigi la poziciojn, en kiuj ili partoprenas. UNICEF opinias, ke la plej grava aspekto (rilate la voĉdonrajton de infanoj) estas ne strategio pri garantio de ilia partopreno, sed antaŭ ĉio garantio kontraŭ manipulado per infanoj kaj certeco ke iliaj rekomendoj estas observataj dum la procedo de decidaj akceptoj. La infanoj devas partopreni memvole, sen instigo. Ili rajtas havi plenan informadon pri diversaj parametroj de agado kaj procedo, en kiu ili partoprenas (aŭ agas plenaĝuloj de ilia nomo).

UNICEF supozas, ke ĉiuj infanoj devas havi eblecon partopreni en akcepto de decidoj, kiuj ilin koncernas. Tio speciale gravas por la infanoj, loĝantaj en situacioj, kiuj malhelpas plenumi iliajn rajtojn. Tio estas infanoj, kiuj ne spertas zorgon fare de siaj familioj, kiuj estas enmiksita en armitajn konfliktojn, kiuj orfiĝis pro AIDOSO, gefiloj de rifuĝintoj kaj senhejmaj infanoj. Gravas, por ke ĉiuj infanaj voĉoj estu rimarkitaj kaj por ke oni aŭdu ilin.

UNICEF dankas Vin por via intereso al infanaj problemoj kaj deziras al Vi sukcesojn en via laboro.

Sincere Via Elizabeth Giggons
Gvidanto
Sekcio de globala politiko
Fako de politiko kaj planado.

Respondo al UNICEF

La 3-an de junio 2004

Elizabeth Gibbons
Gvidanto
Sekcio de globala politiko
Fako de Politiko kaj Planado
UNICEF

Estimata sinjorino Elizabeth Gibbons,

⁶⁰ Hart, Roger. Children's participation: From tokenism to citizenship. UNICEF innocent Essays no.4, 1992

Dankon por Via detala respondo, en kiu Vi bone ilustras la aktivan agadon de UNICEF en la sperto de subtenado de la UN-Konvencio pri infanaj rajtoj. Via granda laboro en tiu kampo meritas aprobon kaj admiron. Vi bone montras la rajton de la infanoj esprimi siajn opiniojn. Vi detale diras pri «partopreno de infanoj en stadio de solvado» de iliaj problemoj, pri «la ebleco de infanoj lerni por partopreni kaj formuli siajn proprajn decidojn en la problemoj, kiuj senpere koncernas iliajn vivojn», pri «laŭgrada preparado de la infanoj al memstara plenumado de siaj rajtoj konforme kun la nivelo de evoluo de iliaj kapabloj». Vi ĝuste emfazas, ke «kompetenco de la infanoj esprimi siajn opiniojn ne devas esti maltaksata», ke «la infanoj devas mem decidi, ĉu ili deziras partopreni demokratiajn politikajn procedojn». Ni konsentas kun Vi, ke «la plej grava aspekto (rilate la rajton de infano voĉdoni) estas... garantio kontraŭ manipulado per infanoj», ke «la infanoj devas partopreni libervole, sen devigo» k.t.p.

Nia ideo pri voĉdonrajto de infanoj, kiun plenumas la gepatroj kaj laŭleĝaj zorgantoj neniel baras, sed kontribuas al memstara partopreno de infanoj en solvado de iliaj problemoj. Sed voĉdonrajto de infanoj koncernas tute alian aspekton. Ni baziĝas sur tio, ke «la nivelo de evoluo de infanaj kapabloj», speciale en la aĝo ĝis 14–16 jaroj absolute ne sufiĉas por kompetente kaj memstare pritaksi konjunkturon de politikaj procedoj dum balotoj, de kiu dependas elektado de ĉiunivelaj parlamentoj, kiuj respondecas pri distribuado de ŝtata buĝeto, postulata de tiuj aŭ aliaj loĝantaraj grupoj. En tiu ĉi sfero la infanoj ne povas akcepti decidojn, sed de la buĝeta financado dependas garantiado de iliaj unuavicaĵaj rajtoj. Pro tio nia ideo supozas, ke infano devas havi voĉdonrajton, li devas esti enmetita en porelektan liston, *sed* (ni speciale atentigas tiun «sed») *plenumi* la rajton, tio estas ricevi balotilon por la infano kaj voĉdoni per ĝi povas kaj devas *nur* la gepatroj kaj laŭleĝaj zorgantoj de la infanoj.

Al ni ŝajnas, ke tiu principa specialaĵo pri voĉdonrajto de infanoj preteriris Vian atenton. Ŝajnas, Vi opinias, ke tiu ideo supozas memstaran partoprenon de infano en balotado, sed tio estas tute male. Infano ricevas nur rajton sed ĝi plenumiĝas nur fare de liaj gepatroj kaj zorgantoj. Tio estas la ĉefa senco kaj specialaĵo de voĉdonrajto de infanoj. Tial, ĝiaj ĉefaj subjektoj kaj plenumantoj estas ne infanoj, sed gepatroj/zorgantoj. Tial voĉdonrajto de infanoj eliminis ajnan «manipuligon per infanoj», ĉar voĉdonas ne infanoj, sed iliaj gepatroj/zorgantoj. Pro tio voĉdonrajto de infanoj ne eliminis kaj ne limigas, sed kontribuas kaj kompletigas memstaran partoprenon de pliaĝaj infanoj en demokratiaj procedoj. (Iuokaze, ekskluzive ĝi supozas memstaran partoprenon en balotoj politike maturiĝintaj pliaĝaj infanoj). Sed tio estas diversaj, tamen kunligitaj aspektoj de efektivigo de infanaj rajtoj. Voĉdonrajto de infanoj ne kontraŭstaras al la Konvencio, ne limigas kaj ne rompas ajnan infanan rajton. Kontraŭe, ĝi kompletigas ĝin per la rajto, kiu garantias ĉiujn aliajn

infanajn rajtojn. Ĝi donas por ili novan apogilon, instrumenton kaj freŝan aeron de espero. Ĝi renovigas, plifirmigas kaj unuigas mondajn civilizojn ĉirkaŭ sia futuro – la infanoj. Ĝi garantias prioritatan investadon en la ĉefan strategian resurson de ĉiuj civilizaĵoj – en la homojn, kiuj komenciĝas en infaneco. Per tio ĝi kreas novajn homojn, kiuj malkovras novajn, pli efektivajn kaj humanajn vojoj por solvi la problemojn de la homaro kaj popoloj. Ĝi, ĉirkaŭprenante la gepatrojn kaj la infanojn, kiuj konsistigas la plej grandan parton de la loĝantaro, «konstruos mondon, kiu indas al la infanoj». Ĝi fariĝos risorto de konforma globala movado, al kiu aliĝi elvokas speciala UN-Sesio 2002 «ĉiujn membrojn de socio».

Por kio necesas tiu ĉi voĉdonrajto de infanoj? Por unu komuna celo – por efektiva plenumado de infanaj rajtoj, kiuj nun ne ekzistas. Voĉdonrajto de infanoj unuigas eblecojn de gepatroj/zorgantoj kaj ŝtato kaj formas efektivan mekanismon malestanta nun por plenumado de infanaj rajtoj. Necesas agnoski, kaj Vi konsentos kun tio, ke la ĉefa respondeco kaj devo por efektivigi infanajn rajtojn, apartenas ne al infanoj, sed nur al gepatroj kaj ŝtato. Tiun la plej gravan respondecon kaj la devon de la gepatroj kaj de la ŝtato esprimas nur voĉdonrajto de infanoj plenumata pere de la gepatroj/zorgantoj. Krom voĉdonrajto de infanoj malekzistas aliaj respektivaj por efektiva plenumado de infanoj rajtoj. Efektiva mekanismo por tio ne povas esti altrudita al la ŝtatoj elekstere, ĝi povas esti kreita nur per voĉdonrajto de infanoj interne de ĉiu lando, koncerne kun ĝiaj tradicioj, pensmaniero, konvena al naciaj leĝoj.

La Speciala UN—Sesio 2002 agnoskis, ke la Konvencio praktike ne efektiviĝas, forestas efektiva mekanismo por realigo de la bonegaj infanaj rajtoj, enskribitaj en la Konvencio. Ĝi ne baras al malbonigo de infana situacio en la mondo. La ŝtatoj—partoprenantoj de la Konvencio ne plenumas ĝiajn ĉefajn paragrafojn 3 kaj 4, en kiuj formuliĝis la plej gravaj principoj. La paragrafo 3 postulas, ke la registaroj donu «*unuavican* atenton al la plej bona garantio de infanaj interesoj», kaj la paragrafo 4 postulas, ke ili efektivigu ekonomikajn, socialajn kaj kulturajn rajtojn de la infanoj en «*maksimumaj* eblecoj de havantaj ĉe ili resursoj» (la substreko aldonitas). Nek unu ŝtato de la mondo, ni emfazas, nek unu, povas hodiaŭ diri, ke ĝi donas «*unuavican*» atenton al la infanoj, «plej bone» garantias infanajn interesojn kaj efektivigas rajtojn de siaj infanoj en «*maksimumaj* eblecoj de havantaj ĉe ili resursoj». La realeco estas tia, ke la infanaj rajtoj estas prizorgataj en ĉiuj landoj per minimumaj resursoj laŭ restaĵa principo. Voĉdonrajto de infanoj estas la sola rajto kaj mekanismo, kiu permesas al la ŝtatoj—partoprenantoj konformi al la paragrafoj 3 kaj 4 de la Konvencio, ĝi permesas al ili garantii rajtojn de siaj infanoj per la maniero unuavica, kaj la plej bona, kaj maksimuma.

Pro tio ni havas la plej ĉefan demandon al UNICEF. Se voĉdonrajto de infanoj sole permesas efektivan plenumadon de la Konvencio per prioritata buĝeta financado de infana sfero en ĉiu lando, kial do UNICEF rezignas ĝin pristudi kaj pridiskuti? La plej bona respondo estus *konsento de UNICEF* subteni ĝian esploron kaj pridiskuton.

Ankoraŭfoje ni dankas Vin por Via ampleksa respondo, tamen, bedaŭrinde, ni ne povas agnoski ĝin kontentiga laŭ la analizo, pritakso kaj rilato de UNICEF al la ideo pri voĉdonrajto de infanoj. En la respondo forestas analizo kaj pritakso, ne estas malkovrata la rilato. Nome pri la ideo nenio estas menciata en Via letero. Vi nur informas, ke «ni ne kapablas subteni Vian projekton». (Kiu «ni» -- ĉu Vi persone aŭ la Plenumkomitato de UNICEF? Kial «ne kapablas»? Tiuj kaj aliaj demandoj restis senrespondaj). En Via respondo estas montrita neniu argumento, kiu malhelpus al UNICEF subteni nian projekton. Bedaŭrinde, Vi ne komprenis sencon de nia sinturnado al UNICEF. Ni proponas al UNICEF nun subteni nur *esploron* pri la rilato de loĝantaro (unuavice, de gepatroj) al voĉdonrajto de infanoj, sed ne la rajton mem. Antaŭ ol meti demandon pri la agnosko kaj subteno de voĉdonrajto de infanoj, necesas unuavice esplori rilaton al ĝi de gepatroj/zorgantoj kiel de *unusolaj plenumantoj* de la rajto. Ni opinias, ke sur la unua etapo la ideo postulas multflankan pristudadon, esploron kaj vastan sciencan kaj socian pridiskuton. Se la rezultoj estos pozitivaj, nur tiam eblos meti demandon pri la agnosko de voĉdonrajto de infanoj, pri rekomendoj flanke de leĝdonantaj iniciatoj k.t.p. Tio estos la sekva, la dua etapo. En nia letero al UNICEF temis nur pri la unua etapo. Nun ni petas almenaŭ pri morala subteno de la esplorado, se UNICEF ne havas financajn rimedojn por ĝi. Se UNICEF vere «subtenas ĉiujn iniciatojn, kiuj povas pozitive kontribui al la infanaj rajtoj», kiel skribas Vi, do, kio malhelpas al ĝi subteni la esploradon kaj pridiskutadon de voĉdonrajto de infanoj, kiu povas efektive kontribui al la infanaj rajtoj?

Voĉdonrajto de infanoj, plenumata de la gepatroj/zorgantoj estas komplika kaj sistema politika-jura mekanismo kun enorma kvanto de pozitivaj socialaj postsekvoj kaj samtempe ambiguaj perspektivoj. Ĝi postulas gravan sciencan analizon kaj pridiskuton. Tiucele ni proponas al UNICEF organizi en 2005 negrandan internacian konferencon el 50–60 ekspertoj, specialistoj pri infanaj rajtoj (juristoj, politikistoj, sociologoj, politpsikologoj, pedagogoj k.a.) por pridiskuti la ideon pri voĉdonrajto de infanoj. La ideo estas priskribita en nia broŝuro (2004, 72 paĝoj). Ni sendas ĝin al UNICEF, kiu povas korektadi kune kun ni ĝian enhavon kaj reeldoni ĝin. Samtempe ni proponas al UNICEF almenaŭ subteni morale okazigon de internacia kompara sociologia esploro pri rilato de gepatroj/zorgantoj al voĉdonrajto de infanoj. Kiam UNICEF ricevos la rezultojn de la esplorado kaj de ekspertoj, tiam ĝi povos motivigite difini sian rilaton al la ideo de voĉdonrajto de infanoj kaj ĝia

perspektivo. Tian ni vidas pripensitan decidon de UNICEF, kiu permesos al ĝi deklari, ke UNICEF vere ne ignoras ajnan «iniciaton, kiu povas pozitive kontribui al la infanaj rajtoj».

Sincere Viaj

Leo Semaŝko, Martha Ross Dewitt

Necesas rekonstrui la socion tiel, por ke infanaj interesoj estu prioritataj.

Elmar Sokolov.

La ĉefa ideo: infano estas egala al ni, valora homo.

Ekzistas neniuj aĝaj hierarkioj.

Kruelaj leĝoj de Antikva Helenujo kaj Romio permesas murdi infanon. En la mezepoko fiŝkaptistoj elkaptis per fiŝreto kadavrojn de dronigitaj beboj. En la 17-a jarcento en Parizo oni vendis infanojn al almozuloj, kaj oni disdonis senpage bebojn apud Notre-dame-de-Paris. Tio okazis ne tiel delonge! Kaj nuntempe oni forlasas infanon, kiam ĝi malhelpas. Kreskas kvanto de eksteredzecaj, forlasitaj, senzorgataj, ekspluatataj, malĉastigitaj, torturataj infanoj. La leĝo defendas ilin, sed ĉu tio sufiĉas? Multaj ŝanĝoj okazis en la mondo; malnovaj leĝoj postulas esti reviziitaj.

Ni pliriĉiĝis. Ni estas heredantoj, akciuloj, kunposedantoj de grandega havaĵo. Kiom multas ĉe ni urboj, konstruaĵoj, fabrikoj, minejoj, hoteloj, teatroj! Kiom multas varoj ĉe merkatoj, kiom multe da ŝipoj ilin transportas. Faru bilancon, kiom el la ĝenerala sumo devas ricevi infano, kiom li ricevas vere... Ni kontrolu konscience, kiom ni apartigas por uzado al infana popolo, nealta nacio, servutiga klaso. Kiel granda estas la heredaĵo kaj kia devas esti la disdivido. Ĉu ni, nehonestaĵoj, ne senigis la infanojn de ilia laŭleĝa parto, ĉu ni ne eksproprietigis ilian parton?... Pro la mizereco de la infano kaj dependo materia, la rilato de plenaĝuloj al infanoj estas malmorala. Kial vi naskis min? Kiu petis de vi doni al mi tiun hundaĉan vivon? Donu kondiĉojn, por ke la infanoj maturiĝu pli bonaj.

Ni ne permesas al la infanoj organiziĝi; ignorante, ne plene amante, ni ne zorgas pri ili. Ekde junaĝo ni kreskigas en la konscio, ke la granda pli gravas ol la malgranda. Ni instruas propraekzemple malatenteme rilati al tio, kio pli malfortas... Estas negranda merkata kosto de la nematura. Ĝi estas nulo, ni estas ĉio... Niaj gefiloj estas nia propraĵo. Infano ne estas soldato, li ne defendas la patrujon, kvankam li suferas kune kun ĝi. Lian opinion ni ne devas konsideri, li ne estas elektanto... Malforta, eta, mizera, dependa... Nazmukulo, ankoraŭ infano – estonta homo, ne estanta... Tio ne gravas. Ni amas la infanojn. Malgraŭ ĉio ili estas nia dolĉaĵo, vicleco, espero, ĝojo, ripozo, vivlumilo... Sed kial ili estas kvazaŭ premo, malhelpo, netaŭga almetaĵo? Pro kio ekzistas malinklino al la amata infano?

Efektiveco de voĉdonrajto de infanoj: Voĉdonrajto de infanoj – parlamenta plimulto – prioritata buĝeta financado de infana sfero – unuavica solvado de infanaj problemoj – rapidiga evoluo de homa kapitalo (resurso) – prospero kaj sociala harmonio de socio.

Tradukis Maria Abolskaja, kompostis Anatolo Sidorov (2005)